

Lucien A. PERAJRE

TRA LA MONDO  
PER BICIKLO  
KAJ  
ESPERANTO

**SAT-Broŝurservo - Laŭte!**

FR-47470 Beauville

2007



## **Enkonduke al la 3-a eldono de "TRA LA MONDO PER BICIKLO KAJ ESPERANTO"**

Memore kaj honore al nia amiko Lucien A. Péraire, naskiĝinta en Lavardac (Aĝenio) la 26an de aprilo 1905, ni reeldonas malgrandan E-kompilaĵon el lia 1500-paĝa, franclingva manuskripto.

La tekston de 1a unua, 44-paĝa, eldono li mem esperantlingve kompilis. Tiu unua broŝuro aperis okaze de 1a kongreso de asocio SAT-Amikaro en Aĝeno (Agen) en 1974 kaj estis publikigita en la broŝura serio de "La Juna Penso" tiama organo de la Junulfako de SAT, Lucien Péraire partoprenis tiun kongreson kaj tie mem rakontis pri sia eksterordinara vojaĝo kaj prezentis sian broŝuron.

Kvar jarojn poste, komenciĝis en gazeto "Laŭte!" la publikigado, post esperantigo fare de Amika Esperanto-Rondo Aĝenia, de aliaj ekstraktoj el la originala manuskripto en felietona formo.

Por la broŝura eldono de 1990, 108-paĝa, ni rebakis la tuton, t.e. la ekstraktojn elektitajn de la aŭtoro mem kun tiuj ĉerpitaj el la felietono. L. Lentaĝne lingve kontrolis kaj preparis la mapon.

La nuna, tria eldono, estas represaĵo de la dua, nun elĉerpita.

Aliaj ekstraktoj, elektitaj kaj redaktitaj de kaj por "Monato" aperis en ĉi tiu gazeto, ankaŭ tie felietone, de n-ro 2a ĝis 12a de jaro 1982, sub titolo "Bicikle tra Eŭrazio".

Ni aparte dankas la esperantistojn de Hanojo (Vjetnamio). kiuj la 23an de aprilo 2006 inde celebris 1a 100an datrevenon de la naskiĝtago de Lucien Péraire kaj nun preparas la organizadon de 1a 63a Internacia Junulara Kongreso en sia urbo, de la 28a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 2007.

Amika Esperanto-Rondo  
prizorganto de SAT-Broŝurservo - Laŭte!, FR-47470 Beauville  
decembro 2006.



## BIOGRAFIO DE LA AŬTORO

**Mi** naskiĝis laborulido kaj proleta laborulo estis mian tutan vivon. Pro tio kaj ankaŭ pro la mondmilito mi ne povis longe viziti la lernejon. Jam de mia 11-a jaro mi eklaboris. Tial tiu unua manko suferegis min dum mia tuta vivo: la manko de instruiteco. Mi avidis lerni; tial ĉion, kion mi ne povis lerni en lernejoj, vole nevole mi devis lerni el la vivo mem.

**1913:** kristnaska festo. Frumatene, la junularo testis tiun tagon gaje. Kantoj, amuzoj, jen, kun frata manĝado, la ĉefaj zorgoj de tiuj junaj viroj. Mia patrino ilin servis. Mi nudpiede ellitiĝis kaj antaŭ kamena fajrego partoprenis tiun familian feston. Kvin jarojn poste, el tiuj junuloj (ĉ. deko) restis nur... unu, mia plej maljuna frato. Ĉiuj ceteraj, inter ili, mia dua frato, glorie estis fibuĉitaj... por patrujo.

Dum la militperiodo, en la lernejoj mankis instruistoj. Tial alvenis por nin instrui iu juna studento pri komerco.

"... Tio ĉi estas stenografio, Duploje-stenografio, tute nova metodo kaj invento por rapida skribado. Kiu volas lerni stenografion?"

Kaj tiel mi ricevis la unuajn lecionojn, kaj lernis kun granda intereso.

"Lernu ion kaj vi ion scios". Tiu germana proverbo estis bedaŭrinde tro trafa por mi, ĉar la tiama socio rifuzis al mi tiun instruon, kiun mi avidis, kaj ĝin rezervis al aliaj geknaboj pli favorataj de la sorto ol mi.

Sola viro en mia familio kun mia jam maljuna patro, mi devis eklabori, labori, laboradi. laboregadi, por helpi mian patron vivteni la tutan familion, proletan, multnombrian familion. Ĉio mankis, krom laboro.

Preterlasi la studadon? Neniam! Mi kromlaboris post la lernejoj horoj, dum miaj pli favorataj kamaradoj ludis... aŭ dormis.

Interalie, mi paŝtis bovinaron kaj, mirinde, tio havigis al mi tempon por studi, legi, la naturon admiri kaj atenti. Ĵaŭde kaj dimanĉe mi ankaŭ helpis la metiistojn de mia vilaĝo kaj inter ili la biciklo-meĥanikiston. Por min danki, li ebligis al mi mem munti mian unuan biciklon per nevendebaj pecoj.

Hazarde okazis, ke metiisto ĉarpentisto min dungis kaj eĉ ekamis min. Pro tio li favoris mian studemon. Vintre, ĉiujn vesperojn ĝis la 23-a, li instruis al mi la ĉefajn sciojn de kalkulo, geometrio kaj desegno. Samtempe li encerbigis al mi la tradician kutimon de francaj submajstroj trairi piede la tutan Francion por labori en la ĉefaj provincoj kaj tiel akiri kiel eble plej da scio pri profesio kaj socio.

Anstataŭ vojaĝi piede, mi uzis biciklon. Biciklo ja estis kaj restas la plej bela kaj utila inventaĵo de la moderna tempo. Mi laboris tiel en ĉiuj grandaj urboj de Francio. Cetere, tiu turista biciklado ne nur agrablis al mi, sed ankaŭ estis profitdona por mia studsoifo. Mi profitis de ĉiaj okazoj por ĉeesti vesperkursojn en Turo, Parizo, Liono, Bordojo, Tuluzo ktp.

Iom post iom mi komprenis, ke super ĉiuj kaŭzoj de milito unu el la ĉefaj estas antaŭjuĝoj kaj malscio kaj sekve egoismo, memamo, stultaĵoj pli-malpli ekspluatataj de mondpotenculoj aŭ fiuloj. La amaso ankoraŭ ne komprenis, ke sur nia tero ĉiuj homoj, en kiu ajn parto ili vivas, dependas de aliaj kaj, ke, por eviti militojn, ĉu enlandajn ĉu internaciajn, vole nevole ili devas praktiki toleremon kaj fratecon unu la aliajn.

Esperanton mi lernis per korespondado dum mia militservo kaj tuj poste, en 1927, mi partoprenis la kongreson de S.A.T. en Liono, kien kompreneble mi iris bicikle.

Kelkajn semajnojn poste, en "**Sennaciulo**", mi legis jenan anoncon: "juna germano serĉas alian esperantiston por bicikladi tra la mondo al malproksima oriento."

Mi estis matura por tiu aventuro, ĉar libera kaj lernavida...

La 22-an de julio 1928 mi do forlasis Francion kaj revenis la 28-an de julio 1932, iom malsana, tute senmona kaj ankaŭ tute

seniluziigita. Mi devis senprokraste ree labori kiel ĉarpentisto. La postan tagon min trafis grava akcidento...

Mi estis apenaŭ resanigita, kiam la dua mondmilito eksplodis. Mi tamen estis edziĝinta kaj poste estis militkaptita kaj grave malsana. Pro tio mi estis liberigita en julio 1940, sed... du tagojn post mia reveno ankaŭ mian edzinon trafis akcidento, tiel ke ŝi restos kripligita la tutan finon de sia vivo. Min mem oni devis urĝe operacii. Tiel mia edzino kaj mi estis samtempe malsanegaj.

De 13 jaroj mi flegis mian edzinon, kiam en 1953 nova gravega laborakcidento trafis min. Vole nevole mi estis devigita disiĝi de mia edzino, ĉar por ni, du kripluloj, komuna vivo fariĝis neeltenebla.

Mi venis en Liburnon (Libourne) por labori. Kaj ĉi tie mi konis alian amikinson, kiun, ve, du jarojn poste oni devis ankaŭ grave operacii. Same kiel la unua, ankaŭ ŝi restos kripligita la tutan finon de sia vivo.

Dume mi maljuniĝis, suferis senlaborecon, procesojn, incendion de mia domo ktp. Tiuj aĉaĵoj klarigas ĉefe, kial mi bezonis tiom da tempo por kompili, netigi kaj precipe publikigi senhelpe la notojn, kiujn mi stenografis dum mia migrado.

Por konkludi tiun ĉi biografion, mi precizigu, ke dum mia vojaĝo mi laboris en Sovetio kaj en Ĉinio, disvendis multajn milojn da poŝtkartoj kaj precipe, helpe de esperantistoj, organizis multajn prelegojn pri mia vojaĝo kaj pri Francio. post tiuj prelegoj mi ofte kantis esperantajn kaj francajn kantojn.

### **Averto al la juna legonte**

Precipe por vi mi penadis eldoni tiun ĉi rakonton. Vere mi travivis ĉion, kion vi legos. Mi zorgas verki kiel eble plej honeste kaj sincere. Mi estas certa, ke por vin interesi kaj konvinki ne necesas lasi liberan kuron al sia fantazio kiel en romano! Ve! Plej ofte la realo superas la imagon.

En la ĉiutaga vivo la bone farita laboro, la toleremo, la solidareco kaj la pacienco estas almenaŭ tiel indaj, kiel la faroj de iu ajn krimulo, kiun oni tro ofte proponas al vi kiel imitindan heroon.

La celo de tiu ĉi rakonto estas unue amuzi vin, vin instrui iomete kaj precipe vin instigi al pripensado rilate al ĉiuj vivtemoj.

## TRA LA MONDO PER BIKIKLO KAJ ESPERANTO

(ekstraktoj)

**1927.**

Mi estas liberigita el la soldatservo. Per biciklo mi foriras de Lavardako (Lot-Garonio) por labori en Liono, unua etapo de mia estonta vojaĝo. Kial Liono? Ĉar tiun jaron okazas en tiu urbo internacia esperanto-kongreso. Tiu kongreso montras al mi, ke post ses monatoj (15 lecionoj) da serioza lernado sen profesoro mi sukcesas perfekte kompreni delegitojn el multaj landoj. Mi povas konversacii, interŝanĝi ideojn, kanti, labori kun ili, mi, simpla, malklera laboristo!

Mi vere entuziasmiĝas kaj, ĉar mi estas libera, en mi ĝermas la ideo elprovi per ĉiutaga praktikado tiun mirindan ilon kaj la universalan organizon, kiun ĝi ebligis: la tutmondan delegitan reton.

Tiel mi diskrete, senreklame, preparas min foriri, firme decidinte observi la naturon kaj la homojn, kiujn mi vizitos, kaj, ĉefe, **respekti** la morojn, la kredojn, la ideojn, plejeble **adaptiĝi**, praktiki ĉiuokaze la universalan lingvon. Kiam farita la decido, kiun veturilon elekti? Mi bezonas malmultekostan aparaton, facile kondukeblan, facile provizeblan kaj ripareblan. Biciklo, jen idealo! jen, kun esperanto, la plej mirindaj elpenaĵoj por la celo, kiun mi fiksas al mi!

Mi havas fortikan sanon, esperon, kuraĝon, malmulte da mono, metion, multe da naivo kaj iluzioj, ian praktikadon de turismo kaj sporto en montaro.

Mi jam korespondas kun juna germana laboristo, kiu sercas kunulon por vojaĝo ĉirkaŭ la mondo...

## **Dronsavo en Mulbaŭzo, la 24an de julio 1928**

Jam de tri tagoj mi biciklas de Liono. Mi alvenas en Mulhaŭzon, traŭrinte mirindan regionon.

Mi transiras la ponteton, kiu de dekstra flanko, de la kanalo, kondukas al placeto, en kiu dum la nuna momento svarmas multaj homoj.

De la mezo de la ponto mi ekvidas boateton, en kiu sidas du junulinoj... Subite mi ekaŭdas angoran kriegon kaj fulmrapide mi komprenas la dramon. Mi vidas la promenantojn alkuri al la kaja bordo, levi la manojn kaj helpo postuli. Reflekse, senpripense, mi rapidege iras al la kajo kaj... plufi jen mi, tute vestita, en la malpura akvo de la kanalo. Rapidege mi ekvidas unu el tiuj knabinoj, kiu tre mallerte provas naĝi al la kajo. De la alia mi vidas nur la brunan makulon de la subakviĝinta hararo. Mi plonĝas kaj miaj piedoj eniras en molan grundon, kiu servas al mi kiel piedapogilo por elakviĝi rapide. Mi brakumas la kvazaŭ senvivan korpon kaj ambaŭ ni revenas aeren. Sub instigo de la instinkto de memkonservo ŝi baraktas inter miaj brakoj kaj eĉ resendas min al la fundo, duone sufokitan... Tio memorigas al mi la konsilojn, kiujn mi ricevis de savinstruanto; mi denove elakviĝas kaj... pardonu min, fraŭlino, mi pugnofrapegas ŝin sur mentonon. La efiko estas drasta, ŝi malbrakumas min. Tiel mi povas rekapti ŝin dorse kaj peli ŝin antaŭen al la kajo, sur kiun la ĉeestantoj grimpigas ŝin.

-----

En Alzaco la varmo estas sufoka. Mi petas ladbotelon da akvo ĉe maljuna kamparano, kiu malfermas al mi sian pordon: li ne kapablas aŭ ne volas min kompreni. Mi ĵus alvenis en Alzaco kaj mi jam estas devigata fuŝparoli germane!

Mi transiras la germanan limon en Strasburgo, la 29an de julio 1928, spite mian pasporton makulitan pro enakviĝo en Mulhaŭzo.

## **Mi alvenas en Döbelnon la 2an de aŭgusto.**

Kvankam mi estas atendata, la tuta familio estas emociita. Kamarado Posern forestas, sed li alvenas senprokraste kaj tuj ni vizitas la kvazaŭan organizanton de tiu aventuro, kamaradon Ŝmidt. Li estas la gvidanto de la loka esperanto-rondo kaj perfekte parolas la francan. Kompreneble, min li bonege akceptas kaj dum pli ol du horoj ni pridiskutas nian estontan iradon.

Kamarado Posern, samaĝa kiel mi, estas ankaŭ laboristo. Li laboras en loka uzino kiel orpoluristo. Li bone parolas esperanton kaj iom la anglan. Li, same kiel mi, havas bonan apetiton kaj fumas pipon.

## **Unuaj impresoj pri Germanio**

En Germanio frapas min la gastameco kamparana. De Nurembergo al Bajroto abundas la ĉasaĵoj: de mia lito mi ekvidas cervon en tritikkampoj!

En 1928 la trajnvojaĝantoj mem zorgas pri la envagonigo de siaj pakaĵoj en la ŝarĝvagonon kaj pri la transvagonigo ĉe la trajnŝanĝoj. La kvaraklasaj vagonoj estas el ligno, la benkoj sen kusenoj. Forestas kurtenoj.

En Döbeln (Saksio) ĉe la kunvojaĝonto Posern, la sentukaj litoj ne plu mirigas min. La manĝoj konsistas el porkaĵoj, butero kaj kafo; estas malmulte da pano, sed multe da boligigitaj terpomoj (ĉefe en la restoracioj, oni servas tri panspecojn laŭ la petita manĝaĵo). Estas nenio por trinki dum la manĝo; nur fine, laktokafo.

La loĝejo konsistas el tri ĉambroj: kuirĉambro, salono, dormĉambro, simplaj kaj komfortaj, samkiel en ĉiuj loĝejoj de tiu ĉi regiono, kun la nepra kanapo kaj la fajenca forno. Ĉio montras la purecon, komforton kaj bonhavecon.

Se kompari kun Francio, ordo, pureco, higieno estas tie rimarkindaj. Estontece ni rimarkos, ke tiuj ecoj estas ankoraŭ pli notindaj en Japanio. Bedaŭrinde, estas nun multaj senlaboruloj ĉi tie kaj tiu situacio estos baldaŭ ekspluatata de iu nomata Hitler, tiam apenaŭ konata.

La esperanto-movado estas pli disvastigita ol en Francio. Estas propagandaj paneloj kaj poŝtkestoj en bone elektitaj lokoj de la urboj. Ni vizitas esperantistojn kaj kunvenojn, kie ni klarigas niajn projektojn.

### **10an de aŭgusto 1928**

Hodiaŭ ni iris en Lepsikon, kie estas medio de eminentaj esperantistoj. Ili donis al ni plej bonajn konsilojn. (Plej multaj el tiuj esperantistoj estis pereigitaj de Hitler kelkajn jarojn poste).

En Lepsiko, modernega urbo, estas etkostaj restoracioj. La hotelo de la popoldomo, mastrumata fare de sindikatistoj, akceptas min ĉe prezento de mia sindikatana karto.

Survoje ni trovis kelkajn malfacilaĵojn kaj vespere mi jam komprenis, ke P. ne estas elturniĝema. Li estas flegma, obstina kaj ankoraŭ pli naŭva ol mi. Sed ĉu ankaŭ mi ne havas miajn miskvalitojn? Mi volas esperi, ke iom post iom glatiĝos niaj karakteroj per iom da bonvolo reciproka.

### **Manifestacio de RUĜA FRONTO**

En P. ni finas la vespermanĝon, kiam nia gastigantino ekaŭdas trumpetbruon leviĝantan el la strato. Temas pri manifestacio de RUĜA FRONTO. 500-600 personoj defilas surstrate. Mi povas facile admiri la ordon, la disciplinon de tiu manifestacio. Cekape 100-150 junuloj kun soldatvestaĵoj portas torĉojn kaj kvarope marŝas, bone disciplinitaj. (Ha, tiu germana disciplino I). Sekvas la muzikistoj kun siaj instrumentoj zorge frotitaj kaj brilantaj en la mallumo. Ĉiujn instrumentojn ornamas ruĝaj floroj. Poste defilas kelkaj virinoj; sekvas alia fanfaro, kaj fine la manifestantaro, kiu mem ordon gardas. Kiel ĉie la popolo rigardas, sed oni sentas, ke ĝi estas simpatiema. Neniu malkonkorda krio: ĉio okazas en ordo kaj disciplino. Neniu videbla policisto. je la 21a 30 rekvietiĝis la urbeto...

### **10an de aŭgusto 1928**

Dum la tuta nokto mi klare aŭdis la plorojn de la patrino de Paŭlo. ja hodiaŭ ni foriros al aventuro.

Je la oka, S-ro Ŝmidt, F-ino Kopleka kaj ĉiuj amikoj kaj esperantistoj akompanas nin ĝis loko nomita Papago. Tie oni fotas nin lastfoje. De ĉi tiu monteto mi admiras belegan pejzaĝon. Je la naŭa, efektiva foriro: ni fine biciklas solaj. Aventuroj komenciĝas kun komunaj vivo kaj destino...

(En Eŭropo ni biciklis en Germanio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Hungario kaj Polio.)

-----

Serio da penigaj krutaĵoj devigas nin ofte piediri, ĉar Paŭlo ne posedas rapidum-ŝanĝilon tiam ankoraŭ nekonatan en Germanio. Ankoraŭ restas 15 kilometroj ĝis la Ĉeĥoslovakia landlimo. Por atingi ĝin ni trairas serion da valoj kaj montetoj kovritaj de abioj. Je la 15a ni staras antaŭ la doganejo. Ni tuj rimarkas, ke ĝi estas grava turisma loko. Cento da aŭtoj kuŝas en herbejo apud restoracio-ĉaledo, kie multaj turistoj sidas ĉe tabloj sur la teraso. La germanaj doganistoj akceptas nin bone. Unu kvaronhoron poste, la formalajtoj estas plenumitaj: kosto, 105 markoj. Dume, la popolamaso ĉirkaŭas nin kaj atente ekzamenas niajn biciklojn. Ni reekiras...

Je la 18a ni estas en TEPLICE, loko de nia unua rendevuo. En la restoracio ni trovas 7-8 esperantistojn kaj la konversacio komenciĝas. Ni rakontas niajn aventurojn; tiel fervore, ke ni forgesas manĝi. Delegitino klarigas al ni pri la E-movado en Ĉeĥoslovakio. Ni rimarkas, ke tie ĉi estas la samaj obstakloj kiel en Francio por la propagando.

## **Aŭstrio.**

24an de aŭgusto. La kamparanoj plugas kaj plukas la pirojn. Modesta kamparanino donacas kelkajn al ni, kio profunde emocias nin. Tiu gastamo de la modestuloj estos la "savtabulo" por la tuta resto de nia vojaĝo kaj ĝi ĉie manifestiĝas diversgrade.

Unu el la unuaj personoj, kiujn ni renkontas, direkte al Vieno, estas esperantisto, kiu iras al sia laboro. Iom poste, petinte klarigon al policisto, ni ricevas respondon en bonega esperanto. (Cetere tre videbla stelo montras, ke li scipovas tiun lingvon). Ĉe la UEA-delegito, S-ro BERNFELD, ni havas la bonŝancon renkonti kelkajn

esperantistojn. Je la 20a ni rapidas por respondi la inviton de la esperantistoj de la 18a viena distrikto. Atendas nin la invitinta kamarado, kiu kondukas nin al ĝardeno, kie jam ariĝis kelkaj gejunuloj sub laŭbo. Plimulto estas junulinoj. oni superŝutas nin per demandoj. La fraŭlinoj estas afablaj. Paŭlo prestidigitas. Miaflanke mi kantas en esperanto, sed oni ĉiam petas de mi francajn kantojn. La enspezo estas modesta, sed tre amike donacita de unu el la junulinoj...

En laborista klubo fervojista, prezentante nian projekton kaj nian spektaklon, ni ĝuas grandan sukceson, eĉ ĉe la ne-esperantistoj, kiuj ŝtopas la fenestrojn!

La 31an de aŭgusto ni foriras el Vieno, trairas Danubon, kie doganisto nin vokas en esperanto kaj donas al ni ĉiujn utilajn informojn.

### **En Hungario.**

Je 20 km. de Konaron ni havas neatenditan renkonton: strangan veturilon, vaporaŭtomobilon! Ni ekkonversacias en la franca. Temas pri du italoj, kiuj ĉirkaŭveturas la mediteranean landaron. Ili donas al ni utilajn konsilojn por nia vojaĝo, ekzemple, disvendi poŝtkartojn, kion ni tuj plenumas.

En Budapeŝto ni estas rimarkinde bone akceptitaj. La 9an de septembro ni estas invititaj ekskursi al la najbara montaro kun la naturamikaj esperantistoj. Kiam ni alvenas je la 7a ĉe Berlin-placo, la rendevuejo, jam estas almenaŭ 150 gejunuloj kun pantalonetoj kaj tornistroj. Gojo, sano, vikleco aperas sur ĉiuj vizaĝoj. Belega suno kompletas nin la tutan tagon. Sincera kamaradeco regas inter ni.

En Hungario regas malpli da disciplino kaj pli da mizero ĉe la laboristoj, kies movadon bridas la registaro. Virinoj kaj infanoj laboras ĉe riparado de la vojoj kaj fervojoj.

### **16an de septembro 1928**

Ni atingas la polan landlimon en marĉa regiono. Du junaj kamparanoj akompanas nin al la doganejo. Surprizo: tie ĉi inter

Hungario kaj Pollando la vojo malaperas, apenaŭ skizita. Post diskutadoj, palavroj, telefonadoj, la doganistoj stampas niajn pasportojn kaj lasas nin pluri. Feliĉe ni ne paneas, ni trairas fulme la vilaĝojn. Ili ĉiuj same aspektas: senfina strato el vico da domoj laŭlonge de malbone pavimita, malpura vojo. Hodiaŭ estas dimanĉo. Ni renkontas grupojn da gejunuloj en belaj regionaj kostumoj kun viglaj koloroj: ruĝa, blua, blanka, kaj ledaj botoj mezkruraj.

Sur la ŝildoj kaj la vojmontriloj malaperas la latinaj literoj, anstataŭite de la rusa skribmaniero, kies alfabeton mi eklernas.

**21an de septembro** (Tie situas malagrabla okazaĵo: pro eraraj informoj en Nemet-Mokra pri la vojo sekvota, la biciklantoj perdiĝas en la montaro, kie ili devas subtende tranokti en teruraj kondiĉoj. Pluvegas kaj fulmotondras... Nur la morgaŭon ili povas retrovi la revenvojon kaj ĉiam kun malplena stomako kaj sub pluvo atingas kamparanan domon, isbaon...)

Por ripari ni ŝirmas nin sub tegmento de fojnamaso apud isbao. Ni ĵus finis la riparadon, kiam sub la pluvo alvenas virino, kiu mansignas al ni eniri en ŝian domon. Ni kore konsentas! Provinde demandi nin ŝi scipovas iom da germana ŝi ekflamigas fajron en la kameno kaj komprenigas al ni, ke ni sekiĝu. Ni sukcesas klarigi al ŝi, ke ni ŝatus akiri manĝaĵon. Ve, ŝi ne havas panon. La muroj konsistas el ŝtipoj, la planko el kompaktigita grundo. La interno estas tre pura, sed simpla kaj malriĉa. Antaŭ la pordo troviĝas la terforno, kie oni regule kuiras la panon kaj la okazajn festajn manĝojn. En la tuta Rusio oni retrovas tiun fornon, kaj ĝenerale ĉirkaŭ ĝi la domo estas konstruita; tiel, vintre ĝi funkcias kiel centra hejtilo kaj ĉirkaŭ ĝi, sur platformoj, dormas la familianoj. Tian fornon oni trovas ankaŭ en malnovaj farmdomoj de Perigordo kaj Akvitanio.

En la kuirĉambro regasodoro de lakto. La virino estas ankoraŭ juna, ĉirkaŭ 30-jara. En angulo la avino sidas sur benko kaj du nepoj gajigas tiun hejmon, kiu aspektas tre malriĉa. Sen formalajo la patrino metas marmiton sur la fajron kaj sur la tablon du telerojn el emajlita fero. Kaj, ĉiam senvorte, ŝi servas al ni fumantan telerplenon el la marmit-enhavo. Ĉi estas speco de kaĉo, miksaĵo el maizo kaj milio, krude muelita, kuirita en akvo kaj miksaĵo kun lakto.

Mi trovas en ĝi ankaŭ nudelojn, terpomojn ktp. Neniam antaŭe mi ĝuis tiel bonan manĝon. De ĉirkaŭ 53 horoj ni sorbis nur la akvon de torentoj...

La patrino insistas, ke ni manĝu plian plenteleron. Kiam ni estas tute sekaj kaj sataj, ni demandas antaŭ ol foriri, kiom ni ŝuldas. Si energie rifuzas ricevi pagon. Ho, la bona virino, ho, la gastamo de modestuloj!

Tion vidante, forirante ni kisas la infanojn kaj kaŝe lasas al mano de l' plej eta 5-kopekan bileton.

-----

Ni atingas la vilaĝon RUSA-MOKRA, kaj haltas en loga gastejo. Ĉar estas sabate, ĝi estas plena de viroj, arbohakistoj. Ok- aŭ dekope ĉe tabloj, ili ĉiuj trinkas brandon, verŝajne vodkon. Tie ni demandas, ĉu eblas trovi tranoktejon... Noktiĝas. Mi ekskribas en mia taglibreto. Malantaŭ mi junularo brue kantas. Baldaŭ aro da kamparanoj ĉirkaŭas min silente, rigardante min stenografi. Iom post iom, per gestoj kaj kiel ni povas, ni ekkonversacias. Post sufiĉe longa palavro, iom ebria giganto proksimiĝas al ni kaj proponas konduki nin en sian hejmon kaj tie vespermanĝi kaj tranokti. Ankoraŭ ne ricevinte respondon de la gastejestro, ni konsentas. (Endas adopti la morojn de la trairitaj landoj. Pli kaj pli evidentiĝas, ke la okcidentstilaj hoteloj ne ekzistas en la slavaj landoj. Fama gastamo anstataŭas tion; kaj neniam mi bedaŭris akcepti tiun gastamon; male, spertado pruvis al mi, ke estus grava ofendo al la ĉirkaŭantaro kaj al la gastiganto, se ni rifuzus).

Kiam ni atingas la domon de nia gastiganto, lia edzino, juna kaj beleta, estas preparanta la vespermanĝon. Ŝia 18-20-monata filino estas apud ŝi (...). Baldaŭ ŝi vokas nin por la manĝo. Ŝi metis tri telerojn sur la tablon. intertempe alvenis alia viro. Ni manĝas ĉiu el propra telero. La du viroj manĝas el la sama, kun la knabino; la virino manĝas tute sola en la kuirĉambro. Kial? Nia gastiganto instigas nin manĝi. Poste ni ankoraŭ interparolas. Li proponas al ni sian propran liton kaj foriras kun alia kamarado, kiu vokas lin al la strato. Ni restas solaj kun la virino kaj la alia kamarado - frato, verŝajne. La virino tuj kuŝiĝas. La alia viro ekkuŝas sur vestoj sur la planko. De unu horo ni kuŝas, kiam revenas nia gastiganto, portante

glasegon da biero. Videble li estas ankoraŭ pli ebria. Li levigas nin kaj invitas nin trinki. La virino estas tute ignorata. Cetere, ŝi ne moviĝas el sia lito. Mi insistas por proponi bieron al ŝi, sed la viro komprenigas al ni, ke estas la kutimo tiel agi. Fakte la virino vigle rifuzas. Sed la knabino partoprenas la feston. Ni ĉiuj trinkas el la sama glaso (kvankam li alportis po unu). Tio montras la interfratiĝon, la amikecon, kiun oni prefere ne malfavoru. Baldaŭ la infano kisas sian patron sur la manoj kaj sur ĉiuj vizaĝpartoj, kaj kisas ankaŭ niajn manojn. Ni rekuŝiĝas, ĉi-foje definitive... Mi kredis, ke la nokto bone pasos, sed ĉirkaŭ la 11a kaj duono vekas min kvazaŭ malakraj bruloj sur miaj kruroj. En la ĉambra malhelo mi ekvidas la viron, kiu duondorme pisas sur min. Ankaŭ duondorme mi repuŝas lin iom vigle; li falas sur la plankon, sed baldaŭ restariĝas kaj eksidas sur la benko. Ankaŭ mi leviĝas kaj rapide surmetas mian pantalonon. Ni relative multe bruas, sed tamen vekis nenion, krom la juna virino, kies teruritajn okulojn mi rimarkas en la duonombro. Palpserĉante, mi trovas mian elektran manlampon kaj en la luma fasko vidas nian gastiganton, ebriegan, peze dormantan. Baldaŭ li refalas sur min kaj mi ne povas malembarasi min el li... Mi retenas ridon, ĉar mi konscias pri la terurita juna virino tute proksime de ni. Mi skuas lin kiel prunarbon sed ne povas lin veki: rezigne mi kuŝigas lin apud Paŭlo, kiu ankaŭ dormas peze, kaj nenion vidis nek aŭdis. intertempe la virino senvorte leviĝis. Kun mia manlampo mi iras kuŝiĝi apud la forno, en la kuirĉambro, kun mia litkovrilo, sed ne plu fermos la okulojn ĝis la mateno. Poste la viro ekstaras por urini kaj rekuŝiĝas apud Paŭlo. Tiel pasis tiu memorinda nokto!

-----

### **25an de septembro 1928:**

Vere, ni profunde memoros tiun Karpatan regionon. Kontinue pluvadas. La vojoj estas ofte difektitaj de la pluvo, foje baritaj de torento. Ni estas devigataj al veraj akrobataĵoj por trairi ĝin. Iom poste ni ree grimpas en la montaro. supre ni trovas doganistojn, kiuj varme akceptas nin. Male, la vento estas tre malvarma, kvankam blovanta el la sudo. La ĉenaj doganistoj kondukas nin al la polaj doganistoj kaj el la diskutado montriĝas, ke ni devas retroiri por

ricevi stampon sur niaj vizoj. Malsuprenirinte en la valon, ni ekscias, ke oni redonos al ni la garantimonon (kiun ni antaŭpagis ĉe nia eniro en Ĉeĥoslovakion) nur kondiĉe ke ni forlasu la landon per trajno, kiu foriros nur la morgaŭon je la 9a matene. Ni devas konsenti tion. La afabla doganisto petas de la staciestro, ĉu li povus loĝigi nin por la nokto. Neeble. Ni reiras al la vilaĝo, kie, post kelkaj esploroj, ni trovas loĝlokon sur la pajlo de grenejo.

## **27an de septembro**

(En Polio). Je 15 kilometroj antaŭ Kolomea ni petas vojklarigojn en la germana. Sed la kamparanoj, ne komprenante kion ni diras inter ni, kredas, ke ni parolas latine. Ni devas multe peni por klarigi, kio estas esperanto. Tio instigas nin disdoni al ili klarigajn esperantokartojn. ili malprecize jam sciis pri esperanto, sed ne sciis, kie trovi la necesajn librojn. Tamen mi memorigas, ke ni troviĝas en Pollando, ke esperanto tie estis publikigita. Kaj en 1928 la popolo apenaŭ scias pri la ekzisto de esperanto, dum tie la rasoj, do la lingvoj, estas nekredeble miksitaj...

Kolomea estas urbo de koto kaj aĉaj tervoj. La loĝantaro estas plejmulte juda. Ĉiuj parolas samtempe kaj volas scii, kiuj ni estas. Tra kotaj stratoj kompleza sinjoro akompanas nin al la E-delegito. Juna virino akceptas nin kaj vokas sian edzon, kiu alparolas nin tuj en esperanto (...) je la 16a, en nia porbicikla vestaro, ni iras al la liceo, kie nia amiko prezentas nin al sia lernantaro. La prezenton malfermis la liceestro mem. Tiel ĝis la 18a ni tie raportos pri nia vojaĝo. Nin atente aŭskultas gejunuloj. Ni devas subsribi tiom da aŭtografaj, kiom da gelernantoj...

## **29an de septembro**

Ni decidas disdoni kaj disvendi poŝtkartojn, ĉar la sperto montris al ni, ke ĉiuj petas ilin de ni. Ni tuj ekiras por viziti la urbajn gazetojn kaj presejojn por presigi poŝtkartojn.

## **30an de septembro**

En Halaz ni trovas loĝejon ĉe paro kun du infanoj kaj avino. La tuta familio manĝas el sama telero. Post la manĝo ĉiu siavice iras klini sin kaj preĝi antaŭ unu el la multaj ikonoj, kiuj ornamas la

murojn. (Eĉ en Sovetio kaj ĉefe en Ĉinio mi trovos ĉe ĉiuj kamparanoj en angulo la etan ikonejon, kie tage-nokte brulas elelampeto, eterna flamo de la kredo kaj de la hejmo, kia ajn estas la religio: kristana, budhana k.a...) La patrino aranĝas puran pajlon por ni en ĉambroangulo, pajloliton por ili mem. Ni tranoktas kune en la ununura ĉambro, lasante la ununuran liton por la avino kaj la plej aĝa filo apud la forno.

### **De la 2a de oktobro ĝis la 10a de oktobro: En Lvov.**

Ni baraktas en formalajtoj por akiri transirpermesan vizon. Ni vizitas la sovetian kaj britan konsulejojn. Necesas unue brita vizo, akirota nur ĉe la konsulejo en Varsovio, por eniri en Hindion. Cetere, tre verŝajne ni ne akiros ĝin, ĉar la sovet-hinda landlimo estas fermita kaj la rilatoj inter Sovetio kaj Hindio estas streĉaj... En la sovetia konsulejo ni akiras vizon validan nur tridek tagojn sed renovigeblan en ajna sovetia urbo. Ni rajtos vendi niajn kartojn kaj eĉ labori eventuale. Ni neniom pagas por tiuj formalajtoj. Ni farigis kliŝon por eldoni poŝtkartojn kaj du ŝildetojn por loki sur niajn sakojn. La loka laborista E-ĝrupo estis malstarigita, tial ĉeestas niajn kunvenojn plimulto da virinoj. Ni vizitas la sidejon de la metalurgiista sindikato. La salono estas ordinara. Nur unu afiŝita portreto: tiu de Karlo MARKS. Ni vizitas popoldomon, kie amaso da tre trankvilaj laboristoj kartludas aŭ interparolas; ĝi estas la kunvenloko de la ĉarpentistoj nun strikantaj por akiri salajran plialtiĝon.

Por fiksi nian vojon ĝis Odeso, ni iras senrezulte al iu aŭ alia sporta societo. La naturaj obstakloj estas transireblaj; sed la artefaritaj baroj - landlimaj, lingvaj, politikaj - estas la plej grava malhelpo.

### **Vendrede, la 12an de oktobro 1928**

Lastajn dekojn da kilometroj, en Pollando, ni biciklas sur tre malbona, eĉ abomena vojo. La vilaĝoj estas tre malproksimaj unuj de la aliaj. Ĉirkaŭ la 13a ni atingas la landoliman vilaĝon Bodvoloczyska. Kvankam mia vizo ne plu validas de tri aŭ kvar tagoj, la policanoj min ne punas. Ĉi tie ni nepre devas transiri la

landlimon per vagonaro, tio estas la regulo. Ni estas nur tri vojaĝantoj: unu sinjorino, kiu jam sidas en vagono, kaj ni ambaŭ.

Jam noktiĝas, la vagonaro tre malrapide ekiras. En duonlumo mi ekvidas plugitajn kampojn kaj teraĵojn apud la flankoj de la fervojo. Ĝuste je la 17a ni transiras internacian ponteton super rivereto Zbucz. La trivagona trajno haltas: ni estas en sovetunio.

Emocio nin kaptas, ĉar laŭ la tiamaj ĉies-diroj ni venas en landon de "homoj kun tranĉilego inter la dentoj", en teruran landon, ege misfaman kaj timigan. Soveta policano anstataŭas la polan, interŝanĝante kun li cigaredon kaj manpremon.

La vagonaro daŭrigas ĉiam malrapidege kaj je la 17a kaj 10 haltas. Doganisto eniras la vagonaron: ni konfidas al li niajn pasportojn. Ni povas elvagoniĝi kaj eĉ devas mem elvagonigi niajn pakaĵojn kaj biciklojn. Baldaŭ ni alvenas en salonegon puregan, plenplenan de doganistoj kaj militistoj. Unu el tiuj zorgas pri ni. Elegante li estas vestita per kacia jako, belega nigra pantalono kaj plaĉe montras belegan revolverujon.

Kiel franco mi devas elmontri ĉiujn pakaĵojn, ĉiujn paperojn, eĉ la plej modestan. Paŭlo, kiel germano, ŝuldas nenion, nenion devas elmontri. (Ja mi memoras, ke, kelkajn monatojn antaŭe, la franca registaro ankoraŭ militis kontraŭ Sovetio, kiam okazis la mondfamaj ribeloj de francaj maristoj de la Nigra Maro.)

La muroj estas tegitaj per afiŝegoj kaj meze, en honora loko, la foto de LENINO - kiun en Okcidento oni propagandas kiel tre danĝeran banditon.

Unua mirego! Ne estas hotelo! Fervoja laboristo akceptas nin por loĝi ĉi tiun nokton en dometo, kies pureco estas "germana". Baldaŭ nia amiko komprenigas al ni, ke ni devas fruigi nian brakhorloĝon je unu horo. De nun, ju pli orienten ni iros, des pli ofte ni devos tion fari regule. Fine estas litkovrila "ceremonio" laŭ slava metodo: ni kuŝos apud fornego, sur speciale aranĝita "grunda planko", kie dum frosta nokto ni povos varmiĝi.

## **La 13an de oktobro 1928**

Apenaŭ ekster la vilaĝo ni aŭdas alparoli nin tri, kvar junajn soldatojn kaj subite tuta taĉmento nin ĉirkaŭas. La soldatoj estas ĉiuj vestitaj per longega mantelo (kapoto) dube flava; kaj unu el ili, kiu havas malgrandan triangulan insignon sur kolumo, petas niajn pasportojn.

Alia ega surprizo atendas nin: ni preskaŭ tuj konstatas, ke ne plu estas vojo! Eĉ ne tera vojeto. Kiel daŭrigi la bicikladon en tiaj kondiĉoj? Restas nur la fervojo kaj vole nevole ni estas devigataj laŭiri la fervojajn relojn, sur piedira vojeto, kiam ĝi ekzistas. Kiam ne? Tre malfacile... Kiel eble plej rapide ni informiĝas, kial ankoraŭ ne ekzistas vojoj en Ruslando. Respondo: "Ĉar ĝis nun ni ne bezonis! Ja tre baldaŭ kaj dum ses monatoj la tuta grundo frostiĝos kaj ni profitos de la vintro por vojaĝi; dum frostegoj eĉ riveregoj malmoliĝas kaj glitveturiloj transiras ĉie, eĉ pontojn ni ne plu bezonas!"

Mi substrekas, ke nur nordanoj tute komprenas ĉi tion; ĉar por ni, sudanoj, tio estas preskaŭ nekredbla.

Post 50 kilometroj da irado tra la fervojaj ŝpaloj mi jam ekpensis veturi per biciklo sur reloj, same kiel vagonaro. Nur post ĉ. unu jaro mia ideo estos sufiĉe matura, por ke mi efektivigu ĝin.

## **15an de oktobro 1928**

Neĝblovadas. Ni trovis rifuĝejon en dometo rande de la fervojo. Matene, kiam ni pretigas nin por foriri, nia gastiganto lokas niajn biciklojn sur platformon de vagono. Tiel dum du horoj skipo da fervojaj laboristoj veturigas nin, kaj nia promenado estas tre amuza, meze de la subneĝa kamparo, sub brilega suno kaj en la matena malvarnagono. Kiam alvenas trajno, tiam kun mirinde granda lerto cruj sinkrone flankenmetas la vagoneton. Min surprizas la sincera kamaradeco, kiu videble unuigas ĉiujn tiujn virojn. Ĉiuj ridas, ĉiuj estas kontentaj, malgraŭ la netaj aĝ-diferencoj. Je tri kilometroj de la proksima stacio la viroj eklaboras. Antaŭ ol foriri ni premas la manojn al ĉiuj kaj kantas al ili strofon de "La internacio" sub ilia unuanima aplaŭdado.

Ni decidis uzi la trajnon por trairi la subneĝan regionon. Ni devas atendi tutan tagon. Ĉirkaŭ la 23a, tre malrapide alvenas trajno. Envagoniĝi estas tre malfacila afero, ĉar vicumas homamaso, bone disciplinita. La rusaj vagonoj konsistas el granda kesto, kiu ruliĝas senskue kaj malrapide. La vagono estas larĝa, la benkoj estas el ligno, la plafono estas pli alta ol en Francio kaj anstataŭ pakaĵreto troviĝas alia tabulo, kie oni ankaŭ povas dormi. Krome la vagono estas bone hejtata. En ĉiu vagono konstante deĵoras kontrolisto, kiu rolas kiel gastiganto. Li kontrolas, li purigas, li gardas kaj policumas. Fine kaj ĉefe li avertas la vojaĝantojn, kiam ili devas elvagoniĝi. Efektive, en tiu grandega lando la vojaĝoj estas longegaj. Tial ĉiu vojaĝanto kunportas kun si sian dormmaterialon.

En ĉiu kupeo tuj regas inter la vojaĝantoj granda intimeco, nekonata en Francio. La Ruso estas pli komunikigema kaj ĉefe nepre pli sociema.

En la rusaj atendejoj estas ĉiam homamaso, homamaso da kamparanoj, kiuj kampadas sur la planko mem, ĉar, tial ke ĉiuj lokoj estas rezervitaj plurajn tagojn antaŭe kaj numeritaj, ili ofte atendas tre longtempe sian trajnon. La fervojo estas ja la ununura transportilo.

Mi renkontas viron, kiu laboris en Rive-de-Gier, kaj kiu klarigas al ni pri tio...

En BALTA akceptas nin la germana malplimulto el la loĝantaro. Ni tie gastas ĉe instruista familio, kies lernejon ni vizitas. Ĉio estas absolute pura kaj en ordo, tiel la domo kiel la klasĉambro. La meblaro estas tute nova kaj la klaso enhavas kvardekon da infanoj, ĉiuj relative bone vestitaj. Ĉiuj ekstaras ĉe nia alveno kaj la mastro klarigas al ili la celon de nia vizito. Iliaj vizaĝoj esprimas surprizon kaj scivolemon. La murojn ornamas mapoj. Super la mastra podio troviĝas la portreto de LENIN. Antaŭ ol fini la klason, ĉiuj infanoj kantas honore al ni folkloran kanton kaj la internacion. Post la foriro de la infanoj la instruisto montras al ni la lernolibrojn, kiuj estas en la germana kaj ĝenerale bone prizorgataj. La mastro klarigas, ke ĉiuj kursoj estas saturitaj de la leninista metodo. Mi eĉ vidas bildojn pri la Pariza Komunumo kaj pri scenoj de la insurekcio en Leningrado, antaŭ apenaŭ dek jaroj. Poste ni ofte trovos etnajn minoritatojn:

judajn germanojn, tartarojn, dissemitajn dise sur la soveta teritorio kaj konsistigantajn hermetikajn koloniojn kun siaj propraj moroj, sed vivantajn ĉiam en bonaj rilatoj kun siaj najbaroj sub la soveta regado.

Malgraŭ niaj vizoj, en ĉiu vilaĝo necesas amaso da formalajtoj por povi pluvojaĝi. Ĉiu distrikto estas pli-malpli administracie aŭtonoma kaj nian ĝeneralan vizon devas stampi ĉiu loka aŭtoritato, kio ege malfruigas nin.

Ni vizitas la urban foiron. Pro malbona rikolto la pano estas multekosta kaj krome porciumata (500 g. da pano ĉiutage por ĉiu persono). Sed ekzistas libera merkato: la porciumado estas strikte limigita al la urbaj laboristoj, en la kamparoj la vendado estas libera. Tiam en Francio la gazetaro aludis pri malsatego en tiuj regionoj.

Ni revenas al la stacidomo, antaŭ kiu jam staras multaj kamparanaj veturiletoj por la morgaŭa foiro. Kie tranoktos ĉiuj tiuj homoj? En ĉiu vilaĝo ekzistas "Kamparana Domo", kie ili povas senpage tranokti.

## **La 17an de oktobro 1928**

Post duontaga provo uzi tervojn, ni forlasas ilin kaj ruliĝas sur la vojeto laŭlonge de la fervojo. Ni renkontas germanajn koloniojn, vilaĝojn loĝatajn ĉefe de germanoj tie enmigrintaj foje de pluraj generacioj, sed kiuj konservis sian lingvon kaj siajn morojn. Tie oni akceptas nin pli malvarme ol ĉe la ukrainoj.

**La 19an de oktobro**, je la 16a, ni atingas pavimitan vojon kaj baldaŭ aperas la unuaj domoj, verdire, la unuaj ruinaĵoj de... ODESO.

-----

## **En ODESO**

Oni diras al mi, ke tiu ĉi kvartalo de ODESO estis ekdetruita de eksplodo en 1918 kaj findetruita fine de la Revolucio. Baldaŭ ĉirkaŭas nin homamaso kaj ni vikle disdonas niajn kartojn. Ne eblas antaŭeniri, tiom malhelpas nin la ĉirkaŭantaro. Nia ekipaĵaro estas ja rapide rimarkebla. Pli-malpli pene ni orientiĝas al la hejmo de nia

esperantista korespondanto AXELROD. Malgraŭ lia foresto, ni estis atendataj kaj oni lasas al ni la tempon iom tualeti, post transdonado de nia poŝtaro, la unua, kiun ni ricevas de post nia foriro el Döbeln. intertempe alvenas nia kamarado...

## **Sabate 20an de oktobro 1928**

Je la 6a niaj gastigantoj jam leviĝis por iri labori. Diskrete ili venis por fermi la fenestrojn, por ke ni plu dormu. Mi aŭdas la fajfadon de la trajnoj. La stacidomo ne estas malproksima. Baldaŭ alvenas k-do BULBAT, kiu gvidos nin tra la urbo post la matenmanĝo. Per mallarĝtraka trajno ni iras rekte al k-do TESSLER ĉe la alia ekstremaĝo de la urbo. La spuroj de la civila milito ĉiuloke aperas: duondetruitaj aŭ lepraj domoj, mis- aŭ nepavimitaj stratoj, nedifinebla konfuzo regas ĉion. Loĝkrizo, porciumado de pano, sukero, viando, kompreneble...

K-do T., kiu loĝas en subtegmento de iam bela domo, gvidas nin al la ŝtatpolicejo G.P.U. Kontraste kun la ofte ĉifonaj vestoj de la popolanoj, la polico kaj ĉefe la graduloj estas pli ol dece vestitaj: brile novaj kostumoj, bone ŝmiritaj botoj el flava led, ktp... Necesas atendi du horojn la restad-vizon en la urbo. Ĝi validas nur 4-5 tagojn. Elirinte, ni tuj vizitas la sport-federacion, kiu devas zorgi pri nia gastigado. Ankaŭ tie tuj ĉirkaŭas nin amaso da junaj sportuloj, avidaj vidi kaj aŭskulti nin.

T. gvidas nin al privataj gastigantoj por la manĝo. Sed antaŭe ni devas akiri panon ĉe paralela merkato, kio estas tre malfacila. Tiu porciumado estas komparebla al tiu, kiu okazis en Francio dum la milito 1914-18. En la gastigejo ni manĝas bonan supon, porkrostaĵon kaj frititajn terpomojn kontraŭ 40 kopekoj t.e. proksimume 6-7 tiamaĵ frankoj.

Al francparolanta beletristo mi petas impresojn pri la nova reĝimo. Li diras al mi, ke por la liberalaj profesioj, la meza klaso, estas pli malfacila vivo ol antaŭ la Revolucio, sed ke por la salajruloj, la etkampanoj, la vivkondiĉoj pliboniĝis. Post la manĝo, oni kondukas nin al nia loĝejo. Ni ne povas tuj loĝi en la celita botelo, ĉar kongresdelegitoj okupas ĉiujn ĉambrojn. La apudaj "burĝaj" domoj estas ĉiuj loĝataj de laboristaj familioj. Pro la detruoj

kaŭzitaĵ de la civila milito la loĝ-krizo estas akuta, ne nur ĉi tie sed ankaŭ en la tuta Sovetio.

La senlaboruloj estas malmulte helpataj. Tiu socikategorio estas vere malfeliĉa. K-do T., kiu estas mem senlaborulo, konfesas al mi, ke ne ĉiutage li povas satmanĝi.

Reveninte ĉe k-do AXELROD, mi provas sintezi la ricevitajn impresojn:

Estas belaj domoj, belaj, rektaj stratoj kun belaj arboj, ankaŭ belaj monumentoj, granda teatrejo, sed super ĉio plu ŝvebas la ombro de la civila milito. La urbo estas ankoraŭ konfuzita pro la freŝdataĵ eventoj kaj mi havas la impreson, ke ĝi serĉas elirejon, ion nedifineblan... Jam naskiĝis kelkaj belaj novaj domoj. Oni unue riparis la preĝejojn - kiu kredus tion en Francio? - kaj kelkaj aspektas tute novaj. Ĉefe viroj vizitas ilin. Sur la stratoj svarmas nenombreblaj ĉevalveturiletoj kaj multaj bicikloj. Estas kelkaj motorcikloj sed malmultaj aŭtoj. Ĝenerale la stratpavimo estas malbona.

Svarmas la "klubejoj", kie sidas la multegaj urbaj societoj. Malmultas la trinkejoj. Sur la stratoj abundas la uniformoj kaj en la nokta duonombro aperas eĉ ĉiesulinoj. Tiam en Francio oni diris, ke en Sovetio oni kontraŭas la prostituadon. Fakte ĝi plu ekzistas kaŝe. Nur la privataj butikoj estas lumigataj. Ankaŭ la kinejoj, kiuj malfermiĝas ĉefe semajnfine.

## **Dimanĉe 21an de oktobro 1928**

En la belega salono de la "Internacia Klubo" ni retrovas la k-dojn kaj ĉeestas kunvenon. Regas rimarkinda disciplino. La oratoroj sinsekvas ĉiun duan aŭ trian minuton. La demandoj estas metitaj sur slipetoj, alportitaj al la kunsid-prezidanto. Ni klarigas la celojn de nia vojaĝo.

Oni longe aplaŭdas nin kaj niaj kartoj vendiĝas en entuziasma etoso. Tuj sekvas senpaga kiu-prezentado. La temo estas: "Faŝismo kaj la rimedoj por ĝin kontraŭbatali". La filmo estas subtitolita en la germana (oni memoru pri la ekzisto de multaj germanaj grupoj en tiu regiono).

Vespere, ĉirkaŭ la 23a, ni revenas piede kaj 1a k-do, kiu akompanas nin, aĉetas manĝaĵon en ankoraŭ malfermita kooperativa magazeno. Li pagas per kupono. Mi miras... Li klarigas, ke temas pri tie kutima interŝanĝilo. Oni aĉetas - kredite, se necese - tiujn kuponarojn, kiuj validas en ĉiuj regionaj kooperativaj magazenoj.

## **Lunde, 22an de oktobro**

Ni iras al G.P.U. por akiri niajn pasportojn. Tiel, en ĉiuj urboj, kiujn ni trairos, ni devos tuj deponi niajn pasportojn al la polico, kiu, post senfinaj klopodoj, konsentos aŭ rifuzos al ni la restadpermeson, kio trudos al ni mirindajn diplomataĵojn por daŭrigi nian vojaĝon. Ni perdos multe da tempo ankaŭ por akiri la ĉiutagan "loĝbileton".

Ni vizitas la gazeton IZVESTIA por presigi aliajn kartojn; sed necesas mem malkovri kaj alporti la paperon!

Dank' al niaj esperantistaj k-doj, kiuj akiras por ni ankaŭ littukojn, ni povos tranokti en luksega hotelo: unua etaĝo por la politikaj aŭ sindikataj eminentuloj, la dua por la laboristoj.

Ni vizitas la "Klubon de la Domservistoj", kie nia k-do T. gvidas sian unuan esperanto-lecionon. Oni tre frate akceptas nin. La kurso konsistas el trideko da lernantoj, ĉiuj junaj. Sur la muro, murgazeto kritikis per karikaturaj tro malfruan horon de la kino (22a), ekspozicio el tutmondaj revuoj kaj gazetoj klarigas la celojn kaj rimedojn de Esperanto. Fine de la kurso, oni starigas kurskomitaton, ĉefe por respektigi minimuman disciplinon. Post niaj paroladetoj la ĉeestantaro insiste petas, ke ni vizitu la artan salonon de la Klubo. Imagu unu el la plej belaj scenejoj de Parizo: vastega salono, tute brila nova. e la muroj la grandaj portretoj de la ĉefaj gvidantoj de la Revolucio. Tabela, kun azenkapo fumanta pipon: "Estas malpermesate fumi" kaj tiu azeno rikane respondas: "Sed ja fumas mil". Tio estas okulfrapa kaj komika. Sur la scenejo tre junaj geknaboj provludas teatraĵon.

## Marde 23an de oktobro 1928

Ni vizitas la distrikt-komitaton de la junaj Komunistoj. Tie oni klarigas al ni

- ke estas du specoj de pano pro la deficitaj rikoltoj.
- pri la bonstato de la preĝejoj: Estas ankoraŭ multaj "fideluloj", kiuj donacas en la monkoklektadoj kaj ankaŭ kaŝita eksterlanda helpo. La ŝtato helpas nur kiam temas pri preĝejoj transformitaj en klubojn.
- ke oni ricevas salajron laŭ siaj kapabloj; tial la salajroj povas varii de 50 ĝis 500 rubloj ĉiumonate. Kompartiano ne povas ricevi pli altan salajron ol tiun fiksitan de la organizoj. Pri tio oni aparte patentas. Por egala laboro la virinoj ricevas salajron egalan al tiu de la viroj.
- ke ekzistas solidarkasoj, ĉefe por la maljunuloj kaj la junsaskintinoj; la junsaskitoj ricevas senpagan vestaĵaron.
- ke la bicikloj estas multekostaj, tial ke estas preskaŭ neniu biciklo-fabriko en Sovetio; ke la industrio havas pli urĝajn taskojn, ankaŭ estas pli urĝaj aferoj por importi. ke estas senlaboreco pro manko de kreditoj por rekonstrui aŭ krei entreprenojn.

Ni vizitas la "Infanvilaĝon". Pri tio mi multe legis en Francio, sed mi konfesas, ke mi tamen estas surprizita. Imagu tutan vilaĝon, kun ties domoj, stratoj, ties klubo kaj lernejoj; ĉio estas tre pura sed iom mizeraspekta. Oni vizitigas al ni la klubon, la laborejojn, la manĝejon, la dormejon, la distrejojn kaj fine la skriboĉambron de la Direktoro. La plenkreskula personaro estas kiel eble plej malmultenombra: estas 200-300 infanoj kaj nur dudeko da plenkreskuloj. Ĉio farebla de la infanoj estas lasita al ilia - gvidata - iniciatemo. Tiel ili estas panbakistoj, kuiristoj, ili lavas kaj purigas la domojn kaj la stratojn ktp. En la lernejo kaj en la manĝejo ambaŭ seksoj estas miksitaj kaj sidas sur sama benko. Nur en la dormejo ili estas apartigitaj. Ni eniris hazarde en ĉambrojn sen plenkreskuloj. Tie regis admirinda silento kaj disciplino. Tuj tradukitaj de nia kamarado, jen la demandoj, kiujn metis la infanoj : Ĉu en Francio la riĉuloj kaj la malriĉuloj frekventas saman lernejon? Ĉu la instruisto estas kamarado kiel ĉi tie? Ĉu estas grupoj de pioniroj?

Oni ricevas ia impreson pri frua matureco ĉe tiuj infanoj. Ni vizitas diversajn laborejojn... Jen la horo de la vespermanĝo. Oni kondukas nin al la manĝejo. La ĉefan laboron kaj diskretan kontroladon faras 2-3 viroj, kiuj ekservas la porciojn, sed lasante la pladojn sur la tablo, lasas la infanojn daŭrigi la memservadon. La infanoj invitas nin manĝi kun ili. Poste la direktoro vizitigas al ni la porknabinan dormejon. Modestaj sed perfekte puraj, tiuj vicoj da blankaj litetoj! Perfekta ordo regas, la libroj estas zorge orditaj en individuaj mebletoj kaj ĉiuj litoj estas kovritaj per blankega ŝirmotuko.

Ni fine subskribas la libron de la vizitantoj, kun ĉies impresoj, eĉ en la franca. Ni skribas kelkajn vortojn en esperanto, kompreneble. Siavice la geknaboj subskribas mian vojaĝlibreton kaj nia k-do T. enskribas siajn bondezirojn pri la sukceso de nia "mondvojaĝo".

\* \*  
\*

Foririnte el Odeso, ni celas la havenon NOVOROSSISK ĉe la Nigra Maro. Efektive, de tie ni ŝatus iri al Baku, tra Tifliso, por atingi Teheranon kaj la vojon al Hindio. Nian vojon de Odeso ĝis Novorossisk signas pluraj memorindaj incidentoj. Jen la unua: Kiam ni foriris de Odeso, grupo el 5-6 entuziasmaj gejunuloj decidis iom akompani nin. Fakte, la junulinoj ne preterpasis la ĉirkaŭurbon. Restis kun ni nur la juna Mikaelo kaj unu el liaj kamaradoj, kiuj komencis lerni esperanton kaj la biciklo-sporton.

Ni ĝoje biciklis dudekon da kilometroj, laŭirante la randon de la Nigra Maro, pli-malpli proksime de la strando, sur stepa grundo: jen sabloplena, jen preskaŭ dezerta, kie kreskas nur veproj. Neniu arbo, neniom da ombro, neniu verdaĵo, krom ĉe la elfluejo de marrandaj riveretoj, kiujn ni devis travadi, kompreneble.

Malrapide sed nerezisteble la vintra suno, belega suno, leviĝis en la ĉielo. Ni estis foririntaj preskaŭ nemanĝinte kaj la trabiciklado de la stepo ne estas tre saniga promenado, ĉar seka kaj pika vento ofte pelis tiujn aĉajn veprojn en niajn radojn.

Ni ekiris je la tagiĝo. subite, je la 8a kaj duono, alarmo, unu el niaj akompanantoj eksvenas, preskaŭ falas pro sinkopo. Ĉe la

horizonto, nenio: dekstre la maro vere blua kaj kvieta, aliloke, ĉie la monotona kaj malgastigema stepo. Ni haltas kaj mi trinkigas al li kelkajn akvogutojn el mia ladbotelo. Diskutado, interkonsiliĝo: evidentiĝas, ke ĉiu precipe malsatas, sed ke ni havas nenion por manĝi. Facile komprenebla la kialo: ĉio estas porciumata.

Fine, totala paneo. Ne plu da "karburajo", ne plu da homoj. Eĉ Paŭlo malvolontas kaj montras laciĝon post du horoj da biciklado. Kion fari? Aperas, ke mi estas la plej fortika. Mi do devos senpaneigi ĉiujn. Oni decidas, ke mi plu antaŭeniru ĝis mi trovos helpon.

Tio estis farita. Feliĉe, ke ĉe la horizonto terfaldo aŭ duno kaŝis al ni la elfluejon de rivereto. Kaj ja rivereto estas akvo, do vivo. Post duonhora biciklado mi atingas tiun rivereton, ĉe kiu tute nature mi malkovras fiŝistan vilaĝon kaj en tiu vilaĝo gastejon (tre malofita afero en tiuj regionoj kaj en tiu periodo de persekutado kontraŭ la "kulakoj", t.e. la mezaj klasoj de la malnova reĝimo).

Pli-malpli malbone mi komprenigas min kaj kontraŭ pago sukcesas akiri 3 aŭ 4 savantajn sandviĉojn, kun "kvaso" - tritikvino. Mi retroiras kun plenplene ŝarĝita biciklo, kun krome miaj pezegaj propraj pakaĵoj.

Sub senkompate brilega suno miaj 3-4 kunuloj espere atendas min. Fervore kaj ĝoje la tuta trupo akceptis la manĝeton. Post tiu trudita halto, kvazaŭ lude ni atingis la sav-gastejon. La tuta vilaĝanaro estis tie por nin akcepti. Niaj ukrainaj amikoj decidis forlasi nin tie, sed, antaŭ ol foriri, ili mendis improvizitan manĝon.

Amikoj miaj, kia manĝo! (kalkule kun la epoko kaj la loko!) Ĝi okazis en la salonego de la gastejo, vid-al-vide al la maro. Ĉiuj tabloj estis plenaj. En la menuo: almanĝaĵoj, marfruktoj, ĉefmanĝaĵo: omleto kun lardo kaj aromherboj, ĉio spicita per paprikoj kaj kukumoj kaj akompanata - jes! - **per bonegaj blankaj kaj ruĝaj vinoj tiuregionaj!**

Image, mi tuj troviĝis en mia bela suda lando. Nenio mankis: bela vetero, ideale verdblua maro, brilega suno, eksteriĝanta etoso de la gaskonoj aŭ sudlandanoj, kantoj, folkloraj dancoj, kaj... belaj servistinoj indaj je romano de DUMAS. Kvankam mi perdis mian notlibreton, 40 jarojn poste mi konservas pri tio neforigeblan

memoraĵon. Neniu nuboj. Ho, mirinda slava gastamo, homa frateco! Estis ja en tiu salono, krom ni, franco, germano, judoj, rusoj, ukrainoj kaj lokaj indiĝenoj, fiŝistoj, vinistoj, migrantoj k.a.

Sed ĉio havas finon kaj ni devis adiaŭi. Niaj kamaradoj reiris lerte al Odeso kaj ni, kun sufiĉe pezaj stomakoj, al Dniepro kaj Krimeo.

Noto: Mi poste eksciis, ke nia k-do Mikaelo, kiu akompanis nin ekde Odeso, kelkajn monatojn poste komencis mem la ĉirkaŭbicikladon de Sovetio.

-----

Pri Nikolajev du memoraĵoj elstaras: senfina boatponto, mast-arbaro, uzinoj kun fumantaj kamenoj kaj la renkontiĝo (dank' al la esperantistoj) kun veterano el la krimea milito inter la blanka kaj ruĝa armeoj.

Tiu ĉi estas kuracisto, junulo 25-30-jara, kiu iom parolas la francan. Li rakontas al mi la lastan batalon de la revolucio, okazintan en istmo de Perekop, kiu ligas Krimeon al la kontinento. La blanka armeo estis pelita al la maro far la ruĝa armeo kaj la obstinega batalo okazis preskaŭ nur en la akvo.

Tiam tiu kuracisto estis ordinara laboristo kaj partiano. Li estis citita kaj rimarkita pro siaj brilaj faroj kaj tuj post la fino de l' milito li eniris en fakultaton por lerni medicinon, ĉar en tiu epoko granda parto el la rusa elito estis detruita aŭ ekzilita kaj tial la revolucio tuj favoris en siaj vicoj la kreiĝon de nova elitaro: scienculoj, inĝenieroj, agronomoj, k.c.

Elirinte el Kherson, ni tuj celis rekte la istmon de Perekop. Fakte, kiam ni atingis ĝin, se oni ne estus nin avertintaj, ni verŝajne eĉ ne provus trapasi. Efektive, en sia plej mallarĝa parto ĝi konsistas en tiu sezono el apenaŭ 100 metrojn larĝa rubando el sablo pli-malpli moviĝema. Maro, ĉielo kaj sablo konsistigas la kampon de la batalo, kiu okazis tie 7-8 jarojn antaŭe. Ni mem, kun niaj peze ŝarĝitaj bicikloj, devis vadadi pli ol du horojn por sukcesi trairi kaj eliri el tiu nefirma pasejo.

Elirinte el la istmo, ni malkovris spuron de tervojo por karavanoj. Tie la dezerto kaj la bestaj ostaroj blankigitaj kaj poluritaj far la rabbestoj atestas pri la sekeco de la regiono. Ni povis antaŭeniri nur kelkajn centojn da metroj hore en tiu moviĝema sablo. Feliĉe por ni, alvenis ĉaristo, kiu konsentis, ke ni ligu niajn biciklojn malantaŭ lia ĉaro, kiu posttrenis nin dekkvin kilometrojn.

Tiu viro tuj vidis, ke ni estas fremduloj kaj rapide li kompreniĝis al mi, ke mi estas bonŝanculo: sur la sama vojo, je proksimume 40 kilometroj, troviĝas gastejo mastrumata de francino. Mi ege penis por kompreni liajn klarigojn, sed mia surprizo egalas mian ĝojon alveni en lokon, kie mi povos paroli kaj peti informojn libere kaj facile.

Tamen, tiel aĉa estis la stato de la tervojo, ke ni povis atingi la celon nur la postan tagon ĉirkaŭ tagmezo sub brilega suno. (Ni estis fine de oktobro).

Efektive, la tervojo fariĝis pli uzebla kaj pli oftaj la vilaĝoj. Jen, ĉirkaŭ tagmezo, ni atingas vilaĝon nomitan (mi kredas) Armyansk. Ne eblas erari: sur la publika placo, ĉe la rando mem de la vojo, la plej bela domo. Jen estas tie. Estus malfacile diri, kiu, ĉu nia gastigantino, ĉu mi, estis plej surprizita. Post akcepto komence malvarma, ŝi rakontis al mi sian historion. Ŝi estas 40-50-jara, bela virino. Ŝia edzo posedis antaŭ la revolucio en tiu regiono belan kaj vastan bienon, kie troviĝis krom la ĉefa muelejo el la regiono, ankaŭ multaj farmoj kaj la domo, kie ni estas. Tiu domo estis oazo, ĉevalŝanĝejo, gastejo, tial ke en 50-kilometra ĉirkaŭo nur ĝi posedas neelĉerpeblan puton el trinkebla akvo. Imagu la valoron de tia trezoro, dum la malmultaj aliaj akvoputoj en la regiono liveras nur salgustan pli-malpli kotplenan akvon!

La revolucio lasis al ŝi nur tiun domon kaj la valoregan puton. La nova reĝimo permesas al ŝi zorgi pri sia antaŭa afero: akvo, ĉevalejo, dormoĉambroj ktp... Ŝia eksedzo vivas en unu el la antaŭaj farmoj...

Post unu nokto sub ŝia tegmento ni ree ekiris. Celo: SIMFEROPOL, administra ĉefurbo de Krimeo.

Kvankam ege difektita, la vojo de la karavanoj ekzistis. De tempo al tempo ni trovis jen petroldukton, jen embrion de konstruata fervojo. La lando: stepo, dezerto, suno, sablo, blankiĝintaj ostaroj, monotona ebena regiono, sed ankaŭ la danĝero de malfirma sablo, ĉefe kiam necesis trairi la malmultajn riveretojn.

Ni tamen renkontis kampadejon de riĉaj nomadoj kaj du ĉasantojn. Unu parolis la francan. Li rakontis al mi, ke ili estas du eksaj uzinposedantoj, restis direktoroj, sed, bone salajrataj, ne plu havas la antaŭajn zorgojn. Kiel ĉiuj salajruloj ili ĝuas feriojn kaj eĉ ĵipon, per kiu ili povas sin dediĉi al ĉasado.

Baldaŭ ĉe la horizonto aperis nekutima preĝejturo: minareto. Efektive, la praloĝantaro de Simferopol estis muzulmana. Konfirmas tion la burnusoj, kiujn ni baldaŭ renkontis. Tiam, Simferopol estis vilaĝeto premita de la suno. Tamen ni trovis tie indiĝenajn kaj rusajn esperantistojn.

La manĝoj - tion mi plej bone memoras - konsistis ĉefe el fritiĝoj. Efektive, sunfloro kaj tabako estas, kun vito, la ĉefaj riĉaĝoj de la fekundaj valoj. Tiam oni tie manĝis ankaŭ paprikofruktojn kaj tomatojn.

Ni devis trairi Simferopolon por plenumi la neeviteblajn administraciajn formalizaĵojn, kiuj postulis 2-3-tagan halton. De tie ni celis Sebastopolon. subite, la pejzaĝo ŝanĝiĝis kvazaŭ pro frapo de feina stango. La vojo fariĝis pavimita, borderita de belaj arboj same kiel en la Marsejla regiono. La olivarbo kaj la vito alkroĉiĝas al la flankoj de l' montetoj fronte al la maro. Ni malsuprenbiciklis senfinan deklivon kaj... subite aperas sub niaj okuloj la haveno, flag- kaj florornamita, kvazaŭ estus festega tago. Ĉiujn boatojn - kaj ili estas multegaj - ornamas ŝnuregoj, sub kiuj pendas miriadoj da flagetoj kaj lampetoj. La maro estas helblua, la urbo ĉe niaj piedoj aspektas multe malpli detruita ol Odeso. Vilaĝoj, kiel en Francio, kroĉiĝas al la montetaj flankoj kaj laŭlonge de la vojo.

Kiel kutime, atendis nin esperantistoj, kies delegito nomiĝis sinjoro Chapiro. La ĉefaj klubestroj estis virinoj kaj fraŭlinoj kaj inter ili, eksedzino de "nobelulo". Por pluvivi ŝi honeste komercis siajn logaĵojn, kvankam ŝi flue scipovis la francan, la germanan, la rusan,

kaj kompreneble, esperanton. Mistero de la homa destino kaj postrevolucia dekadenco?

Ni vizitis la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon, interalie la panoramon de la fama sieĝo de Mac-Mahon. cirkloforma muzeo staras meze de la batalkampoj. Tie grandegaj freskoj pripentras epizodon de tiu batalo, kio al mi, franco, faris memorindan impreson.

(...) Ni forlasis Sebastopolon per kornica vojo preskaŭ ĉiam laŭlonge de la maro. Unuan kaj lastan fojon en Sovetio mi trovas veran ŝoseon, ponton, sume "francan" vojon, kaj eĉ - ho kulmino de l' komforto! - proksime de Jalta, gudritajn ŝoseojn. Jalta kaj ties tutapuda regiono estas la rusa Lazura Marbordo. Antaŭ la revolucio, Jalta estis la rendevuejo de la rusa aristokrataro, kiu lasis tie belegajn vilaojn, palacojn, kazinojn. La soveta ŝtato transformis ĝin en ripozejon por la sovetaj laboristoj kaj eĉ por ia "elito" el fremdaj laboristoj. Tial nun frekventas ĉiujn tiujn palacojn kaj ties parkojn amaso da popolanoj rekoneblaj pro siaj naciaj kostumoj sur la strato kaj pro sia haŭto sur la strando ankoraŭ vizitata en tiu sezono. Nur mallongegan restadon ni havos en tiu ĉi rava loko, ĉar ni ŝatus transiri Kaŭkazon antaŭ la severa vintro.

Unu el la plej mirindaj aventuroj de mia tuta vojaĝo ni estis travivontaj la morgaŭon. Ĉirkaŭ la 15a, la postan tagon, ni surŝipiĝis kun niaj bicikloj, sub la huraoj de amaso da gapemuloj. Principe la vojaĝo devus daŭri unu horon, ĉar la markolo estas mallarĝa, ĉirkaŭ IO-kilometra. Ni ĵus forlasis la bordon, kiam nin trafis tempesto. Ni estis manĝantaj en la manĝokajuto. Neniam en mia vivo mi suferis tian marmalsanon, ke la ŝipistoj devis transporti min sur la ferdekon sur ŝnuramason, kie mi povis "komforte" vomadi kaj tordiĝi. Dume, Paŭlo, ne sentema al marmalsano, plu diskutadis kaj fumadis kun la ŝipanaro. Spite miajn neelteneblajn singultojn, mi havis la forton observi kaj ĝui la tutan poezion de la malbridita likva elemento. La ferdekon vere mergis akvomontoj, kiuj estus min forportintaj, se mi ne estus droninta funde de dika ŝnurvolvaĝo. Mi estis ĉe la kapo de la ŝipaĉo kaj mi nete sentis la egajn ondojn, kiujn fendis la steveno. Kompreneble, mi dronis en salakvaj banoj kaj la ŝipistoj komprenigis al mi, ke - eble paradokse - la ferdeko estas la plej taŭga parto de l' ŝipo por rezisti la marmalsanon.

Pro la tempesto la vojaĝo daŭris pli longe ol antaŭvidite, sed fine, ĉirkaŭ la 17a, ni elŝipiĝis ĉe la ekstremaĵo de sabloplena kaj senhoma duoninsulo, kiun tute trabalais la marŝaŭmo. Mi estis en kompatinda stato kaj restis al ni apenaŭ unu horo da taghelo por atingi la plej proksiman vilaĝon.

Tute same kiel en la Perekop-markolo, ni biciklis en "luneca" pejzaĝo: akvo, sablo, nebulo, orientiĝante hazarde meze de lageto kaj de sablomontetoj. Kroma malbonŝanco: maldense ekpluvis kaj fine elirinte el la sablo ni atingis argilecan stepon, sur kiu ni ne povis rapide antaŭeniri. Baldaŭ ni devis eĉ piediri, tiel gluiĝema fariĝis la koto... La nebulo, la pluvo, la noktiĝo, kaj nenio, neniue vilaĝspuro antaŭ ni. Fine malhela nokto falis meze de la pluvo - ja, pluvego! Ne eblis plu iri kun niaj bicikloj. Cetere, kien iri? Nur la vojtruo montris, ke ni troviĝas sur vojo. Neniu stelo, neniue lumo, nur akvo, koto, inkonigra nokto, feliĉe relative varmeta. Kun mia kamarado Paŭlo ni interkonsiliĝis. Plian fojon, malgraŭ la marmalsanaj sekvoj, ni decidis, ke mi ekiros explore, lasante Paŭlon kun la du neuzebraj bicikloj.

Jen sub la pluvo mi ekiras, gvidate nur. de la kavoj kaj fosaĵoj de la pado. Paŭlo konservis la elektran lampon por eventuale gvidosigni sin. Post proksimume unu horo da marŝado, mi fine ekvidas briletantan lumon. Baldaŭ haltigas min la hurlado de tri aŭ kvar hundoj, kiuj, (feliĉe!) ŝnuritaj, tamen sukcesis alarmi. signallampo truas la malhelon kaj mallonge lumigas blankajn murojn. Provante superi la bojadon de l' hundoj kaj la bruon de l' ŝtormo, mi ekkriegas. Tiel neatendita alveno en tia horo kaj en tia sezono nepre devis alarmi la plej kuraĝan. Tiu ĉi revenis al la domo kaj eliris denove kelkajn minutojn poste, akompane de 3 aŭ 4 fortikuloj kun lampoj. Tiel mi estis elakvigita, bloko el koto kaj ŝvito meze de la ŝlimo. Miaj savantoj kondukis min en grandegan kuirĉambron bone hejtatan, kie tuj ĉirkaŭis min 10-15 infanoj kaj samtiom da plenkreskuloj... Kompreneble ili tuj konstatis, ke mi estas fremdulo, kaj, antaŭ ajna senutila parolo, ili donis al mi akvon por ke mi lavu min, pantalonon kaj sekan ĉemizon. Nur poste okazis la klarigado. Mi tuj diru, ke mi algrundiĝis en kolĥozo, aŭ kolektiva farmbieno. Mi ekparolis en la franca, vane, poste kelkajn germanajn vortojn, ankoraŭ pli vane. Mi ekvidis infanon kun ardezo kaj krajono

kaj komencis klarigi per desegnoj, tute nature en esperanto. Tiam, ho miraklo! mirindaĵo de la internacia lingvo, infano alproksimiĝas kaj demandas min per rudimenta sed ĝusta esperanto. Ekde tiam fariĝis tre facile por komprenigi al tiuj afabluloj la situacion de Paŭlo kaj de niaj bicikloj. (...) Kiel tiuj infanoj lernis esperanton? Tutsimple en la lernejo, kie propravole instruantoj gvidis kurson kaj disdonis librojn al ili.

Necesis parto de la morgaŭa mateno por purigi niajn biciklojn, niajn pakojn kaj ĉion rekontroli. Antaŭ nia foriro, la plenkreskuloj, ĉefe kelkaj patrinoj, provizis nin per pano, lakto, butero ktp... por ke ni daŭrigu nian vojaĝon, nun relative mallongan: nur kvardekon da kilometroj.

Feliĉe, la vetero refariĝis ideale bela, ĉar la lasta etapo estis unu el la plej penigaj. Ni devis ja trairi montaron, kie vojo ekzistas nur en la imago. Tamen, meze de la montaro ni trovis terajistojn ĝin konstruantajn. Tuj kiam ni alvenis en NOVOROSSISK leviĝis komplikaj problemoj: unue la pluvalidigo de nia restadpermeso kaj vizo por Kaŭkazio. Efektive, ĉiu respubliko estas pli-malpli aŭtonoma kaj do libera konsenti aŭ rifuzi la vizojn.

Sekve de tio, mia kamarado Paŭlo kaj mi devos disiĝi'. Paŭlo rajtos daŭrigi ĝis Tiflis kaj Baku, dum mi devos iri al Moskvo por revalidigi mian pasporton, kio trudos al mi neplanitan vojaĝon.

Longajn jarojn poste (en 1933), post mia reveno en Francio, mi renkontis Paŭlon tute hazarde en Tuluzo (suda de Francio). Li do sukcesis iri en Iranon, meze de vintro. Tie li suferis gravajn perniojn ĉe la piedoj pro frostoj, kaj oni devis lin hospitaligi. Li tamen sukcesis bicikli ĉirkaŭ Mediteraneo, trans Alĝerio, Maroko kaj Hispanio. En 1933, li malrapide revenis hejmen.



## La 6an de februaro 1929

Je la 7a kaj duono, mi provas ekiri direkte al Tifliso. La' vetero estas relative varmeta kaj malseka. Sed post apenaŭ kelkaj kilometroj mi trovas glaciigintan vojon, kiu ofte faligas min. Mi tamen plu biciklas kaj feliĉe atingas sunplenan regionon, kie fandiĝis la glacio. Belega estas la pejzaĝo: maldekstre, la brilegantaj neĝokovritaj montpintoj, dekstre, kvietega bluverda maro surradiata de la leviĝanta suno. Posttagmeze, post la vilaĝo Gelengick, la pejzaĝo subite ŝanĝiĝas. Forlasinte la maron, mi trovas komence glacipluvon, pli fortan malvarmon kaj fine neĝon... Je la 15a la neĝtavolo atingas la nivelon de la radaksoj kaj kovras la glaciigintan vojon, kiu pli kaj pli krutiĝas. Mi devas nun piediri. Baldaŭ ĉio malaperas sub la neĝtavolo; malvarmegas, mi ŝvitegas, la nokto alvenas, ankoraŭ pli furiozas la neĝblovado, neniŭ bruoj, neniŭ ŝirmejoj. Mi padelas en la neĝo ĝis la kokso kaj miaj piedoj iĝas malvarmegaj. Mi komprenas, ke mi ne plu povas antaŭeniri kaj ke estas preferinde la restantan forton uzi por retroiri.

La vojo estas tiel glitiga, ke, por eliri el tiu neĝo, eĉ malsuprenirante, mi devas preskaŭ tiom peni, kvazaŭ mi grimpus. Mi eĉ ekpensas forlasi surloke la biciklon por pli facile elsaviĝi. Ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj, post vojkurbiĝo, mi ekvidas ĉareton de kamparano kaj tiu ĉi kolektas lignon. Mi retrovas kuraĝon, revenas al la biciklo, kaj fine atingas la ĉaron, kie du aliaj kamparanoj atendas min. Ili ja bone komprenas, ke mi petas ilian helpon. La biciklon kaj min mem ili metas sur la ĉaron kaj ni revenas al Gelengick, kiun ni atingas en plena nokto, dum ĉesis la neĝblovado.

Post tranoktado ĉe la kamparanoj, mi petas de ili helpe de vortaro konsilon pri la vojo sekvota. Ili komprenigas, ke nun la montaro restos neĝoplena dum almenaŭ du monatoj, ke mi ne povos transpasi, do ke estas pli prudente, ke mi revenu al Novorossisk. (...) je la 13a mi estas ĉe k-do Mialet, kiun mia reveno

tute ne surprizas. Efektive, la tutan tagon la vetero estas aĉega, la vento, la fama "Nordost", kaj la neĝo aperas.

Ni devas viziti la oficejon de la fremduloj, kie vole nevole oni plu validigas mian vizon je kelkaj tagoj. Same, oni repromesas al mi loĝlokon kaj manĝon ĉe mia antaŭa loĝejo, lernejo por junaj homoj. Oni kondukas min al la Sindikata Unuiĝo por peti laboron. En la ĉambrego jam 200 senlaboruloj atendas, kio pensigas min, ke ankaŭ mi devos sufiĉe longe atendi laboron. Fakte, nur morgaŭ oni povos definitive respondi al mi.

### **Vendredon 7an de februaro 1929**

Oni aludas pri laboro por mi kiel lignaĵisto en Autopromptorg (kie oni produktas kaj riparas veturilan materialon). Plej malfacile estas akiri sindikatan karton, kiu, ĉi tie, solvas multajn formalizaĵojn kaj havigas rajtojn nekonatajn en Francio, nome rabaton en la trajnoj, la spektakloj, avantaĝojn okaze de malsano, senlaboro ktp... Kune kun la karto oni donas al mi 3 rublojn... Kompreneble, ĉio ĉi ne multe plaĉas al mi, sed tio ebligas al mi pacienci kaj ne tro pensi pri la malvarmo (inter -16° kaj -18°). La tuta haveno estas blokita per la glacio, kiun kovras neĝotapiŝo. Pluraj ŝipoj estas tiel senmovigitaj en la glacio. (...)

De la 12a de februaro mi laboras en Autopromptorg. La laboro - nova por mi - interesas min: kiel lignaĵisto mi zorgas pri aranĝado kaj karoserioj de aŭtobusoj.

### **Dimanĉon 7an de aprilo 1929**

Hodiaŭ estas "granda" tago por mi post sufiĉe intensa semajno. Hodiaŭ, ricevinte mian salajron, mi forlasis la laborejon. Mi lastfoje vizitis miajn esperantistajn k-dojn Antipov kaj Kagnebski. K-do A. volis, ke junulino akompanu min kaj tiucele prezentis du aŭ tri al mi. Tio estis ĉefe frivola preteksto por tre agrabla familia vespero montranta aspekton de la rusa gastamo, ĉar, kompreneble, oni amuziĝis kaj dancis.

Por forlasi Novorossiskon mi nepre devas uzi la trajnon, ĉar estas multaj tuneloj kaj nur la fervojo ebligas trairi ilin. Je la 13a kaj 30 la trajno alvenas tiel rapide, ke mi havas apenaŭ tempon por

adiaŭ k-don K., la fidelan amikon Kapustin Paŭlo. Je 15.45 la trajno atingas Krinskayz, kie mi reakiras mian biciklon kaj miajn pakojn. La suno estas belega. Tial mi sopiras al biciklado post tiuj monatoj da senageco. La biciklo funkcias kiel ludilo kaj ebena estas la vojeto, kiu laŭas la trakon. Fora celo: EKATERINODAR - STALINGRAD. Proksima celo: KRASNODAR. Nura vojo: la fervojo. Aliaj vojoj? Ne ekzistas! Foje vojspuroj uzataj de la kamparanoj por loka, surtera "trampado", sekvas la fervojon, sed remas pri sennomaj marĉoj en la nuna sezono. La suno brilas. La vento favoras min, facilas la vojo... Mi rapidas. Je 18.30 mi atingas la stacion de Lunelnaja. Fore malantaŭ mi, la montaro dronas en la ruĝa incendio de la sunsubiro. Mirinda!... Adiaŭ Novorossisk!...

Ĉi-nokte fervoja noktogardisto gastigas min kaj rilatigas min kun la esperantista k-do MIRON, ĉe kiu mi estas entuziasme akceptita: teo, babiladoj, freŝa pano, teatra vespero, kamparana ĉeestantaro, almenaŭ 100 personoj t.e. preskaŭ la tuta loĝantaro de la vilaĝo.

Noto: Vole nevole, nun kaj dum tuta jaro, mi sekvos la fervojan trakon ĝis VLADIVOSTOKO kaj mi vivos la vivon de la sovetiaj fervojistoj. Jam mi ekprojektas ruliĝi sur la reloj. En la nuna momento mi provos transformi kaj modifi la etajn aparatojn, kiujn mi elpensis kaj muntis por malhelpi la blokadon de la radoj per la koto. Sed jam de nun ekĝermas en mi la ideo ruliĝi sur la reloj, tial ĉar la tervojtoj estas neuzablaj. Mi longe maturigos tiun ideon kaj, je la unua okazo, mi provos realigi ĝin.

### **Merkredon 17an de aprilo 1929**

Oni ĉirkaŭas min, oni demandas min. Mirinde, kiel ĉiuj estas scivolemaj ĉi tiel Tiuj kamparanoj havas mirindan anim-freŝecon kaj naivecon. Sed kia simpatia etoso'. Neniu fuŝnoto, de la kamparano ĝis la poliestro kaj la fervojistoj. Frateca afableco regas ĉe tiuj vojaĝantoj. Pli-malpli bone, kun mia vortaro en la mano mi "jargonas", mi diskutas... Malgraŭ sia ŝajna naivo tiuj kamparanoj metas al mi sencoplenajn demandojn. Unue, ĉu estas pano en Francio? La salajroj kaj la vivnivelo? Kiel reagas la laborista klaso? Ĉu estas feliĉaj la laboristoj? Ĉu mi ne timas mian arestiĝon, kiam mi revenos?

## **Sabaton 19an de aprilo 1929**

Post ĉirkaŭ 6 horoj por trabicikli nur 36 kilometrojn, mi trafis STALINGRADON per kotplena vojo, trahakita de multnombraj riveretoj. Mi laŭiris Volgo-n plurajn kilometrojn. Ĉirkaŭ tagmeze, esperantistino alvokas min kaj invitas min siahejme, kie ŝi regalas min per abunda manĝo.

Mi estas en la ĉirkaŭaĵo de Stalingrado. Vastega amaso da ligno flosas sur Volgo, kie zumas lignosegejoj. Des pli surpriza estas tiu amasego, ke ligno estas kvazaŭ nevidebla kaj netrovebla en la regiono, kiun mi ĵus trabiciklis, kaj kie la kamparanoj hejtas nur per pajlo kaj bovinfekaĵo brikforme sekigita.

Nun mi renkontas multajn kamelojn, kiuj anstataŭas la ĉevalojn sur la tervojtoj, kaj tiel mi alvenas en Stalingrado mem, ankoraŭ vundita pro la ruinoj de la civila milito, kiu tie furiozis, kaj post la spuroj lasitaj de la terura incendio, kiu detruis 5000 lignodomojn en 1912. Ĉi estas vastega konstru- kaj rekonstru-laborejo. La pluvakvo ravinigas la stratojn, ĉar ankaŭ tie mankas kloakoj (en 1929), kaj svarmas porkoj kaj hundoj. Poste, alvenante en la centron, mi rimarkas belajn tramojn, belajn modernajn domojn kaj bitumitajn stratojn, sur kies randoj multaj domoj estas konstruataj. La katedralo superas la tuton, kaj multaj verdkupolaj preĝejoj aldonas stampon de fieraj lukso meze de 1' ruinoj kaj de 1' laborkampoj.

Mi rapide malkovras k-dojn MUHIN kaj HERICK - kuracistojn - kiuj akceptas min kun tiu slava simpatio de mi nepriskribebbla... Post la vespermanĝo mi iras al la Popoldomo, unu el la plej belaj konstruaĵoj de la urbo, kie la loka esperanto-grupo kunvenas kaj kie, kompreneble, mi prelegas.

La 25an de aprilo mi forlasas Stalingradon.

La 26an de aprilo: estas mia 23a datreveno!

## **La 1-an de majo 1929 en Nikolaievsk**

Mi ĉeestas grandan ĉar-defiladon, kiu prezentas Chamberlain kaj ties rearmadon, Musolini kiel dancistinon, Pildsudski generale vestita, la Societon de l' Nacioj simbolata de dika sinjorino, Trocki kliniĝanta antaŭ burĝo, malnovajn eminentulojn ridindigitaj per

grandaj nazoj kaj longaj oreloj, la burokratismon, kiun simbolas la kadavro de homo, kies ĉerkon kovras diversaj paperaĉoj... Ĉiujn tiujn ĉarojn tiras kameloj. Defilas ankaŭ la infanoj el la lernejoj, la Komunista junularo, la laboristaj kaj kamparanaj sindikatoj, sportaj kaj muzikaj societoj, policistoj sen armiloj, sume la tuta vilaĝo.

Poste, mi atingis aŭtonoman germanan respublikon de Volgo. Noto: Sur la tuta teritorio tiel ekzistas kvazaŭ aŭtonomaj distriktoj, kie oni parolas nur la germanan kaj kie la germanaj moroj estas karakterizaj. La domoj kaj stratoj aspektas pli bele, sed la akceptado estas malpli varma... "La gastamo estas inverse proporcia al la grado de komforto de la popoloj..."

### **Merkredon 11an de majo 1929**

Ĵam de tri tagoj mi estas en Moskvo. Ĉi-foje rapide estas solvita la problemo de la vizo. Krome, la soveta Turisma Klubo promesas helpon al mi por realigi aparaton ebligantan ruliĝi bicikle sur la reloĵ de la fervojo por pli facile trairi Siberion.

En la ĉirkaŭaĵo de Moskvo mi vizitas metilernejojn, kaj ankaŭ reedukejojn por la prostituitinoj. La laboro konsistas en fabrikado de ŝtrumpoj. La virinoj estas pagataj, kiam ilia laborkvanto estas sufiĉa. Ili povas libere eliri. Poste ili estas sendataj en uzinojn, kun la ordinara laboristaro, sed kontrolas ilin speciala sociala servo.

### **La 22an de majo**

Mi forlasas Moskvon. Mia celo: Vladivostoko kaj Japanio. Vojo: la transsiberia fervojo.

### **Marde, la 11an de junio 1929**

Hodiaŭ vespere mi alvenis en Kazanon, ĉefurbon de la aŭtonoma Tatar Respubliko, kaj fame konatan, universitatan urbon. Miaj celoj: ĉiam la samaj, vizo de pasporto kaj precipe, riparado de biciklo. Ĉi tie mi denove provos, kion mi malsukcesis en Moskvo: konstrui aparaton por bicikli sur fervojaj reloĵ kaj ankaŭ havigi al mi la permeson rajdi tiel ĝis Vladivostoko.

Por komprenigi tion, kio sekvas, mi devas iom klarigi la tiaman situacion en Soveta Siberio. De apenaŭ 12 jaroj la nova revolucio triumfis, sed, post "detruo de la malnova mondo" - kaj tio, ve, ne estas vortoludo - ĉio estas farenda kaj la rekonstruado disvolviĝas ĉie. Oficiale, viro kiel mi estis konsiderata, ne nur kiel iom freneza, sed ankaŭ kiel malsaĝulo, ne serioza kaj iom ĝena.


Tamen la propagando tuŝis la amasojn kaj, kvankam "duonfreneza", mi jam trairis la duonon de tuta Sovetio per mia nura biciklo sur abomenaj vojoj.

Krom do la amindaj popolamasoj, dekomence mia ĉefa subtenanto estis AVTODORO, kio en rusa lingvo signifas "Asocio por Devastigo de aŭtomobilaj vojoj kaj ĝenerale de modernaj transportaj rimedoj". Por tiu asocio mi estas ekzemplo de obstineco kaj de espero por la estonta vojretaro. Krome jam influis la akcepto, kiun faris al mi sufiĉe famkonataj turismaj kaj sportaj kluboj, precipe biciklaj kluboj. Mi havis ankaŭ bonŝancon trovi ĉi tie ne nur lertajn esperantistojn, sed ankaŭ sentimajn, honestajn kaj viglegajn. Se "la fido translokigas la montojn", la fido je mi ebligis al tiuj kamaradoj venki ĉiajn barojn.

Dank' al kaj helpe de gekamaradoj Anonimov, Trigulov, Skarajatin, F-ino Kisileva, dum tri semajnoj mi klopodis ĉe registaraj instancoj, Avtodoro kaj ŝtata uzineto je meĥanika riparo. (Ni ne forgesu, ke ĉi tie ĉio estas ŝtatigita). En tiu uzineto la laboristoj min ovaciis kaj venkis la reziston de la direktoro; sed mi devis trovi la tutan necesan materialon... Ĉe "nigra merkato", t.e. popola memstara libera merkato de brokantuloj - mi ne diras "brokantistoj", ĉar, leĝe, metia negoco estas malpermesata. Finfine ĉio resumiĝis jene: post kelkaj tagoj la riparejo "pruntis" al mi bonegan meĥanikiston, k-don Ruĥ (Ruŝ) kun destinita nomo, ĉar ambaŭ ni impulsis la laboron... Sed en tiu laborejo mankis ĉio, eĉ marteloj.

Kaj finfine, la 22an de junio, t.e. dek tagojn poste, mia aparato estis finita laŭ mia plano. Kun k-do Ruŝ kaj kelkaj esperantistoj mi tuj iris provi ĝin sur fervojaj garaĝaj reloj. Stranga aparato... mi ne estis kapabla rajdi sur ĝi, sed knabeto, kiu tute ne scipovis bicikli, triumfe pedalis kiel ĉampiono. Mi komprenis, ke la malfacilaĵo venas

de mi. Mi devis lerni utiligi mian novan inventon. Tiel mi faris. Mi modifis ĝin iomete kaj atentis pri kelkaj detaloj.



**Dimanĉe, la 30an de junio 1929**

La hodiaŭon mem mi foriris de Kazano per mia aparato, dank' al la freneza helpo de F-ino Kisilova kaj K-do Anonimov, kiuj sukcesis havigi al mi la **"unuian permeson rajdi sur reloj de fervojoj transsiberiaj"**!

Grupoj da scivoluloj kaj precipe ĵurnalistoj feliĉe min fotis kaj intervjuis. La saman tagon, tiuj intervjuoj estis publikigitaj ĝis Japanio kaj Ĉinio... kaj kompreneble ili estis por mia estonta alveno

la plej bona propagando. Eĉ en Hindoĉinio kaj en Siamo (nun Tajlando) tiu novaĵo sciigis, ĉar kiam mi alvenis en Bankokon, oni diris al mi, ke mia aparato estis ŝtelkopiita kaj de tiam uzata ĉi tie mem. Pli poste mi eksciis, ke oni organizis vetkuradojn. Mi eĉ vidis fotojn” de sportuloj, kiuj biciklis de Vladivostoko okcidenten al Moskvo!

Nu, nur ĉ. la 11a mi fine povis liberiĝi el la amikeco de unuj kaj de la interesiĝo de ĉiuj. Ĝis revido kaj dankon, karaj geamikoj de KAZAN!

Mi devas konfesi, ke, malgraŭ la provado, mi nur duone fidis mian aparaton kaj... min mem. De la komenco mi sentas min malkomforte kaj mi biciklas nur tre malrapide. Post unu horo mi unuafoje falas kaj la tutan tagon mi reguligas kaj poluras la "maŝinon".

Vespere, je la 18a, ekpluvas. Post la pluvo mi reekiras, sed sur la malsekaj reloj la pneŭmatikoj tute ne algluiĝas, la radoj flankenglitas kaj mi elreliĝas kun plimalpli da damaĝoj ĉe la delikataj organoj de l' radetoj. Ci-foje rompiĝas la stirstango. Noktiĝas. Mi tamen atingas vilaĝeton, kie tuj scivoluloj ekĉirkaŭas min, kaj oni proponas al mi tranoktejon. Mi tamen estas laca kaj konsentas.

Dek minutojn poste mi estas ĉe bone provizita tablo kun blanka pano, teo kaj lakto. Unu horon poste mi kuŝas. Tiel pasis tiu memorinda tago.

Nun certas, ke mi povas bicikli sur reloj: mi traveturis ĉ. 70-75 kilometrojn. Bilanco: stirilo rompita kaj malantaŭa metalstango tordita. Ĉiun lernadon oni devas pagi. Ne estas mi escepto. Feliĉe mi malkovris lertan seruriston, kiu, la morgaŭon, per malnova sendenta falĉilo kaj multe da lerteco, riparos la stirilon.

La staciestroj nenion postulas de mi, sed la fervojgardistoj ja trifoje en la tago postulis, ke mi montru la permesilon. La gazeta reklamado fruktodonas. Oni atendas min en la stacietoj kaj la disvendado de miaj kartoj estas kontentiga.

Mia aparato pezas ĉ. 10 kilogramojn. Kun la pezo de la biciklo mem kaj de la pakaĵoj, la tuto atingas 25-30 kilogramojn. En kazo de danĝero - alveno de kontraŭa trajno - mi principe havas sufiĉe da

tempo por elreliĝi. Ununuran fojon mi estis surprizita. savis min mia memrego...

La transsiberia fervojo estas dutraka. Mi bicikladis sur la dekstra trako kaj ne riskis koliziojn. Por la postvenantaj trajnoj sur ununura trako mi havis la laŭregulan ruĝan signalon de la profesiaj vojudantoj. Kiam la vojo fariĝis unutraka, en iuj regionoj de Manĉurio, nu... la legantaro vidos poste. Mi aldonu, ke 80% el la vojo estas tute rekta kaj ebena kiel bilardo.

### **Sabaton 6an de julio 1929**

Hieraŭ je la 6a mi forlasis MOJGA kaj plu daŭrigis la bicikladon meze de arbaroj kaj sablo, en regiono simila al "Landes" en Francio. Kuloj, ĉiam kuloj, estas la ĉefaj kruelaj bestoj de tiuj arbaroj kaj koto la ĉefa malamiko sur la teroj.

Tiun nokton, aparta alarmo: unuafoje mi spertis malfacilecon trovi tranoktejon. En la ununura "isba", kie mi haltas, oni montras malemon gastigi min, eĉ kontraŭ pago. Mi devus alarmiĝi, sed mi estas tiel lacega, ke mi ja devas tranokti tie. Apenaŭ ekkuŝinte, mi estas ĉirkaŭatakata de aĉaj kuloj. Ne plu povante elteni, je la unua matene mi ekstaras kaj esploras la lokon. La domo estas infestita de milionoj da cimoj kaj pedikoj. Ja la unuan fojon mi estas ties viktimo kaj mi nun komprenas, kial oni ne volis gastigi min: pro honto. Tuj mi kolektas miajn aferojn kaj foriras...

(...) Iom post iom malaperas la ebenaĵo kaj mi atingas la unuajn montojn de Uralo, kun iliaj rondformaj suproj kovritaj de abioj. La vetero estas belega. Je la 13a mi atingas la stacion KRASNOFINSK. Post la kutimaj formalajoj mi iras en la urbon. La magazenoj estas malfermitaj, sed la stratoj estas senhomaj, tial fiaskas la disvendado de miaj kartoj. Tamen mi renkontas du esperantistojn, kiuj invitas min siahejmen. Ni tuj iras nin bani en la rivero, kiu trafluas la urbeton. Tiu valo estas rave bela. Ĉirkaŭita de relative malaltaj montaroj abi-kovritaj, la rivereto kviete fluigas sian verdan kaj klaregan akvon. Tie ĉi ĉiuj, viroj kaj virinoj, sin banas tute nudaj, sen kalsoneto, sen mamzono. Tio estas laŭmoda, kaj ŝajnas nek ridinda nek kritikinda.

## **Merkredon 10an de julio 1929**

Iom post iom grimpadas kaj atingas la koron mem de Uralo. Kiel bela lando! La vilaĝoj estas malproksimaj unu de la alia kaj la temperaturo malaltiĝis kompare al la ebenaĵo. En la stratoj de tiuj vilaĝoj svarmas ĉiuspecaj bestoj: kokinoj, porkoj, bovinoj, sed neniu homo! Atingante unu el tiuj vilaĝoj, mi apenaŭ evitas la korpojn de multaj geviroj kuŝantaj ebriegaj sur la vojo. Ĉu festotago? Jen la fakto. Estas samtempe naŭze vidi tutan vilaĝanaron kvazaŭ mortebria kaj reĝojige vidi ĉiujn domojn malfermitaj, kaj neniun ŝtelon, neniun seksperforton.

## **Vendredon 12an de julio 1929**

Hodiaŭ, lasta etapo antaŭ SVERDLOVSK, t.e. 40-50 kilometroj. Jam de tre malproksime, ĉirkaŭ la 16a, mi ekvidas la urbon. De tie ĉi ĝi similas vastegan vilaĝon grimpantan sur la monteton elstarantan el la verda fono de la densa arbaro. Ĉe la supro la stratoj estas longegaj. Ĉiuj similas bulvarojn; ili estas polvoplenaj kaj senhomaj. La tuto estas vastega konstru- aŭ rekonstru-kampo, ĉar la urbo multe suferis dum la revolucio. Tie en Sverdlovsk (antaŭe Ekaterinburg) estis mortpafita la cara familio.

Neniam antaŭe, eĉ en Moskvo kaj stalingrado, mi rimarkis tiom da entreprenitaj konstruadoj. Ĉio konstruiĝas samtempe: kloaka reto, tramlinioj, uzinoj kaj familiaj domoj, kio parte estas la kialo de tiu polvo ŝvebanta super la urbo.

## **Mardon 16an de julio 1929**

Tri tagoj da seninterrompa festa ĝojego stampis tiun ege popularan datrevenon de la liberiĝo de Uralo el la blankaj trupoj de generalo KOLĈAK. Ĉie estis muziko kaj popolbaloj sub rimarkinde hela ĉielo.

Mi vizitis la muzeon de la revolucio, instalitan en la historia domo, kie la lasta caro Nikolao la Dua kaj ties familio estis ekzekutitaj. Granda murpentraĵo prezentas la ĉefajn epizodojn. (...)

## 1an de septembro 1929

Mian vojaĝon pipras neatenditaĵoj! Hieraŭ, unuafoje de post mia alveno en Sovetio, mi estis arestita fare de fervojgardistoj. Jen kiel.

Estis ĉ. la 15a, kiam mi atingis YURGA per la vojeto, kiu laŭas la trakon. La gardanto, anstataŭ akcepti min amike kiel kutime, kondukis min al la estro, kiu komprenigis al mi, ke mi devas esti gardata. Kaj li min enfermigis en ĉambro bone lumigata, sed kies pordon gardis armita soldato. Je la 21a, trajno veturigis min al TAIGA, kie mi estis kondukita al la GPU-oficejo, kie oni enfermis min por la nokto en la klubsalono, sen manĝaĵo kaj sen trinkaĵo; kaj mi devis kuŝi surplanke.

Vidante, ke mia enŝlosiĝo plu daŭras sen manĝo, sen trinko kaj sen ies vorto, mi decidis mem skribi al la poliestro por protesti. samtempe mi skribis al esperantistoj, sed mi supozas, ke tiuj neniam ricevis tiujn leterojn...

Fine, du tagojn poste, la poliestro alvokigis min al li kaj demandis min, unue petante miajn legitimaĵojn. Li diris al mi, ke li esperas liberigi min en la vespero mem. Tio ja okazis je la 18a. Oni rekondukis min al la estro, kiu petis de mi en la rusa diversajn klarigojn. Tio estis dialogo inter surduloj, ĉar, se mi balbutaĉas la ordinarajn vortojn, mi ne kapablas konversacii en la rusa. Mi tamen komprenis, laŭ lia sinteno, ke li ekskuzas sin. Miavice mi petis klarigojn. Li respondis, ke antaŭhieraŭ voĵgardistino telefonis al li, ke nekonato trairis ponton sur la fervojo kaj ke tiu nekonato estas strange ekipita kun durada maŝino, nudaj kruroj, ktp, ktp. Tiu individuo eliris el la arbaro kaj revenis en ĝin trairinte la ponton.

La leganto bonvolu konscii, ke ni ĉiam estis en revolucia kaj... milita periodo. Krome la afero okazis en tute virga arbaro de ĉiam infestita de ĉiuspecaj koboldoj, banditoj kaj nun sabotistoj. Mia trairado estis tiel stranga, tiel neatendita, ke la emocio de tiu kompatinda kamparanino estas bone komprenebla. Fine, estis tiu fama malpermeso ruliĝi sur la reloj. Ĉiuj ĉi detaloj postulis de tiu kompatinda adjutanto postenestro pli da telefonado en du tagoj, ol de antaŭ du jaroj. Evidentiĝis, ke mi ne ruliĝis sur la reloj. Mia aparato troviĝis en stacio MARIINSK. Atestaĵo tion pruvis. Tiel, nenio plu devigis, ke oni gardu min; oni do liberigis min kun

ekskuzoj kaj donacante al mi bonan manĝon. Krome oni proponis al mi veturi al MARIINSK per trajno senpage...

### **Dimanĉon 13an de oktobro 1929**

Jam de kvar aŭ kvin tagoj mi estas en IRKUTSK. Min gastigas familio M., kiu praktike estas esperantista. Jen la surprizoj, kiuj atendis min en Irkutsk:

1. Neniu letero alvenis.
2. Perdiĝis la pakaĵo el miaj vintraj vestoj, kiun mi tien sendis.
3. La franca ambasado en Moskvo informas min pri la neeblo akiri vizon por Manĉurio, do por Ĉinio. Spite tion, mi juĝas bona iri ĝis ĈITA kaj tie vintri.
4. La klopodoj, kiujn mi devas fari en Irkutsk, estas des pli malfacilaj, ke latentas milito en Manĉurio.

Feliĉe, ankaŭ tie ĉi aparte bone helpas min la esperantistaj kamaradoj de la ege vigla klubo el junaj studentoj, kies estro estas S-ro N. jam ili sukcesis liverigi al mi alian permesilon por ruliĝi sur la reloj.

### **Merkredon 16an de oktobro 1929. Lago Bajkalo**

Por trabicikli 8-12 kilometrojn estis vera ekspedicio! Ni trairas la fervojan ponton super Angora kun speciala permesilo kaj atingas la klubon de Inokiensk je ĉ. la 18a. Same kiel hieraŭ, amaso da gejunuloj atendas kaj aklamas min, kiam mi alvenas. La kunveno plenplenigas, ankaŭ kun multaj plenkreskaj fervojistoj, kaj fine de la kunveno oni febre aĉetas miajn kartojn. Kvaronhoron la homamaso aklamadas kaj akompanas nin ĝis la stacikajo por mia pertrajna ekiro rande de Bajkalo al la stacio de Sludiank, kiu troviĝas trans tunelaro ĉe la okcidenta elirejo de la lago.

Tie mi retrovas mian aparaton kaj povas plu ruliĝi sur la reloj. Malofte mi vidis tiel belajn panoramojn!...

Ĉe miaj piedoj, maldekstre, la vastega, laga "maro", kies norda rando malaperas en la malpeza nebulo; antaŭ mi kaj dekstre, belegaj neĝoplenaj montpintoj, kaj ĉe ties malsupro la reloj, kiuj

brilas sub la leviĝanta suno. La akvo estas nekredible klara, tiel ke ofte mi ekvidas la plurmetre profundan fundon kaj fiŝarojn el ĉiuj dikecoj. De fore ĝi havas belan smeraldan verdon. Sur la lagbordo kreskas nekredible densa flaŭro prisemita de dometoj.

Ĉiun 20an aŭ 30an kilometron, mi malkovras elegantan kaj florornamitan stacieton. Ĉiam aklamas min la randanoj avertitaj pri mia alveno.

Tia estis dum du neforgeseblaj tagoj mia promenado rande de la sudorienta parto de Bajkalo, en tiu belega regiono, kiun prilumis bela aŭtuna suno. (Post duonmonato aŭ tri semajnoj la lago estos glaciiginta)...

### **Lundon 4an de novembro 1929 : ĈITA**

De kvin-ses tagoj mi estas tie, vane klopodante por akiri vizon por Manĉurio. Ĉiam minacas konflikto ĉe la manĉuria limo. Oni minacas repeli min al Irkutsko, ĉar en Ĉita troviĝas ni en landlima, konflikta regiono. Eĉ per fervojo, en la sovetia regiono, kiu laŭas riveregion Amur, oni rifuzas allasi min ĝis Vladivostoko. Ĉu tiu nova obstaklo devigos min rezigni iri pli malproksimen?

### **Irkutsko, 10an de novembro**

Ĉio havas finon, eĉ la festoj. Jen nun la alia flanko de la medalo. Pli la eventoj ol la homoj devigis min retroiri. La ĉina-rusa milito minacas ĉe la orienta landlimo. Se tiu konflikto estis preskaŭ nekonata en okcidento, tie ĉi ne estas same. Ĉiutage la radio lokas ĝin je la unuan vicon. La Ĉinoj postulas la tutan sovetian orienton kaj pli konkrete la suverenecon super la manĉuria fervojo, kiun mastras Sovetio. Malantaŭ tiuj postuloj profiliĝas la japana imperiismo, kiu jam okupas Manĉurion. Kiel naturajn aliancantojn Japanio havas ĉiujn elmigrintojn de la eksa reĝimo, kiuj, de Ĥarbino ĝis Pekino tra Sanghajo, vere komplotadas.

Mia situacio fariĝas neeltenebla. Mia retroiro estos aventuro kaj stranga nekonataĵo. Unue pri la gastado? Mi ne plu estas fama turisto, sed fremda suspektato...

## **13an de novembro**

Ŝovinisma vento blovas en Irkutsko nun. La situacio pligraviĝas ĉiutage. La instancoj zorgantaj pri vizado de la pasportoj, informis min, kiel en Ĉina, ke mi devas **tuj** reiri al Francio. Oni pretekstas, ke mi uzurpe uzis la permeson ruliĝi sur la fervojo. Feliĉe la esperantista grupo ekzorgas pri mia afero. Morgaŭ ni turnos nin al aliaj instancoj...

## **Merkredon 20an de novembro 1929. Novosibirsko**

Mi havis apenaŭ la tempon peti kaj akiri fervojan rabaton - kio pruvas, ke la instancoj tamen ne tro koleras kontraŭ min - kaj mi devis retrovojaĝi okcidenten. Mia pertrajna vojaĝo daŭris 48 horojn inter Irkutsko kaj Novosibirsko, dum mi bezonis du monatojn por trabicikli la saman distancon.

Hieraŭ, alvenante tien ĉi, mi retrovis ĉion en bona ordo. Neniu porciumado, do, la normala vivo! Mi pli trankvile spiras, sed kion mi perdis? Mian monujon dum la vojaĝo.

## **Irkutsko, la 8an de decembro 1929**

Fine mi sukcesis akiri restadpermeson por Irkutsko, kie mi troviĝas de post la monatkomenco. La malvarmo nun estas tre akuta, de minus 25° ĝis minus 30°, kio devigas min resti interne preskaŭ la tutan tempon. Provizore mi loĝas ĉe familio M. Mia nura distro estas kino. Mi petis pri loĝejo kaj laboro, kaj mi atendas.

Fine, ekde la 9a de novembro, mi eklaboras en uzino kiel ĉarpentisto. Malgraŭ la malvarmo zinkistoj kaj ĉarpentistoj laboras sur la tegmentoj. Inter la laboristoj troviĝas ankaŭ virinoj. Je la 16a, anstataŭ ellasi nin, oni fermas la pordojn por devigi la laboristojn ĉeesti kunvenon, kie la direktoro plendas pri la rendimento. Ĉiutage en la manĝejo paroladas oratoro. La malvarmo atingas minus 40°. La stadiono estas transformita en sketejon. Mia nazo frostiĝis plurfoje!

## **Kristnasko 1929**

Labortago kiel la aliaj. Morgaŭ, normala ripoztago, estos tago de memvola kaj sensalajra laboro por la industriigo de la lando. Mi inaŭguras la esperanto-kurson.

## **5an de januaro 1930**

Minus 45° C, sed la laboro ne estas interrompita. La masonistoj konstruas ŝtonan ponton, skipoj riparas la fervojojn, la telefondratojn. Mi povas bicikli sur la glaciigintaj deklivoj.

## **8an de majo 1930**

Post sennombraj malfacilaĵoj, hieraŭ mi fine ricevis mian pasporton por denove ekiri. Mi unue veturos ĝis ĈITA per trajno ĉar la vojo ankoraŭ ne ĉie degelis.

**La 20an de majo**, je la 8a matene, mi foriras de Ĉita per mia aparato kaj mi ruliĝas sur la reloj...

## **26au de majo 1930**

Mi atingas la landlimon. Post du horoj mi estos en Ĉinio. La lastaj tagoj en Sovetio estis por mi la kulmino de mia tiea restado. Dum tri tagoj ĉe kamarado SUKOV mi plian fojon ĝuis la ĉarmon, la malavaron, la animpurecon de la slava gastamo. ALEVIANE, eta stacio konstruita kaj nestiĝinta piede de la grandaj krutaĵoj ĉe Anon, lasas al mi aparte nepereigeblan memoraĵon. Paradoxse, la vivo tie estas pli bona ol aliloke en tiu regiono. Ĉu eble pro la kontrabando? Mi kredis min reveninta en mia familio, tiom varmega estis la akceptado de S. La patrino de mia amiko gastigis min kiel sian filon. Krome, eĉ en tiel eta vilaĝo, ĉiutage estas kino kaj balo (tiel malofta en Sovetio!) aŭ koncertoj plurfoje monate, aranĝitaj de la lokaj folkloraj kaj artaj grupoj.

Post tiuj tri tagoj, mi reekiras. La tutan tagon ĝenas min forta vento kaj mi biciklas jen sur altebenaĵoj, jen en montaro. Mi laŭiras la valon de Anon. Tie ĉi tiu valo estas nur 800-1000 metrojn larĝa. Sur la flankoj de l' dezertaj montetoj oni rimarkas nur la malmultajn izolitajn kabanojn de l' Burjatoj, rondajn kabanojn kun ,pintaj

tegmentoj, kiuj pensigas min pri tiuj de indianoj de "Far West". Kompreneble, dissemitaj en la naturo, videblas ankaŭ multaj brutaroj. Ĉirkaŭ la 11a, mi ekvidas ĉevalrajdanton, kiu fulme malsupreniras la montdeklivon direkte al mi. Kiam li estas alveninta ĉe la trako, mi haltas kaj proponas al li konkuradon pri rapido. Li konsentas. Tiel ni vetbatalas 500-1000 metrojn sur la rekta vojo kaj mi sukcesas venki lin. Tiam la rajdanto proksimiĝas kaj mi surprize konstatas, ke temas pri belega burjata junulino, granda, bone lokita sur sia selo, kaj kiu rigardas min kvazaŭ al aliplaneda vizitanto. Mi alproksimiĝas kaj provas ekkonversacii. Ŝi rajdas grandan blankan ĉevalon sur granda kaj komforta selo, sed ne "amazone".

Konstatante, ke mi ne povas konversacii kun ŝi (ŝi certe ne scipovas la rusan), mi donacas al ŝi unu el miaj kartoj, kiun ŝi akceptas kun videbla infana plezuro. Mi komprenas nur unu vorton el tio, kion ŝi dankante diras al mi: "jurto", kaj ŝi montras al mi la direkton nordokcidentan. Evidente ŝi invitas min viziti ŝian familion kaj ŝian domon.

Pro multaj kialoj mi rifuzas tiun inviton, sed ĉefe tial ke la jurto aspektas tiel eteta sur la monteto, kiel ĉina ĉapelo, kaj ke mi ne deziras perdi tempon. Reekirante mi rimarkas la grandan stangon - plurajn metrojn longan - kun ladrimeno ĉe la ekstremo, kiu tutverŝajne estas la "lazo" de tiuj bovĝardistoj.

Adiaŭ, Sovetio! aŭ eble ĝis revido? Ĉiel mi konservos neforgeseblan memoraĵon pri la 18 monatoj, kiujn mi pasigis en Sovetio, kie, tagon post tago, mi travivis kaj notis la ĝojojn, la malĝojojn, la suferojn kaj ankaŭ la esperojn de tiuj grandaj gastamaj kaj laboramaj popoloj. (Tion mi skribas lundon 26an de majo 1930 en la stacio MASEJEVSKAJA).

**La 26an de majo 1930.** Ĉe la ĉina-manĉuria-sovetia limstacio Radziesk n-ro 86

La lastan etapon ĝis tie mi faras sen incidentoj. En la grundo svarmas truoj pro obusoj, torpedoj kaj tranĉeoj. Antaŭ tri monatoj tie ĉi plagis la milito. Oni sin preparis por longdaŭra milito. Same kiel ĉie, min frate akceptas la fervojistoj, la doganistoj kaj la limgardistoj. Malproksime staras kurteno el pikdratoj al rivero Argun, kiu disigas ambaŭ landojn. Sur la montetsupro, maldekstre, je ĉ. 3 km., aperas urbo Manĉurio, unua manĉura stacio. La vetero estas bela, la tereno valo- kaj herboplena. La transirado de la landlimo estis ridinde facila kompare al la trimonata klopodado por akiri vizon!

**La 27an de majo 1930.**

Hodiaŭ sur unutraka fervojlinio, trajno, kiu veturis post mi, devis halti meze de glata herbejo por min ne trafi. La vojaĝantoj malsupreniris de la vagonoj kaj, vidante la kaŭzon de tiu deviga halto, ili min ĉirkaŭis kaj ovaciis, postulante de mi bildkartojn kaj aŭtografojn.

Je la 17a mi alvenis ĉe la sovetia-manĉuria landlimo, kie mi trovis - kompreneble? - esperantistinon. Pro la ĉi-posttagmeza halto la trajno malfruis. Senpacience oni atendis min.

La lastaj civitanoj, kiujn mi renkontis en soveta teritorio estis... du geamantoj, kiuj amindumis ĉe ponteto de rivero Argun, meze de herboriĉa milita dorndratejo. Por mi tiu vidaĵo estas simbolo de venko de vivo super morto, ĉar en ĉi tiu loko mem, kelkajn monatojn antaŭe, okazis terura batalo inter soveta kaj ĉina armeoj.

Kaj la unua homo, kiun mi renkontas mire estas... japana observanto, kiu senprokraste telegrafas al Japanio pri mia trapaso. La rezulton mi baldaŭ travivos, ĉar kiam mi alvenas en Ĥarbinon

(okupitan duone de sovetianoj duone de japanoj) homamaso, eble inter 2000 kaj 3000 scivoluloj, jam atendas min, ambaŭflanke de la fervojo kaj. ovaciegas min. Mi transiras la riveregon Sngarr sur belega viadukto almenaŭ 1000 metrojn longa. Kiam mi apenaŭ alvenas sur la orientan bordon, la homamaso min ĉirkaŭas aplaŭde. Oni eĉ iomete puŝegas dum la ĵurnalistoj min fotos. Mi ne atendis tian akcepton: ses aŭ sep japanaj, rusaj kaj emaj ĵurnalistoj interdisputas por min intervui kaj inter ili S-ro Geno, kiu perfekte parolas la francan.

Vespere min vizitas unu el miaj malnovaj korespondantoj kaj amikoj, k-do Anciferov, fervojisto de la transsiberia reto. Kun li min vizitas ankaŭ du francaj komercistoj, Gesinjoroj Eart.

### **En Haylar, la 31an de majo 1930.**

Hieraŭ, la tutan tagon mi biciklis en la dezerto aŭ pli ĝuste rande de Gobi-dezerto. Nuraj vivantaĵoj : bovaroj, ĉevalaroj kaj ŝafaroj gardataj de grandaj uloj migdalokulaj kun tanita haŭto... veraj sovaĝuloj. Sed mi ne donas aĉigan sencon al la vorto "sovaĝa", ĉar reciproke, laŭ ili, la "sovaĝuloj" estas ni, la blankuloj...

La ĉefa obstaklo estis por mi la vento, kiu transportas nubojn el blanka sablo. Tiaj nuboj sufokus kaj eĉ poste tute kovrus onin, se oni ne zorge ŝirmus siajn okulojn, siajn naztruojn kaj orelojn. Tial ĉiuj vualoj, per kiuj sin ornamas tiuj indiĝenoj el la dezerto. Sed por novulo la spektaklo estas vere grandioza. Oni vidas la dunsuprojn fariĝi kaj detruigi en nepriskribeblaj kirliĝoj sub plumba suno. Tio iel similas "furiozan maron", sed estas ja maro el blanka, maldika, eĉ nepalpebla sablo, kiu ĉien enŝoviĝas, ĝis en la faldojn de la plej zorge ŝirmataj subvestoj. En kelkaj minutoj, ankaŭ la reloj estas submergitaj kaj en la plej riskoplenaj sektoroj oni starigis kontraŭsablajn barilojn por ŝirmi la fervojon.

Subite, malantaŭ duno, oni ekvidas stacion. Kion povas ja fari tie tiu domo kaj tiu kompatinda, ekzilita staciestro kaj lia familio? senutilas substreki, ke sur tiuj vojpartoj ĉio kaj ĉefe la akvo devas esti zorge transportata kaj stokata en kirasitaj kaj speciale ŝirmataj cisternvagonoj.

Vere, tiuj nekutimaj pejzaĝoj kredigus, ke oni atingas alian planedon, se ne estus la ŝtala rubando kaj la fajron kraĉantaj monstroj, kiuj singarde cirkuladas en tiuj sektoroj. En tiaj kondiĉoj kaj kun tiu spiritostato, je la 19a mi atingas Haylar, polvokovrita, ŝvitanta kaj soifanta, kvankam kunportinte ladbotelon da akvo, kiun mi rapide malplenigis.

### **Stacio Buksedu, la 3an de junio 1930.**

De tri tagoj min pli-malpli senmovigas nebuloj, tre densa pluveto. Hieraŭ mi tamen sukcesis alveni tien ĉi post 30 kilometroj tra preskaŭ dezerta montara regiono. Mi devis peti la permeson ruliĝi en tunelo. Elirinte, mi troviĝis en belega montara cirko. De malsupre mi vidis la fervojon grimpantan sur la flankoj de la montaro per sinsekvo da grandiozaj kurbiĝoj. Tio konsistigis unu el la plej belaj artverkoj, kiujn mi iam ajn vidis en miaj vojaĝoj, sed pro tiu malseka vetero mi havis multe da malfacilaĵoj por supreniri laŭ tiuj kurbaj krutaĵoj kun glitigaj reloj. Mi devis eĉ malmunti mian aparaton kaj suprenpuŝi ĝin kun la biciklo kaj la pakaĵoj tra la montaraj mallongigaj vojetoj - nekutima alpisma heroaĵo! Kaj tiel, nur post longa tago da ŝvitado, en neforgesebla naturo - kio ege kompensis mian penadon - mi atingis la stacion Buksedu.

Kompreneble, tuj ĉe mia alveno min kaptas la policistaro, kiu ne kredas siajn okulojn, zorge ekzamenas min kaj miajn pakojn kaj demandas min interalie: "Ĉu vi estas judo?" Unuafoje oni faras al mi tian demandon. Eble pro la legendo de la Vaganta judo? Kaj subite mi komprenas ĉiujn malamojn, miskomprenojn kaj rankorojn, kiujn ĉie en la mondo suferas la juda popolo...

### **En Ĥarbino, la 11an de junio 1930.**

Memorinda tago por mi. Je la 8a mi iris al la stacidomo por renkonti ĉe halto de la transsiberia trajno kvar eminentajn japanajn esperantistojn, veturantajn al la internacia esperanto-kongreso en Oksfordo. La ĉefdelegito estas direktoro de grava japana ĵurnalo. Kompreneble, plian fojon nin fotis kaj intervjuis la loka kaj internacia gazetaro.

Samtempe mi ankaŭ ricevis invitleteron de iu tre grava japana esperantisto: F-ino Oouada. Min ŝi invitas al Curuga, la responda haveno de Vladivostoko.. Mi tuj diru, ke dank' al tiuj protektantoj la akcepto, kiun mi ricevos en Japanio, kaj eĉ en la tuta cetero de Azio, estos miriga je bonvolemo. senescepte!

Je la 14a min gastigis S-ro P., eminenta meteorologiista esperantisto, UEA-delegito, ĉe kiu mi retrovas niajn japanajn amikojn. Lia "burĝa" gastamo neniel malsuperas la tradician rusan gastamon. Al ni servas du ĉarmaj ĉambristinoj delikatan manĝon kun tre variaj almanĝaĵoj, vodko, kukoj... kaj en tiu esperantista etoso nekonata de la neinicitoj. En la ĉeestantaro troviĝis alia japano, S-ro Osako, kaj ĉino S-ro Tsin-Si-Tsin, altfunkciulo. Tio estis vere internacia kunveno, kie mi plian fojon ĝuis la subtilan plezuron, kiun havigas nia universala lingvo, ĉar neniu kunmanĝante povis esprimi sin krom en esperanto.

Por fini la vesperon ni iras al ĉina restoracio, kie nin oni servas, kompreneble, ĉiumaniere. Por manĝi ni havas la famajn kornbastonetojn. Kvin minutoj sufiĉas, por ke mi lernu uzi ilin mallerte. Efektive, per tiuj magiaj bastonetoj kaj laŭ la manĝo-aranĝo ĉiu elprenas kion li volas, manĝas kiom li volas kiel li volas, rekte el la komuna plado al sia buŝo. TrinkajojE Dum la manĝado nenio, krom akvo por ceremonie tralavi sian buŝon post ĉiu el la tre multaj pladoj prezentataj. Mi vidas pladon, kiu unuavide aspektas kiel dikaj fazeoloj. Rigardante de pli proksime, mi ekkonscias, ke temas pri dikaj raŭpoj similaj al blankaj vermoj. Mi ŝtelrigardas la kunmanĝantojn kaj vidas, ke trankvile ili metas tiujn raŭpojn en sian buŝon. Regante mian naŭzon mi same, malgraŭ mia subita paliĝo. Nu, tio estas bona, eĉ bonega! Mi rekoloriĝas dum malaperas la naŭzo. Tamen estus mensogo diri, ke mi manĝis multon. Fine de la manĝo, sama ceremonio kiel ĉe la komenco: malsekaj manĝotukoj, lavado de la buŝo kaj de la manoj. Cigaroj.

### **La 23an de junio 1930, mi ekiras de Ĥarbino.**

**Mardon 1an de julio**, mi troviĝas ĉiam en la alta montaro sed iom post iom proksimiĝas al la landlimo. Vespere, mi haltas ĉe la stacio SILENKE. Tie estas nenio por manĝi. Feliĉe, ekzorgas pri mi ruso, "blanka" eksoficiro. Li vivas nur per ĉasado. Li sopiras al la

pasinteco. Por la vespermanĝo: cerva femurajo! Unuafoje mi manĝas tion. Nu! tio estas bongusta!

**Rivero Popereĉka.** Hieraŭ, post varma kaj laciga tago mi atingis la limstacion Pograniĉnaja ĉirkaŭ la 13a, ĉe la montosupro. Ankaŭ tie atendis mian alvenon homamaso kaj en ĝi la urbestro. Ĉi-lasto tre afable akceptis min. Invitis min por tagmanĝi la loka komandanto kaj la urbestro, kiuj antaŭ sia foriro donacis al mi dek rublojn. La manĝon, ĉe la bufedo, akompanis bordoza vino. La poliestro, kiu flue parolas la francan, estas ĉino lerninta en Francio.

Ankaŭ tie mi trovas esperantiston, kiu helpas en mia preparado. Venas al mi ankaŭ sinjorino, kiu parolas al mi en la franca. Kiu povus kredi, ke sur tiu ĉina montpinto estas tiom da francparolantoj?

Je la 18a mi efektive preteriras la limfoston kaj retrovas la sovetan ekstremorientan provincon meze de la montaro, kie ankoraŭ videblas neĝokovritaj montpintoj.

Noto de 1966 : Kvankam ilin mi ne tiam notis, mi aldonas kvar aventurojn, kiuj okazis al mi en Manĉurio.

1. Mi biciklis en ebenaĵo, puŝate de vento sur la rekta unutraĵa fervojo. Ruĝa flago signalis min malantaŭe. Subite, akrasona fajfado turnigis al mi la kapon: la lokomotivo de pasaĝertrajno ĵus haltis je 4-5 metroj malantaŭ mi. Kiel rataro en muskaptilo, la surprizitaj vojaĝantoj elvagoniĝis por ekscii pri la kialo de tiu abrupta halto. Kiam ili vidis min ankoraŭ rajdanta mian aparaton, en pantaloneto, sunbrunigitan kaj ridegantatan, mi ricevis eksterordinaran huraoon kaj en momento disvendiĝis miaj kartoj kiel bulkoj.

2. Tio okazis flanke de monto. Mi penadis, grimpante la vojzigzagojn kaj tial mi povis vidi nur je dudeko da metroj. Mi biciklis orienten sur la dekstra trako. Subita tondrego kaj aperas la impona maso de vartrajna lokomotivo. Ĉe la fenestrorando la maŝinisto en teruro kaj konsternego levas la brakojn. Mi havis nur du-tri sekundojn por reagi. Rapide farite. Mi surgrundiĝas kaj, kiel toreadoro fintanta antaŭ virbovo, mi eligis mian aparaton - biciklon kaj pakaĵojn - el la relo, ĝuste kiam la pezega lokomotiva maso, kun ĉiuj radoj blokita, glitis je 30 aŭ 40 kilometroj hore sur la reloj, de kiuj mi ĵus fuĝis. kaj ĉio en garbo de fajreroj kaj vapore. Kiam mi alvenis al la stacio, de

kiu ekiris la trajno, estas senutile diri, ke mi rajtis belegan skoldadon fare de la staciestro... kaj same belegan ovacion fare de la ĉeestantaj fervojistoj, ĉar tiun incidenton oni telefone rakontis al ili.

3. Elirante el longa tunelo, en grandioza montaro-cirko, mi haltis por iom ripozi kaj spekti la pejzaĝon. Sur la tunela muro estis granda tabulo el blanka marmoro kun jena surskribo en la franca: "La transsiberian fervojon konstruis francaj inĝenieroj. Al ili ni omaĝas." Sekvas la nomoj de caro Nikolao kaj de la ĉefaj francaj kaj rusaj eminentuloj de tiu epoko, kaj ankaŭ de la francaj kaj rusaj inĝenieroj partoprenintaj en la konstruado de tiu grandioza artverko. Mi devis raporti tiun omaĝon kaj memori, ke la Transsiberian oni konstruis grandparte dank' al fama monprunto subskribiita de francaj ŝparantoj - prunto, kiun oni ankoraŭ ne repagis al Francio pro la Revolucio, kaj kiu estis longtempe kontesto-temo inter Francio kaj Sovetio. Kiu leganto memoras tion? Kiu en Francio ankoraŭ posedas valorpapirojn pri la rusa monprunto?

4. Antaŭ ol forlasi Ĥarbinon, mi estis invitita de Pastro DACIER, gaskono, reprezentanta la katolikajn misiojn en Manĉurio. Kompreneble, ankaŭ li interesiĝis pri Sovetio. Ni tuj interamikiĝis, ĉar ni ambaŭ estis gaskonoj. Ni havis la saman "akcenton". Krome, sub klara, simpla, afabla parolmaniero, li kaŝis viglan erudicion kaj tolereman inteligenton. Mi dankas al li plej seriozajn informojn pri mia projekto de vojaĝo al Ĉinio kaj eĉ al Japanio, ankaŭ seriozan, geografian, etnan, filozofian dokumentaron konkretan, objektivan kaj realan. Krome mi dankas al li, ke poste mi estis ĉie en Ĉinio respekteme kaj serioze akceptita de ĉiuj katolikaj misioj, kiujn mi renkontis. Efektive, la misioj havis modelan organizon kaj larĝan akceptemon, male al ĉiuj insidaj klaĉoj, kiujn oni povis diri pri ili. Dankon do al Pastro DACIER.

\* \*

\*

Forlasinte la landlimon, mi ekmalsupreniris la montarajn sinuojn. Survoje renkontpasis min kirasita mitralaŭtotrajno, kun abundo da kanonoj kaj maŝinpafiloj, nura atesto pri la arma soveta viglatento. Tiel, post 25-30-kilometra biciklado mi atingis la unuan

sovietian stacion, XHABATOVA, je ĉ. la 22a, t.e. en plena nokta malhelo.

### **En Vladivostoko, la 5an de julio 1930.**

La lasta tago de mia trasovetia vojaĝo estis unu el la plej lacigaj pro fortega vento kaj pluvego ĉirkaŭ la 9a. Mi kredis min ree en Vaskolarido. Estis nur sinsekvo da valetoj, montetoj kaj "fals-ebenaĵoj". Ĉirkaŭ la 15a, de sur monteto mi ekvidas - ho! Miraklo! - la verdan vastegon de l' oceano. Mia emocio estas nepriskribebla. Antaŭ mi, fjordoj, malebena marbordo, kie mi duonvidas klifegojn. Mi estas proksime de la stacieto UGOLNAJA, je ĉ. 50 km-oj de VLADIVOSTOKO. Kiel indikas ĝia nomo, ĝi estas karbminea regiono. Ĝis la 17a mi laŭbiciklas la maron kaj mi havas la impreson kvazaŭ mi troviĝus sur la rando de Bajkalo, tiel okulpfrapa estas la simileco. Dekstre, la smeralde verda maro, maldekstre la montaraj klifoj.

Laŭlonge de tiu lasta etapo estas nur ĉaledoj por plezuro kaj ripozo. Do, Lazura Marbordo! Estas eĉ subĉielaj banejoj, kie svarmas banantoj. Veturas multaj irvenaj trajnoj, kiuj devigas min ofte halti. Aliparte, estas tiom da vento, ke ĝi trudas al mi halti je 30 kilometroj de la fincelo : mi komprenis, ke la aĉa vetero riskus endanĝerigi min. Vole-nevole, kun ega bedaŭro, mi finis la veturadon en varvagono de ĉirkaŭurba trajno. Feliĉe, mi trovas tre afablajn kaj komplezemajn junulojn, kiuj helpas min envagonigi mian materialon meze de latkestojn da fragoj. Kaj tiel, je la 20a, senflora, mi atingas la stacidomon de Vladivostoko, sakvoje de golfo ĉirkaŭita de belaj montetoj, sur kies flankoj kuŝas la urbo. Mia alveno okazas nevidite, des pli ke torente pluvas. Feliĉe, atendas min en la stacio esperantisto, k-do ZUY, fraŭlo, kiu senĝene invitas min siahejmen. Mi konsentas.

### **Vladivostoko, la 11an de julio 1930**

Malfacilaj estas la formalajoj por forlasi Sovetion. Unue, mi devas atendi ŝipon por Japanio. Due, kaj tio plej gravas, trovi monon por pagi kaj kunporti. Nu, la soveta leĝo estas rigora. Oni ne rajtas elporti pli da mono ol oni havis ĉe la eniro. Ĉar mi havis nur kelkajn dolarojn, mi ne povis pretendi elporti pli. Mi tuj diru, ke mi

devis lasi tie mian tutan ŝparmonon. Malgraŭ ĉiuj miaj petoj, oni lasis min kunporti nur la monon por pagi la ŝipon kaj unu-du dolarojn. Leĝo estas leĝo, tion mi sciis, do, nenio direnda, ne utilas plendi.

### **La 16an de julio 1930.**

Hieraŭ, dimanĉe, grupo da francaj maristoj kaj mi konatiĝis en la klubo kun soveta esperanto-scipova maristo. Sekvis inter la maristaro, pere de mi, longa konversacio, dum kiu ili interŝanĝis ideojn, vidpunktojn, precizigojn pri sia metio en ĉiu lando. Konklude, ĉiuj esprimis la deziron, ke estu esperantistoj je la dispono de la maristoj en ĉiuj mondhavenoj!

-----

### **Mia aparato estas deponita en la muzeo de la Aŭtomobila Klubo de Vladivostoko.**

Hodiaŭ, tute nature kaj kompreneble mi vizitis la lokan organizon Avtodoro por danki ĝin pro ĉiuj helpoj, kiujn ĝi havigis al mi ĝis ĉi tie. Mi proponis forlasi al ili mian aparaton kiel dankmemorilon, por ke ĝi estu konservata kiel muzea objekto.

("Avtodorg" en la rusa signifas "aŭto" kaj "vojo", ĝi estas do la Aŭtomobila Klubo).

Ni interkonsentis, ke antaŭ ol mi forlasos mian aparaton, Avtodoro organizos grandan paradon. Gi okazos en la ĉefa avenuo, la plej larĝa kaj glata en la tuta urbo, kaj kiu transiras ĝin okcidente-orienten. Tiu lasta manifestacio estos filmata de SOVKINO kaj eĉ de fremdaj kinistoj. (SOVKIN estas la oficiala kaj nura organizo de kino en Sovetio). Oni elektis la 20an de julio 1930, ĉar tiu tago estos la "Tutsovetia Tago de Aŭtomobilo". Avtodoro organizis kunvenegon de ĉiaj rajdvojoj ruliloj el la tuta regiono. Fakte, estis multe pli da ŝarĝaŭtoj ol da turistaj.

Kompreneble, venis ankaŭ multaj biciklantoj. Rimarkinde estis, ke tiu preskaŭ tuta materialo estis malnova kaj internacia. Plejparte,

ĝi devenis de militkaptajoj.\* Videble kaj rimarkinde estis, ke tamen multaj bicikloj estis novaj kaj el sovetaj fabrikoj. Mia elmontrado estis la ĉefega parto de tiu festo kaj por mi kvazaŭ apoteozo.

Unue, mi estis prezentita al la publiko kaj ĵurnalistoj kaj la prezentante substrekis, ke mi **estas la unua viro, kiu transiris bicikle de atlantika al pacifika oceanoj** kaj tio memvole, sen ia oficiala helpo, nur dank' al solidareco kaj helpo de Esperantistoj.

Ni ekiris de apudmara bordo t.e. de oriento, direktante nin al okcidenta ĉina kvartalo. Min ĉirkaŭis biciklantoj, kiuj helpis min rajdi sur la strato sen reloj, per mia aparato, kiu konsistas el tri apogradoj. Pro tio la gvidilo devis esti blokita kaj ĉiuj komprenos, ke rajdi tiamaniere estas sufiĉe malfacile.

Mi estis vestita turistmaniere, kun simpla pantaloneto kaj ĉemizeto. La vetero estis malbela, kiel ofte okazas apud marbordo. Pluvetis de tempo al tempo. Tamen homamaso nin aplaŭdegis kaj tiuj aplaŭdoj klarigas, ke lpost la akcepto en Ĥarbino, pli poste la Japanoj kaj Ĉinoj min atendis kaj akceptis tiel favore. Ja mi sciis, ke tiu manifestacio estas filmata kaj disvastigata eĉ en tiuj landoj tuj poste.

(...)

La leganto eble sin demandos, kial necesis al mi restadi tiom longe en Vladivostoko. Simpla estas la respondo: pro burokratismo. Ja, por havigi al mi la permeson pagi per rubloj la ŝipbileton ĝis Japanio oni devis kontraŭi la regulon, ke neniu en Sovetio en tiu tempo povas eksporti sovetian monon t.e. rublojn. Sed mi havis nur rublojn. Kion fari? Nu, por eksterlandiĝi, eĉ mi, eksterlandano, devis tordi la leĝon. Kaj pro tio kiom da klopodoj mi devis efektiviĝi! Male, por eniri en Japanion mi bezonis... **nenion**, eĉ ne pasportan vizon, eĉ ne ...monon. Laŭ tiu vidpunkto, Japanio estis la plej libera nacio en tiu epoko. Cetere, mi ne timas tuj diri, ke por mi, laŭ ĉiaj vidpunktoj, tiu nacio kaj ĝia popolo estis la plej civilizita en tiu tempo.

---

\*Mi memorigas, ke Sovetio dum la revolucio estis invadita ĉie kaj precipe en ĉi tiu regiono fare de japana, angla, usona kaj eĉ franca armeoj.)

**La 28an de julio 1930.** Sur la japana ŝipo Toju-Maru, inter Vladivostoko kaj Curuga.

Je la 7a, ekiro al la enŝipiga kajo. Hodiaŭ estas neniu malfacilaĵo por eniri sur la kajon. De kelkaj tagoj, ĉiuj enŝipigaj formalizaĵoj estas plenumitaj kaj mia bileto estas pagita ĉe la japana agentejo. Tial tuj la japana komandanto montras al mi la kajuton, kien mi povas transporti miajn pakaĵojn. Baldaŭ alvenas la japanaj respondeculoj de l' ŝipo.

Kompreneble, kamaradoj Skiba kaj Zuj akompanas min, kaj, atendante la ekiron, konsole kuraĝigas min per sia frateca ĉeestado. (Mi memoras, ke, kiam mi ekiris el Liono, estis nur mokaj ridetoj!) Sincera emocio eklarmigas min. Unuafoje en mia vivo mi forlasas la kontinenton - nu jes, Vladivostoko estis tamen ankoraŭ peco de Francio por mi. La aventuro nun havos nekutiman vojon. Ankoraŭ dek minutojn kaj mi vidos la adiaŭojn de miaj amikoj - ja de miaj fratoj - kaj jen ĉiu kontakto malaperos...

Adiaŭ, miaj amikoj, adiaŭ angordona, sed kiel loga Sovetio! Mi restas sola kun miaj pensoj, miaj memoraĵoj, miaj esperoj. Feliĉe, la mirinda pejzaĝo, kiu elvolviĝas sub miaj okuloj, alportas al mi avantaĝan deturnigan distrilon.

La vetero estas belega, la maro kvieta, kun suda brizo. La suno brilegas. Ni forlasas la marbordon maldekstre. Iom post iom malaperas la tero. Vladivostoko jam tute ne plu videblas. Plifortiĝas la zumado, ni estas en marmezo. Jam ni traveturas aron da fiŝoj, dikaj kiel bovoj, kiuj nin sekvos dum preskaŭ la tuta irado : estas focenoj, mi kredas. Mi agrable min distras, vidante ilin petoli ĉirkaŭ la ŝipo. Mi revadas, admirante tiun por mi novan naturan mirindaĵon : la Oceanon.

## Japanlando, vere nova mondo por mi...

**Unua mirindaĵo** : Sur la japana ŝipo mi estas traktata kiel... familiano, familia amiko, kvankam ĉiuj ŝipanoj, inkluzive de la ŝipestro, bone scias, ke mi estas tute senmona kaj laboruldevena.

**Dua mirindaĵo**: Per esperanto mi povas komprenigi min rekte.

**Tria mirindaĵo** : La maro! Unuafoje mi enŝipiĝis! Kaj estis vere timige troviĝi sur vera "nuksoŝelo" terure malgrandeta sur tiu vastego de la oceano!

**Kvara mirindaĵo** : La tero! Kiel malgranda ĝi aspektas al mi, kontraste kun la maro. Uf! Mi subite komprenas la ĝojon de Kolumbo, kiam li atingis Amerikon!

**Kvina mirindaĵo** : La japana polico donas al mi permeson surteriĝi, simple, je mia vido, kvankam mi eliras el "ruĝa lando".

**Sesa mirindaĵo** : Japanio mem. Kompare kun Sovetio, ĝi estas pigmea lando. Sed kia lando! Verda, pura, trankvila, ĉarmoplena, reviga lando... Mi kredis retrovi la francan vaskan regionon.

Unuopaj vilaoj; mallarĝaj, pli-malpli montoplenaj urbetoj; butikoj, veraj juveloj; senmakulaj, vivantaj stratoj; ĉiam ridetantaj kaj sanoplenaj homoj kaj super ĉio, por mi fremda viro: mirinde belaj junulinoj, tiel elegante vestitaj kaj tiel ĝentilaspektaj. Ĉiuj iras nudpiede, en specialaj juvelaj ŝuetoj, fiksitaj sur piedoj je la dika fingro.

**sepa mirindaĵo** : En dometoj el ligno, ankaŭ juveldometoj, forestas... mebloj. La planko estas el pajlo kaj neniu eniras kun piedoj ŝuvestitaj. Por eniri en kian ajn domon, eĉ la plej malriĉan, oni nepre devas sensuiĝi kaj purigi la piedojn, se ili estas malpuraj, per akvujo kaj tuko, kiujn oni speciale lasas apud ĉiuj enirejoj.

**Oka mirindaĵo** : En domoj forestas seproj. Ĉambretojn oni formas laŭ bezono, per bele ornamitaj paperaj seproj, sagace interpenetrantaj per reletoj ĉe planko kaj plafono.

**Naŭa mirindaĵo** : Ĝenerale, la dometoj konsistas el ligno kaj papero kaj estas konstruitaj ekster korteto aŭ ĝardeneto, kie kreskas floroj,

ĉe ŝprucakvilo kun baseneto, kie oni povas rimarki naĝantan fiŝaron kaj ofte eĉ testudon aŭ konkaĵon, kaj super ĉio akvajn kaj terajn florojn.

Nokte, tiu "salono" povas esti lumigata, transformiĝante tiel en intimejon.

**Deka mirindaĵo** : En ĉiu domo, eĉ la plej malriĉa, troviĝas banujo el ligno aŭ pli riĉa materialo, en speciala banejo. Ĉiuvespere, ĉiuj familianoj ofte sin banas tute nude kaj samtempe. (En tiu epoko, ĉe ni, komencis nur aperi hejmaj banujoj).

**Dekunua mirindaĵo** : ĉi tie jam en 1930 ĉiu familio havas sian radio-aparaton.

**Dekdua mirindaĵo** : En domoj, neniu seĝo! Por skribi, manĝi kaj ĝenerale, oni sidas sur kruroj, rekte sur planko, sammaniere kiel en okcidento laboras la tajloroj.

**Dektria mirindaĵo** : Sur la stratoj svarmas bicikloj kaj duradaj ĉaretoj trenataj de viroj. Ankaŭ trotuaroj ofte malaperis, tiom mallarĝaj estas la stratetoj; precipe kompare kun Sovetio, kie la plej simpla strato similas okcidentan bulvardon. La kaŭzo de tio estas la malsimileco inter la skaloj de ambaŭ landoj: unu vastega, la alia malgranda.

**Dekkvara mirindaĵo** : En Japanio ne ekzistas ksenofobio. Ksenofobio, kiun mi foje renkontis en Ĉinio... kontraŭe, ĉiuj, de la plej granda altrangulo ĝis la simpla knabo, min salutas, ridetante.

**Dekkvina mirindaĵo** : lu esperantisto min alparolas meze de strato kaj min invitas.. trinki teon. (La te-trinkado estas la sola komuna moro inter rusoj kaj Japanoj kaj ĉe ambaŭ popoloj ĝi esprimas amikan, eĉ .intiman gastaman ceremonion). Servas min gracia kaj ridetanta junulino, genuflekse, belege vestita per ne malpli belega kimono kun papiliforma banto.

**Deksesa mirindaĵo** : Finfine la ŝipestro prezentas min al policestro, kiu parolas ruse tiel malbone kiel mi, sed tamen ankaŭ min akceptas kiel amikon. (La postan jaron, kiam mi alvenos en Hindoĉinion, jen la unua parolo de franca policestro: "Vi estas por mi nur vagulaĉo, laŭvorte kaj honorparole...")

**La 3an de aŭgusto 1930**, mi malfermas la 18an Nacian Kongreson de Esperanto.

Oni venis al la ŝipo por min akcepti kaj min akompani bicikle ĝis la kongresejo. Ni estis atendataj. Unua impresio: surprizo, deteniĝo, kiu baldaŭ transformiĝos en deliran entuziasmon. Mi estis ovaciata kiel neniam ĝis nun! Oni min ĉirkaŭis, min tuŝis kaj ankaŭ mian biciklon. Ĉiuj demandis ion al mi... kaj hurais!!!

Post nepra purigado (mi jam kutimis la japanajn morojn), mi estis invitita malfermi oficiale la 18an nacian japanan E-kongreson, antaŭ almenaŭ 1000 delegitoj el ĉiuj japanaj provincoj. La salono estis vastega kaj ĝin oni dekoraciis per ĉiukoloraj flagetoj kaj standardoj. Same kiel du jarojn antaŭe en Liono, mi denove miregis kompreni kaj precipe komprenigi min al la aliaj. Tiuj spertoj vere montras la miraklan povon de Esperanto.

Post la kongreso, en belega apuda parko, oni fotis nin grupe kaj disdonis al ĉiuj memorigan medalon. Fine, ni kunmanĝis en salonego de ĉi tiu palaco. Estis por mi stranga impresio manĝi, sidante surplanke, meze de tiu eminentularo, inter kiu troviĝis multaj maljunuloj: tial la etoso estis iom solena.

Tamen post la manĝo kelkaj gejunuloj komencis petoli, kanti kaj sin amuzi. La ĉeestantaro petis de mi folklorajn francajn kantojn kaj poste preskaŭ postulis la francan himnon "Marseljezo", kiun - mi konfesas - ĉiu aŭskultis kun respekto kaj nekaŝita intereso.

Mi substrekas, ke de tiam mi estis adoptita de la tuta popolo, kio multe faciligos mian japanan vojaĝon.

Vespere, post la kongreso, du kamaradoj min kondukis al la "rezervita kvartalo", kie mi travivis neforgeseblan sperton. En Japanio prostituado tiam estis laŭleĝa...

Por komenci ni iras en kafejon, kie tri junaj sinjorinoj sidiĝas apud ni. Baldaŭ, seninvite, ili sidas sur niaj genuoj. Ili estas "logistinoj", al kiuj oni tamen ne povas peti, ke ili sin prostituu, laŭdire. Baldaŭ 5-6 bierboteloj kuŝas surtable. Tio necesas - ili klarigas - por aŭdaci sin konduki "pli foren" en la rezervita kvartalo. Mi lasas min tien kuntreni, ĉefe pro raporta motivo. Mi trinkas nur modere, kaj neniam perdos mian memregon. Ĝis noktomezo ni

vizitas 5 aŭ 6 logdomojn. En unu ni renkontas du aliajn kongresanojn jam duonebriajn. Tia estas la homa gento...

Jen mi estas en la rezervita kvartalo. Ni alvenas en stratetojn malbone lumigatajn. Viroj, virinoj kaj infanoj cirkulas procesie sur la trotuaroj. Virinoj; estas ekspoziciataj en montrofenestroj kaj la amaso gapas ilin, kiel je novjaraj vitrinoj. La plimultaj estas ankoraŭ tre junaj: 15-16-jaraj proksimume.

Malgraŭ la mallarĝaj stratoj la kvartalo estas iel respektinda. Ankaŭ tie neniu almozulo. Ĉio estas pura: neniu papero aŭ rubo, polvo kaj koto. Sed pasas la tempo, ni devas elekti. Do mi "plukas" proksimume 19-jaran junulinon, kiu ŝajnas iom malpli impertinenta ol siaj koleginoj. Miaj amikoj diskutas la prezon de nia gastado. Ĉio okazas sen bruo, honeste. Kiam difinita la negoco, mia kunulino afable min sekvas kun tuko pura, parfumita, kiun ŝi prenis ĉe sia "mastro".

Ni estas kondukataj al banejo, kie tri bonmanieraj servistinoj nin frotas, sapumas, poluras kaj parfumas de verito ĝis plandoj. Ĉe la unua etaĝo oni prezentas al ni verajn pupojn, bone ŝminkitajn, purajn kiel juveloj. Poste oni pretigas liton por ĉiu kaj fermas niajn ĉelojn per tiom praktikaj glitvandoj.

Mi rimarkas la silenton, la diskretemon regantajn en tiuj papperdomoj. Kredeble, ĉiuj dormas jam!

Mia kunulino respekte min atendas, ankaŭ ŝi vestita per parfumita kimono. Neniu aroganteco, sinteno simpla, mi preskaŭ dirus edzina, de juna fianĉino iom timigita. Mi demetas mian kimonon kaj ŝi zorge ĝin ordigas. (Niaj vestoj estis ŝanĝitaj kontraŭ kimonoj. Ili estos redonitaj je nia foriro, senpolvigataj kaj gladitaj).

Miainvite ŝi sidiĝas apud mi senprovoke, senparole. Tiam delikate mi demetas al ŝi la kimonon, kaj ĉion, kaj ĉion. Baldaŭ ŝi estas antaŭ mi, skulpte bela, gracia, afabla, altira kaj diskreta. Vidante, kiel tendencas nia duopo, impulsgeste, spontane, ŝi sin jetas rekte en miajn brakojn kaj komencas sian profesion de bonedukita amoristino. Momente ni estas nur du homoj, mi dirus du junaj animaloj, kiun kunigis la leĝoj naturaj kaj hazardaj.

Ĉu mi rakontu la detalojn eĉ plej intimajn? La leganto komprenu la situacion de viro juna, delonge "fastanta" pli-malpli sporade.

Estas amludoj, karesoj, ĉiam senafektaj kaj sen kaŝaj pensoj. Kelkafoje ŝiaj grandaj okuloj nigraj kaj seriozaj fikse min rigardas, serĉante en la miajn la sekreton de la angoro, kiun eble divenas ŝia virina animo. Baldaŭ pace ŝi ekdormas en miaj brakoj kun fido ne simulata. Mi ne dormas, mi ne dormos eĉ unu sekundon. Feliĉega kaj lucida mi ĝuas tiujn momentojn mirindajn kaj romantikajn. Mi rigardas ŝin dormi. Alterne mi hontas, furiozas, ekscitiĝas. Svarmo da pensoj, deziroj, kirliĝas en mia spirito. Mi penas por malkovri la belegan sekreton de nia naturo en tiu mirveka simbiozo de du estuloj tiel profunde malsamaj kaj malgraŭ tio tiel similaj.

Si vekigiĝas duone; sentante mian zorgemon, ŝi kisas min karese kaj tuj denove ekdormas. En la domo ĉio ŝajne dormegas, ĉio krom mi. La strato, tiom brua dum plejparto de la nokto, duonekdormas je tagiĝo. Ankoraŭfoje mi rigardas tiun knabineon: ĉar nun ĉiam pli tia ŝi aspektas por mi. Tiam mi falas en duondormajn sonĝojn. Senorde mi revidas la ĉefajn momentojn de tiuj lastaj jaroj : Parizon, Irkutskon, Lavardakon, mian familion, malsaĝajn aventurojn kun diversaj amikinoj, virinon misteran kaj eternan, celon kaj turmenton de vira vivo. Nun ŝi tute vekigiĝas, anĝele ridetante. Spontane ŝi brakumas min kaj arde min kisas. Ĉu ruzulino, prostitutino? sanktulino? "Stultulo, mi pensas, prenu tiun knabineon tia, kia ŝi estas kaj pensu pri nenio alia." Ĉu tiu virino sin tenas kiel femalo vendita, sklavino? Ĉu ŝi malnobliĝas? Ĉu ŝi malnobligas sin? Ne, evidenta sincero eliĝas el sia tuta persono.

Estas kortuŝa momento, profunde emociega, kaj, ĉu tion konfesi: mi esploras kielvera infano, kiun mi restis. Ŝia mirigita rigardo petas mian pardonon. Ŝi ne komprenas tiujn larmojn, kaj verdire nek mi. Fortega bezono interparoli, interŝanĝi ideojn, min kaptas. Ve, ŝi komprenas eĉ ne unu fremdan vorton, kaj mi ne la japanan. Ŝi prenas krajonon kaj paperon kaj provas per sia mistera desegno-skribo diri ĉion, kion ŝi volus konfidenci al mi. En tiu sekundo ni estas du bonaj geamikoj reciproke komplezemaj kun, ĉe tiu knabino, neesprimebla bonvolo. Dum momento mi kredas kompreni, ke ŝi petas trinkmonon: mi donas al ŝi unu jenon. Sincere ofendite, ŝi rifuzas mian sentaktan geston. Tiam mi komprenas, ke

Ŝi deziras nur etan memoraĵon. Mi havas nenion krom mono kaj... ventumilo. Ŝi skribas kelkajn vortojn sur paperpeco kaj komprenigas, ke mi bonvolu konservi tiun modestan memoraĵon pri nia neforgesebla nokto. Ankoraŭ longe ni restis nin rigardantaj, demandantaj per rigardo kaj manoj sen alia deziro ol ĝui nian reciprokan ĉeeston. Tiaj surprizis nin kamarado Matt. Tuj mi petis, ke li traduku ŝian skribaĵon: "Ho, alilandano, neniam mi cin forgesos, nek forgesos la nokton kune travivitan. Mi cin amas." El tiuj du linioj de humila prostituitino estis nekonjektitaj sekvoj. Mi estis adoptita de la japanoj kaj aŭreolita de ĉiam kreskanta prestiĝo en ĉiuj esperantistaj rondoj. Ĉar, kvankam mi petis diskretecon, kamarado Matt forte beligis mian banalan aventuron. Kompreneble, mi ne garantias la tradukon aŭtenta, sed mi havas neniun motivon kredi al perfidaĵo...

Miaflanke, sur la ventumilo mi skribis nur tiujn vortojn: "Estu feliĉa, sed forlasu tiun profesion." Vantaj vortoj, kruelaj kaj stultaj, se oni memoras la truditajn ĝenojn leĝajn kaj sociajn, kiuj regas en Japanio tiurilate. Ŝi kuras al mi kaj provas repreni sian paperon. Ŝi ja scias, pli bone ol mi, en kian senrevenan rutinon ŝin metis la socio.

Sed antaŭ kamarado Matt ŝi denove sin regas. Denove ŝi aspektas obeema virino kaj modeste nin kondukas al la lavokonkoj. Nur ŝi el la personaro konsentis min akompani ĝis la aŭto de miaj amikoj en kuntuŝiĝa strato. Ĝis kiam la veturilo malaperis en kurbo, mi vidis la naktukon de la junulino svingiĝi ĉe la ekstremaĵo de ŝia delikata braketo...

\* \*

\*

Ĉiutage Japanio kaj ĝiaj landanoj mirigis min per nova detalo, nova surprizo. Ekzemple: la unua regiono, kiun mi vizitis post la kongreso, estas la japana... "Bretonio"! Geografie, ĝi plene respondas nian francan, okcidentan duoninsulon. Estas vere mirige, ke oni trovas tie... dolmenojn, t.e. kolosajn, pli-malpli platajn ŝtonegojn, starigitajn vertikale sur horizontala, ne malpli kolosa ŝtonego. En kelkaj lokoj oni trovas arojn da tiuj monumentoj tute same kiel en nia franca Bretonio. Plie, kvazaŭ por kompletigi tiun

analogecon, staras apude temploj, kiel ĉe ni kapeletoj, simile orientitaj al okcidento.

Kiel mi bedaŭras esti malklera pri arkeologio! La leganto provu mem konkludi laŭpove!

### **Niigata, la 13an de julio 1930**

Finfine mi trovis hotelon. kiu diras "hotelo", tiu diras ankaŭ laŭregulan banon kaj bano signifas ankaŭ... Ĉarman sinjorinon tute nudan en la banujo. senhonte ŝi finas sian tualeton kune kun mi. Pri la japanaj moroj mi ekkutimiĝas. Tamen mi konfesas, ke el ambaŭ plej embarasita kaj konfuza estis mi.

### **En la antaŭurbo de TOKIO-KIBOSHA., la 20an de aŭgusto**

Hieraŭ mi alvenis en plurkultura lando post longtaga vojaĝo. Ĉi tie oni vidas kampojn de teo, patatoj, rizo kompreneble, kaj ankaŭ maizo. Ni estas en plata lando kvadratita per multaj irigacikanaloj kun kota akvo. Tiuj kanaloj utilas ankaŭ por direkti la legomajn produktojn al la ĉefurbo per boatetoj. Estas nederlanda angulo ĉi tien transportita. Laŭlonge de la vojo la legomistoj starigis subĉielajn budojn kaj ofertas siajn produktojn.

La bulvardo, per kiu mi malkovras la urbon, estas tre larĝa, kio ne kutimas en Japanio. En la centro policisto afable indikas al mi la direkton al Kibosha, kie mi estas invitita. Je la 17a mi fine alvenas antaŭ impona marmora palaco : Kiboŝa Kulturejo, el kie radias la esperantista movado tralanden. En tiu modernega klubo mi ricevas laŭvorte princan akcepton, dank' al la eminentaj esperantistoj, kiujn mi renkontis en Ĥarmino, ĉu vi memoras? Ho, japana gastamo! La honora akcepto, kiun oni faris al mi, estis certe misproporcia kun mia modesta persono. Tamen, dum mia tuta restado en Japanio kaj precipe en Tokio, mi konstante estos favorata de tiu subtila kaj delikata gastamo.

La sekvantan tagon mi devis nepre viziti la francan ambasadorejon. Tie oni akceptis min... kun granda indiferenteco, por ne diri kun malinklino. Mi aldonas, ke en ĉiuj aliaj francaj reprezentantejoj, kiujn mi poste vizitos en fremdaj landoj, mi ricevos same frostan akcepton, krom de S-ino Ambasadorino en Nankino.

Novan fojon mi spertis la proverbon: "Neniu estas profeto en sia urbeto!".

La lastan tagon de mia restado en Tokio, mi estis invitita denove de Kibosha por partopreni komunan vespermanĝon kun ĉiuj gejunuloj vivantaj ĉi tie. (Mi substrekas, ke Kiboŝa estas la plej bela kaj simpatia kulturdomo, kiun mi vizitis ĝis nun, eĉ en Sovetio). Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj parolis flue en esperanto kaj kompreneble ĉiu min alparolis rekte kaj demandis min pri Francio kaj mia vojaĝo, libere, ankaŭ pri Sovetio ktp. Laŭvorte mi estis "sufokita" kaj mirigita...

Fine, lastminute, ĉiuj senescepte, stariĝante, kriegis al mi tutkore kaj en ĝusta franca lingvo : "Vive la France, vive l'Esperanto!"... kaj belega junulino donacis al mi grandan florgarbon... Kaj ĉiuj min akompanis ĝis la pordo.

En mia modesta persono ili volis honori unue la prestiĝan filon de 1789 kaj de Verdun, ĉi tie tre popularaj.

## **En Tokio, la 23an de aŭgusto 1930**

Mi vizitas modernan leprulejon.

Kiu esperantisto ne legis "La Fundo de l' Mizero" majstre tradukitan de Kabe? Por kompreni la diferencon inter tiam kaj nun kaj kompari kun mia raporto, relegu tiun verkon kaj vi estos konvinkita.

Unue oni montras al mi konservatajn anatomiajn organojn. Tiel mi ĝustavide povas, ve, studi la ĉefajn lezojn., kiujn lepro estigas al tiuj organoj. Estas terure...

Jen ĉambrego de gravaj malsanuloj. Ci tie oni vidas la hidajn vundojn, kiuj ilin trafas. Ĉi tiu havas tute koroditan manon, jam forestas unu aŭ du fingroj; la vizaĝo de tiu alia estas tia, kiel de malbela gnomo. Jen ino, kies mammo estas ankaŭ korodita, alia havas la tutan korpon tegita de pustuloj, aŭ jen blindulo, kies lango forestas en lia buŝo.

Pureco, sunumo kaj aerado karakterizas la ĉambregojn. Admirinda estas la senfina sindonemo de la flegistoj kaj sanigistoj,

ĉiuj estas gejunuloj. Des pli ke, kiun oni diagnozus leprulo, neniam plu elirus el tiu ĉi ĉirkaŭbarita malsanulejo, eĉ se li estas kuracisto aŭ flegisto.

Ekstere oni aranĝis veran urbeton kun ĉiuj modernaĵoj. Unue, vastaj legom- kaj florigardenoj, arbaretoj, parkoj, meze de kiuj troviĝas templetoj de diversaj religioj, sportejoj, kulturdomoj, banejoj ktp...

Eĉ geedziĝoj estas registrataj sed samtempe la geedzoj estas steriligitaj. La komuna nutraĵo estas farata de sanaj laboristoj en kuirejo izolita de ĉiu kontakto.

Je la fino de mia vizitado, kompreneble mi devas publike danki kaj saluti ĉiujn. Por tion fari oni organizis kunvenon: unuflanke la viroj, aliflanke la virinoj. Inter la kunvenantaro mi rimarkas multajn infanojn.

Ĉiam mirige: multaj el la ĉeestantoj min demandas rekte per esperanto. Je la fino junulo legas al mi komplimenton en esperanto, esprimante la dankojn kaj la bondeziron de ĉiuj al mi.

Finfine, knabinaro prezentas al mi tre gracian baleton, sekvatan de kantoj kaj ĥoro. Tute laste, maljuna poeto, malsanulo, venas gratuli min en esperanto. Li diras al mi, ke li pasigis sian tutan vivon ĉi tie. Antaŭ ol reveni eksteren, mi devas eniĝi en ujejon plenigitan per desinfekta akvaĵo. Surprizo: kiam mi revenas al la vestejo, oni redonas al mi miajn urbajn vestaĵojn ankaŭ desinfektitajn kaj gladitajn.

Dankon al la direktoroj de tiu hospitalo kaj al tiel servema servistaro!... Dankon al Esperanto, dankon al Zamenhof!

## **Prestiĝo - aŭ imponeco?**

Noto: Tiu nocio pri prestiĝo kaj imponeco de nun revenos relative ofte en ĉi tiu rakonto kaj mi preferas tuj klarigi mian vidpunkton. Certe estas iom strange, ke sensignifulo kiel mi sukcesis alveni sola kaj per nura biciklo ĝis Japanio, kaj tiu fakto iom aŭreolas min iel. Tamen por mi ĝi estas tute simpla kaj natura heroaĵo, kiun oni povas kompari al faro de iu ajn laboristo, kiu ĉiutage plenumas modestan laboron. Nekonata laborulo mi estis

deziras resti: nur la celo, kiu briletas en nigra mallumo, direktis min. Cetere, nekonateco, nefameco, havigas al mi utilon, bonaĵon: neniu perdas sian tempon piedmortigi unuopan formikon, ĉu ne?

Ĝi havigas al mi ankaŭ kelkajn ĝenaĵojn, t.e. malriĉecon, solecon ktp... sed tion kompensas ĉies popola interhelpo kaj simpatio. Mi vizitas, mi vidas, notas ĉiam kaj ĉie retrovas homojn, simplajn homojn... kaj eĉ, ĝenerale, **bonajn homojn!** Ĝi tie en Japanio min gastigas, akceptas, precipe mezklasuloj. Antaŭe, en Sovetio, mi renkontis precipe kampulojn kaj laborulojn. Sed nenio pli similas kampulon ol mezklasulo: honestaj kaj sinceraj homoj troviĝas en ĉiuj medioj. En Sovetio plejofte mi loĝis kaj dormis ĉe kamparanoj, ĉi tie plejofte en prestiĝaj hoteloj, tial ke la moroj estas malsimilaj al tiuj de Sovetio, kie nunepoke ankoraŭ ekzistas nek vojoj, nek turismo, nek plejofte hoteloj...

Tial la vorto "prestiĝo" ne povas havi en Japanio la saman sencen kiel en Sovetio aŭ kiel baldaŭ en Ĉinio kaj Hindoĉinio.

### **La 7an de septembro 1930**

Je la noktiĝo mi iris promeni borde de apudloka golfo. Oni sin kredus sur la "Riviera". Grupoj de junuloj tie sin distras, sed serioze, senbrue. Mi pridemandas la kialon al mia gvidanto. Ĉiuj, li diras, inkluzive de la junularo, laboras de 9 ĝis 12 horojn en tago. La plej benplenaj libertempas unu aŭ du tagojn en monato. Dum tiuj ripozhoroj oni apenaŭ pensas amuziĝi. La distraĵoj estas maloftaj kaj multekostaj. Estas ja kino, bufedoj, distrejoj, sed la plimulto el la gejunuloj estas tro malriĉa kaj tro bridita de la ekonomiaj leĝoj por sin dediĉi al tiuj plezuroj. Tamen, la japano ĉefe ŝatas kunveni kaj sin distri familie, kaj en 1930 ekzistas tre malmultaj rondoj, kluboj, organizitaj societoj por ripozamuzo. Krome, en tiel mildaj klimato kaj naturo oni ne sentas bezonon kunveni kiel en la malvarmaj landoj. Ĉi tie ne estas baloj nek lokaj festoj. Publike la japano estas diskreta, kio klarigas la deteniĝemon de la junularo. La moroj estas pli individuecaj. Tio fariĝos pli kaj pli sentebla dum mia vojaĝo suden. Tamen, pro okcidenta influo, pli kaj pli multaj estas la junuloj irantaj brak-ĉe-brake kun junulino, ĉefe en grandaj urboj.

...

Mi estis invitita iri en Beppu-on, de F-ino Ouada kaj de ŝia amiko, S-ro Asao. Por tio mi devis enŝipiĝi en haveno Hiroŝimo, kie mi estis aparte bone akceptita de lokaj esperantistoj.

Por la unua fojo mi ĉi tie travivis la japanan kutimon de ceremonia enŝipiĝo. Ĉiuj amikoj venis ĝis la kajo por min akompani kaj mi estis apenaŭ sur la ŝipo, kiam ili ĵetis al mi multkolorajn paperrubandojn, kiuj malrapide sin deŝiras iom post iom, kiam la ŝipo foriras. Kortuŝa momento, kiam la lasta rompiĝas! Kaj ne malpli kortuŝe estis konstati, ke, kvankam ĉesis la ebleco distingi la amikojn, mi tamen povis, ĝis la lasta sekundo, en duba nebulo, videti la flirtadon de la verda flageto. Tion ne povas forgesi mi, la signifa proleto... (Noto de 1972: Des pli, ke tiam mi tute ne povis imagi la sorton trafontan 15 jarojn poste miajn karajn amikojn...)

### **Fraŭlino Inako Ouada**

La leganto bonvolu memori mian renkonton en Ĥarmino kun eminentaj japanaj esperantistoj. Nun li scias la sekvojn de tiu renkonto. Sed mi mem sciis nur poste, ke la ĉefa kaŭzinto de tiu akcepto en Japanio estas tute modestega sed prestiĝa knabino... Fraŭlino Ouada el Curuga. Ŝi estas la filino de civitano, eminenta ne nur en Curuga, sed ankaŭ en la tuta provinco, kaj eĉ en tuta Japanio. Jam en Vladivostoko atingis min afablaj invitletoj de tiu fraŭlino. Kial, por kia celo? Ne serĉu longe... Tute simple, pro... jes, divenis vi, esperantisto: pro la "interna ideo". Pro naiveco de tamen inteligenta, instruita kaj klera knabino.

Dank' al sia influo en la tuta Japanio, ŝi estis por mi diskreta kaj vera protektantino kaj ŝia protektemo egalas nur ŝian modestecon. En Beppu do mi renkontis ŝin kaj ŝi faris al mi la saman impreson, kiun povus fari al proleto la renkonto kun vera princino. Sed ŝiaj diskreteco, gracieco, distingiteco, bonvolemo rompis inter ni ĉiajn barojn (precipe antaŭjuĝojn).

Ni interamikiĝis en la plej pura senco de tiu vorto.

-----

Juna esperantisto min akompanis ĝis NAGOJA. En la vagonaro mi konatiĝis kun jura studento. Dank' al mia tradukanto li substrekis

(kion mi jam sciis), ke la plej grava problemo por Japanio estas ties galopa demografio.

Oni havas ja la impreson, ke la instancoj energie klopodas por ĝin regi. Estas problemo pri paco aŭ milito en Oriento. La okazaĵoj de 1940, ve, pravigis min. Kaj ankoraŭ hodiaŭ, en 1966, Oriento estas vulkano, kiu minacas eksplodigi la planedon. Tion oni bone enkapigu en okcidento.

Tiu studento diris ankaŭ, ke en lia fakultato oni instruas, ke la nura PACA rimedo por Japanio estas politiko pri ekscesa eksportado, responda industriigo, persistega kaj raciiga laboro. En 1966 tio plu karakterizas la japanan politikon. La ekzemplo de la "kamikazo" dum la lasta mondmilito kaj la tiama militpolitiko de Japanio plej altgrade ilustras ĝis kia MALESPERO estis truditaj la japanoj por pluvivi. La leganto meditu pri tiuj impresoj kaj faktoj; ili estas plu **aktualaj**.

Kelkajn horojn poste, Sinjoro SIRAKI, delegito de UEA en NAGOJA preskaŭ same parolis. Li kaj mi same konkludis: "**Ni estas konvinkitaj, ke la homaro kuras al katastrofo**". Mi diris al li, kaj mi ripetas : antaŭ ĉio trudiĝas en Oriento redisdono de la vivospacoj, kaj tio super ĉiu alia politika konsidero. Estas ankaŭ problemo pri nutrado, lukto kontraŭ la antaŭjuĝoj, klasaj kaj rasaj, unuvorte homkultura problemo solvenda je planeda skalo. Kaj Esperanto povas esti, **jam estas** levilo de tiu homa emancipo.

Ankaŭ pri tio Sinjoro SIRAKI kaj mi estas konvinkitaj. Pro tio mi firme kredas, ke miaj "junaĝaj ekstravagancoj" ne devas resti vanaj, kaj ke mia modesta atesto meritas alion ol mokojn.

### **La 17an de septembro 1930**

Mi estas senintenca partoprenante en bicikla kur-konkurso TOKIO-OSAKA. Sur multaj arboj verdaj papilioj kun sago montras la direkton. La policanaro lasas min veturi kaj mi "venke " atingas la cellinion sub aklamoj. Tiuokaze mi vendis kaj donis - pli ofte - proksimume 600 kartojn!

La postan tagon S-ro AKUAKU vizitigas al mi kinostudion. Mi ĉeestas filmadon. Mi konstatas, ke tiu profesio ne estas senzorga.

Por fini la vesperkunvenon ni iras en kinejon. Nova surprizo: eĉ ne unu sidilo en la ejo. La planko estas dekliva kaj matkovrita. La spektantoj, inkluzive de mi, devas sidi sur la kalkanoj kaj kompreneble eniri sen ŝuoj; sekve, estas speciala antaŭĉambro por ilin demeti. La miraklo estas, ke ĉiu retrovas siajn ŝuojn sen incidento. La filmo estas senparola. Tamen, malgraŭ ia nekompreneo pro la kulturdiferenco, mi rimarkas, ke la japano havas saman guston kiel la franco. Tamen, laŭ socia vidpunkto ni tre malproksimas de la sovetaj filmoj.

## **La kvarlatero TOKIO-KIOTO-OSAKA-KOBE**

Mi havas la impreson, ke tie oni koncentris kaj sintezis la tutan modernan vivon. Unue estas la riveroj, kiujn oni finas digi kaj taŭgaranĝi. Poste estas la vojo ĉiam en refaro kaj modernigo. En 1930 certe ĝi estas unu el la plej uzataj pecoj el la tuta mondo, tiom densa estas la trafiko. Estas ankaŭ kvarvoja elektrizita fervojo, sur kiu veturas trajnoj komfortaj kaj tre rapidaj. La ebenaĵo estas juvelo el rizejoj kaj verdantaj legomejoj. Uzante la plej malgrandajn reliefojn, ili sterniĝas en ŝtuparoj zorge irigaciataj.

Tiel mi alvenas en OSAKA ĉirkaŭ la 13a. Jam de 15-20 kilometroj la antaŭurbo estas fabrike superplena. La laboristaj suburboj estas karakterizaj. La trafiko estas tiom densa, ke mirakle mi evitis plurajn akcidentojn. Oni povas diri, ke OSAKA-KOBE-TOKIO formas nur unu grandegan urbon vertiĝodonan.

Vespere, S-ino AKUMURA, edzino de imperiestra kortegano kaj tre bona esperantistino, min atendis kun multaj amikinoj: la renomo al mi farita fruktodonis. La kunveno okazis meze de la afektaĵoj de tiuj sinjorinoj. Kompreneble, oni kantigis min en esperanto kaj en la franca. Lastminute, alvenis eminenta gasto. Tiam la ĉeestantaro ekkantis japanan patriotan himnon. Miaflanke mi kantis la "Marsejlezon". La ĉeestantaro entuziasme manklakis, salutante en mi la francan prestiĝon.

Mi enlitiĝis je noktomezo. Tamen je la sesa ni ĉiuj ekstaris. Eĉ en la monhavaj socitavoloj oni ne pigras. Je la ellitiĝo, marbano, tiom bela kaj milda estas la vetero; sur la sama paralela cirklo en ĈITA, 200 kilometrojn okcidenten, jam frostas.

## **La 9an de oktobro 1930.**

Mi forlasas KOBE al HIMEZI kun 10-12-jara knabo, varme adiaŭtate de kamaradoj N. kaj T. Mi veturas sur marborda kornico. Bona vojo, pejzaĝo bela. En OKABRU mi retrovas la spektaklon de la tradicia Japanio. Mi alvenas dum religia procesio. Sur estrado portata de trideko da viroj staras skizo de buddista templo. (Similan procesion mi vidis en Moskvo, kie la maŭzoleo de Lenin anstataŭis la templon). Sekvas multego, precipe gejunuloj kaj infanoj, kiuj krias, tumultas, dancas en kvazaŭa kolektiva deliro, akompanate de surdiga muziko. Estas vera foiro, kie preĝovendistoj miksiĝas kun bazaruloj.

Sinjoro ISAO FUJTAMI, 25-jara bonzo kaj esperantisto, deklamas al mi: "La popola gento pli kaj pli seninteresiĝas pri la religio. Mi mem ne estas tre konvinkita de la nunaj religiaj metodoj. Mi ne ŝatas mian funkcion sed ĝi estas necesa por mia vivtenado. Mi estas logata de la veturigista profesio, kaj intencas enlokiĝi en TOKIO tiucele." En lia biblioteko mi rimarkas verkojn de MARKS, LENIN kaj ENGELS. Li konfesas, ke li pli inklinas al la "novaj" ideoj ol al la religio. Tiel, precipe ĉe la studenta junularo, mi rimarkas ne malmulte da kritikemuloj, skandale montrantaj "komunistajn" ideojn. Sed ĉi tie temas pli ĝuste pri socia progreso ol revolucio.

## **OKOJAMA, la 11an de oktobro 1930.**

La domo de S-ro N. en la antaŭurbo mezmontete superstaras la urbon. De tie oni vidas fumnebulon ĉiam ŝvebantane en la valo. Vespere, komuna manĝado en familia etoso, ĉirkaŭ 15-kilogramo fiŝo, en vasta plado, el kiu ĉiuj ĉerpis per bastonetoj, gesto simila al kamparanaj moroj rusaj. Ci tie la bankedoj pli simplas ol en Sovetio aŭ Francio: neniu alkoholaĵo kaj manĝaĵo konsistanta ĉefe el fiŝaĵo.

## **HIROŜIMA, la 13an de oktobro**

La loko estas admirinda. La rizo maturiĝas kaj la rizejoj pli kaj pli flaviĝas. En iuj vilaĝoj oni komencis la rikoltadon. Per serpoj la virinoj tranĉas spikojn etfaske. La rizo estas portata sur la randojn por sia elgutigado kaj supraĵa sekigado. Poste ĝi alvenas homŝultre en la farmodomon, kie ĝi estas mane draŝata. Viroj senĉemizaj kaj senŝuaj kaptas la garbetojn per la tigo kaj forte batas la spikojn en

iom oblikvaj lignokasetoj. Tiel la greno estas kolektata en la malsupro kaj laŭmezure ensakigata.

En aliaj lokoj malpli favorataj oni akcelas la maturiĝon, plenigante la rizejon ĝis la spikoj. Tiel, laŭ mi, krom la rektaj sunradioj, ili ricevas ankaŭ la reflektitajn.

Kiam la kanalo estas pli malalta ol la rizejo, oni suprenigas akvon per norio movata de du-tri personoj. De malproksime oni kredus ilin sciuroj, saltetantaj sur la rado. Tiel mi vidis senakvigi lageton por kolekti fiŝojn en la koto. Vere tiu homa laboro ege impresis min.

Estas ankaŭ la momento, kiam oni plukas kaj sekigas la persimonojn, kiel en Aĝenio la prunojn.

### **Fraŭlino INAKO KUDA.**

Por mi Fraŭlino INAKO KUDA estis "mesio". Tiu 20jara esperantistino estas filino de eminentulo en Curuga kaj tial ĝuas grandan influon en Japanio. Iom post iom mi konsciis, ke mia restado kaj la varma akcepto ĉie ricevita en Japanio estis aranĝitaj de ŝi. Ni fariĝis geamikoj, ŝi princino kaj mi nura proleto. Longe ni korespondis eĉ post mia reveno. Kaj ŝian simplecon, gracion, diskretecon kune kun perfekta scipovo en esperanto mi volas omaĝi.

### **Beppu, la 18an de oktobro 1930.**

En Beppu ni estas sur la japana lazura marbordo. Mi ricevis kortuŝan akcepton de Sinjoro ASAO, eminenta regiona kuracisto, amiko de familio KUDA. Li vizitigas al mi la lokajn termofontojn: blankvaporajn gezerojn, bolantan koton, en kiu oni povus kuiri ovojn.

Sinjoro ASAO kiel kuracisto prezentis min al siaj kolegoj. Oni montris al mi la policinstruejon. Mi ĉeestis la trejnadon de la rekrutoj venintaj al la kamparo. Konvene remburitaj, armitaj per kanbastonegoj, ili sovaĝe batalis kontraŭ du viglaj kaj spertaj monitoroj. Oni substrekas, ke tiu metodo respondas al policanaraj

bezonoj, kaj mi komprenas, kial la japano estas tiel subtila kaj malfacile venkebla batalanto en la civitaj aŭ eksterlandaj militoj.

**La 23an de oktobro** mi denove estas en urbeto KOKURA meze de laborista distrikto. Ĉie estas nur fabrikoj kaj la esperantistoj estas ĉiuj laboristoj aŭ oficistoj. Mi parolas esperanton en esperantista lando; mi estas en ESPERIO kaj la urbo JAHATA estas komparebla kun SAINT-ETIENNE aŭ ROUBAIX laŭ industria kaj proleta vidpunkto. En la plurajn kilometrojn longa urbo ĉio estas fume nigra. Ci tie ĉiu alveninto el Sovetio estas suspektinda, tial la policanaro ĉiam diskrete ĉeestas. Mi estas plurfoje fotita de pasiaj amatoroj.

**La 28an de oktobro**, vizito al anatomia muzeo, sub gvidado de 30-jara profesoro. vidas senmankajn vicojn da organoj pli-malpli atakitaj de malsanoj. Estas terure. Oni sin demandas, kiel povas pluvivi personoj portantaj tiajn mizerojn. Kvankam interesata, mi sentas naŭzon. Post la muzeo mia amiko kondukas min al la zoologia ĝardeno de la laboratorio kaj fine al la nekropsiejo. En tiu funebreca ĉambro, malgraŭ pureco kaj rigora desinfektado, ŝvebas kadavra kaj medikamenta haladzoj. Mi angoras. Felice, mia gvidante, kiu eble min observis, tie finas la viziton. Mi preskaŭ estis svenanta.

Mi pretigas mian foriron el Japanio. Mi estas en Japanio de tri monatoj. Kiom da impresoj, memoroj, amikecoj momentaj aŭ daŭraj mi ricevis en tiu lando! Kiaj ekzemploj pri humileco, civitismo kaj persistemo donis al mi ĝiaj landanoj! Nun mi sentas aspiron forlasi tiun landon pro la venanta vintro. Ĉiuj insiste konsilas, ke mi ne iru al Ĉinio. La tiea situacio estas tre malbona. La lando estas meze de anarkio. Sed firma estis mia decido trairi Ĉinion de ŜANGHAJ al Hindoĉinio tra Kantono per propraj rimedoj: mia biciklo, mapoj kaj volo.

**La 8an de novembro 1930**, mi enŝipiĝas en NAGASAKI, akompanate de granda multego. La adiaŭoj estas kortuŝaj; mi ĝislarme emociiĝas. Adiaŭ, mirinda Japanio, adiaŭ, karaj amikoj miaj, adiaŭ tero gastama kaj milda! Mi volus, ke tio estu nur ĝisrevido, kaj tamen 37 jarojn poste mi ne plu esperas plenumi tiun belan revon.

Post trankvila vojaĝo la ŝipo alvenas antaŭ ŜANGHAJ. Pluvas. La pejzaĝo estas aflikta: verdas nur kelkaj kampoj. Ĉe la mizeraj kabanjoj de la antaŭurbo pendas plurkoloraj ĉifonoj. Kia malĝojo!

Baldaŭ mi estas ĉekaje. Meze de la tumulto flirtas verda standardeto: mi estas atendata. Diskrete mi respondas al tiu signo. Tiel estas farita kontakto kun miaj novaj amikoj.

Ĵinrikŝo rapide kaj lerte veturigas min ĝis la franca konsulejo, meze de infera trafiko. Kiel en Ĥarbino, la konsula sekretario forte malkonsilas, ke mi entreprenu 4-5000-kilometran vojaĝon en lando sena je vojoj kaj tumulto.

Daŭras la malbela vetero, kiel en Francio samsezone. Ĉe la franca katolika liceo AURORE, S-ro SERVONI kaj mi estas tre afable akceptitaj. Novan fojon mi prezentas la celon de mia vizito. "Tre danĝere, nefareble" estis al mi klarigite per gazetoj kaj mapoj. La pastro diras al mi ankaŭ pri la persekutoj, elaĉetmonaj postuloj, kiujn suferas la misiistoj. Konsekvence endas cirkuli sen mono kaj sen armilo, kion mi jam faras. Tria kondiĉo: absoluta **neŭtraleco** kaj **respekto** al la homoj kaj ties moroj, metodo, kiu ĉiam sukcesis al mi. Kvara kondiĉo: rigora sendependeco al ĉiuj, krom mia natura subteno: la esperantistoj.

Tiu bona pastro reliefigas, ke la danĝero fontas el la "defalaĵoj" de ambaŭ armeoj naciista kaj komunista. Antaŭ ol min forlasi li aldonas, ke se mi persistos en mia projekto, mi estos bone akceptata en ĉiu franca katolika misio. Hodiaŭ, la 13an de novembro, datreveno de la morto de la populara doktoro SUN JAT SEN; ĝi estas oficiala festotago kaj nur kelkaj metiistoj daŭrigas sian laboron.

Du tagojn poste mi veturas al la vilaĝo de Sinjoro PAN DI SO. Kiel veturilon mi uzas "sio-sio"n, la faman ĉinan ĉarumon. Sur la kamparo, multaj kanaloj. Por labori neniu tirbesto, neniu maŝino, nur arkaika ilaro. Cie regas mizero.

## Ĉinio en 1930

Nuntempe en Ĉinio preskaŭ ĉiuj grandaj urboj havas kvartalojn pli-malpli okupatajn de fremdaj armeoj. Jam de la komenco de

l' jarcento, revolucio kaj enlandaj militoj teruras tiun kontinenton per impulsoj de respublikano kaj poste respublikestro: SUN JAT SEN. La celo: transformi mezepokan civilizon en modernan.

Baroj: Lingvoj, skribo, malklereco, malriĉeco, mizerego ktp... Antaŭjuĝoj, malklereco kaj religioj, kiuj profitas de tiu malklereco. Ekonomio esence bazita sur terkulturo kaj ĝenerala manlaborado. Geografio: grandegaj riveregoj transiras la tutan landon, sed tiu lando ankoraŭ ne havas rajdvojojn, preskaŭ neniun fervojon. Tamen delonge ekzistas densa reto da kanaloj kaj piediraj vojetoj. La tuta transporta trafiko efektivigas preskaŭ nur per ŝipoj kaj per homaj ŝultroj. Bestan brutan tiradon oni preskaŭ neniam uzas, pro tio ke manlaboristaro estas tro abunda.

Politiko: ĉiu provinco estas memstara teorie, sed praktike suferas pli-malpli fremdan, aŭtoritatan influon... pere kaj fare de militaj generaloj, duonbanditoj, kiuj rabe mastras unu aŭ plurajn provincojn. Inter ili la plej fama: ĈAN KAJ ĈEK, bofilo de Sun Jat Sen. Nuntempe li fariĝis ĉefgeneralo kaj respublikestro, post sangaj bataloj kaj teruraĵoj, precipe kontraŭ la novaj alvenintoj sur la politikan scenejon: komunistoj, kies gvidanto estas preskaŭ ne konata homo: MAŬ ZEDONG.

Foririnte de sudo, post historia "longa marŝado", Maŭ en kelkaj jaroj sukcesos iom post iom milite rekonkeri la tutan Ĉinion kaj forpelos Can/-jkaj-ĉek en Formozon (ĉine, Tajvan). Tiu rekonkerado de Ĉinio estis ebla precipe dank' al la helpo de la soveta estro Stalin.

Por konkludi ĉi tiun ĝeneralan superrigardon pri la tiama Ĉinio, mi ne flankelasu la iom misterajn sed tamen potencegajn organizaĵojn, kiaj estas la religiaj fremdaj misioj.

### **La 15an de novembro 1930.**

Tipa mezepoka vilaĝo, apud Ŝanhajo. Granda surprizo estas por mi "sio-sio", granda unuopa ĉarumo kun longaj brakteniloj. Meze, benko aŭ sidilo, sur kiu du personoj povas sidi dors-dorse.

Gudra vojo nin kondukas ĝis tiu vilaĝo. Kaj subite la vojo ĉesas. Al miaj okuloj aperas domaro kiu memorigas al mi iajn vilaĝojn de la franca montaro Pireneoj.

Tri el tiuj "sio-sio" atendas min, kun tri viroj por konduki ilin kaj tiel nin porti. Vizitas kun ni la vilaĝon S-ro Ŝreber kaj lia edzino, Usonanoj de Kalifornio. Li havis okazon projekcii lumbildojn pri sia regiono, kiu antaŭ dudek jaroj estis dezerto. Li aŭguras, ke dank' al la ideala klimato tiea, le regiono kie situas Holevudo fariĝos paradizo... Ve, en 1972, la "paradizo" fariĝis infero pro polucio, en la daŭro de 50 jaroj!

Ni do ekiras sur mallarĝa vojeto iom pavimita, ĉirkaŭ unu metron larĝa. Tiu vojo serpentas tra kaj trans kampoj rimarkinde kulturataj, en kiuj mi rimarkas tritikon, kotonon, rizon, maizon, terpomojn ktp. Sufiĉe ofte ni transiras kanaleton per konvekso ponteto el ŝtonoj (pli malofte el ligno).

Tiel ni veturas sufiĉe komforte dum ĉ. duonhoro por alveni en vilaĝon Ci-Pao kiu kuŝas meze de aro da kanaloj, foje 10-15 metrojn larĝaj. Plian fojon mi rimarkas nek. brutaron, nek bestan tiradon (kiel mi diris supre). Ĉiuj laboras, inkluzive de infanoj kaj virinoj, kiuj mirinde kapablas roli kiel trenbestoj longajn horojn meze de rizkampa koto, sub arda, senkompata suno aŭ sub falegoj de pluvo.

----

Ĝis NANKIN mi veturas laŭ fervojo paralela al montaro senvegetaĵa kaj senviva. Dekstre vastas JANGZI-valo. La grenrikoltado estas finita kaj jam la kamparanoj komencas irigacii siajn bienojn. Fiŝistoj skrapas la kanalfundojn serĉe al salikokoj kaj angiloj. Pli fore, ili senakvigis lageton kaj tiel rikoltas grandan kvanton da svingiĝantaj fiŝoj. Ĉi tie ne estas distro sed vivneceso. Sur monteto oni konstruas vilaĝon kaj ĉio estas transportata dorse aŭ per sio-sio. Tie loĝos la laboristoj de proksima fabriko gardata de soldatoj. Antaŭ ĝia enirejo staras en eluzitaj vestaĉoj, supozeble senlaboruloj petantaj postenon.

Ĉe stacio TAIPING-MEN, en la antaŭurbo de NANKIN, mi forlasas la fervojon. Baldaŭ aperas unu el la pordoj de la urbo, kaj

mi eniras tra aŭtenta levoponto ankoraŭ funkcianta. La murego fermas la breĉon de duoncirklo el altaj montetoj igantaj NANKIN urbo preskaŭ nature fortikigita. Pasinte la levoponton, mi vidas kun surprizo kultivatajn kampojn tra kiuj mi veturas duonhore antaŭ ol trafi grandan espanadon, kie soldatoj futbalas.

Ĉe la konsulejo mi estas afable akceptita de la konsuledzino, kiu bonvole proponas al mi etan manĝon. La konsulo forte malkonsilas ke mi iru al KANTON tra HUNAN. La regiono estas tre danĝera kaj **neniu** povos ion fari por mi. Ion similan oni deklaris al mi en la prefektejo de LIONO, kiam mi petis mian pasporton.

### **Nankino, la 29an de novembro 1930.**

Kio rezultos el tiu granda mutacio en Ĉinio ? Ni ne forgesu, ke ĝis nun ĉi tie en Ĉinio la koncepto pri nacieco estas tre malforta ĉe la amasoj analfabetaj, do malkleraj. La ĉefa deziro de tiu popolaro estas... plu vivi.

La ĉefa celo de ĉiuj revoluciaj movadoj, de Sun-Jat-Sen ĝis Maŭ Zedong, precize estas antaŭ ĉio unuigi la tutan Ĉinion kaj krei modernan nacion...

Foje mi vidis aron da kadetoj, fiere vestitaj, rikane moki soldataĉojn, duonnudajn, senŝuajn, malbone ekipitajn. Mi tiam konsciis, ke nepre okazos baldaŭ neiversigebla mutacio ĉe malsataj popoloj, nekomparebla kun tio, kio povus okazi ĉe Eŭropa skalo.

La ĉina homaro fermentas, moviĝas, bolas, al estonteco rapide antaŭeniras. Ĝi certe mirigos kaj eble timigos la tutan tergloban homaron tre baldaŭ. Kia estos la rezulto de tiu nekalkulebla mutacio??

### **HANKOŬ, la 3an de decembro 1930.**

Hodiaŭ vespere mi denove devas foriri: mi iros al Hunan, provinco nun fame plej danĝera pro rezistado de iu Maŭ Zedong estranta komunistajn hordojn. Kial mi aliras tien malgraŭ la oficialaj avertoj? Unue, pro tio ke mian planon mi firme decidis, longe antaŭ mia alveno en Ĉinio. Por trafi Kantonon kaj Hindoĉinion jen estas la vojo geografia plej racia. Poste la esperantistaj kamaradoj donis al

mi mapojn pruvantaj, ke ekzistas vojembrioj ĝis Kantono. Laste, okazos al mi nur kio devos okazi. Mia kutimo estas respekti kiun ajn. Tio ĉiam sukcesis por mi; kaj sperto pruvis, ke veras reciproke.

Aliaj du nepraj kondiĉoj por daŭrigo:

- Mi ne havas sufiĉe da mono por retroiri, eĉ al Ŝanhajo per ŝipo.
- Mi volas profiti de la bela vetero por iri pli suden al la suno, la varmo, ĉar ekvintras.

En Ĉang-ŝa la 7an de decembro, Sinjoro U-I kondukas min al la provinca ĉefgeneralato. Ĉi tiu min akceptas tre afable. Li jam scias pri mia vojaĝo ĝis tie ĉi, inkluzive en Sovetio. Miademande li indikas, ke la vojo al Kantono estas sendanĝera. Nur la lastajn 300 kilometrojn de montara regiono mi devos trairi piede aŭ per ŝipo. Li subskribas ĉiujn miajn paperojn kaj havigas al mi 100 dolarojn.

Denove jen mi survoje. Kvankam estas la 12a de decembro, mi banas min en marĉeto. Kampuloj kaj vojlaboristoj invitas min partopreni ilian simplan manĝon. Ilia honesteco estas ekzempla. Neniom mi konstatos plej etan ŝtelon de iu ajn pakaĵo, kiun devige mi dismontras. La nokto estas iom malvarmeta sed ne frida.

Mia biciklo, tiu eta maŝino, kiu portas tiom da pezo kaj tiel facile traveturas padojn, allogas amasan scivolemon. Kun respekto ili ĝin karesas, palpas, mezuras ĉiudirekte per fingro kaj rigardo. Se mi sonorigas mian avertilon, ĉiuj forkuras.

Ĉi tie, neniom policisto. Manĝi estas hazarda entrepreno, ĉar la monoj estas tre malsamaj. Distriktoj akceptas nur la nordan monon, aliaj nur la sudan. Por la popolo estas la kupraj sapekoj truitaj kaj ŝnure portataj. Estas la dolaroj de Hongkongo, kiuj de Ŝanhajo, de Kantono el arĝento kaj biletoj ne uzataj ĉe la etpopolo, sen ne paroli pri la vojaĝoĉekoj usonaj aŭ japanaj. Estas vera kapdolorigilo, ĉar la kurzoj senfine varias.

### **Apologio de ĉinaj riverŝipaj laboruloj**

La 16an de decembro 1930 mi estis jam atinginta la plej altan punkton de mia irado tra la montaro, kiu apartigas la provincon de Hankoŭ disde tiu de Kantono.

Dume mi volis iri de Nin-ĉan al Pin-ĉeu, meze de alta montaro. Mapon mi ne havis. La tuta vojplano estis farita al mi de la Hankoŭaj esperantistoj, sur simpla paperfolio. Mi do vagis piede ĉe pintoj de la montoj, kiuj ĉiam apudas torentojn en mirinda, belega pejzaĝo.

Tute sovaĝa naturo... sed ankaŭ duone dezerta regiono, tre danĝera... jam kelkajn fojojn trafis min akcidentoj sur la piediraj vojetoj - kiuj, feliĉe, ĉie ekzistas en Ĉinio, kaj kie ofte mi trovis ŝultrotransportistojn irantajn karavane. Iufoje mi trovis eĉ tian karavanon, kiu transportis... pezegan, plumbitan ĉerkon jam de pli ol mil kilometroj... Mirige? MirindeEE Sed tia estas ankoraŭ la transportrimedo en Ĉinio.

Mi do estis sur iu montopinto kaj fakte vojo malaperis. Mi ekvidis malproksime sur torento, kiu fluas piede de tiu pinto, boaton, kiu direktas sin al mi. Mi vokis la boatiston. Feliĉe li aŭdis min kaj precipe konsentis min enŝipigi... Kaj bonegan ideon mi havis, ĉar dum la tuta tagresto, nia "nuksoŝelo" vagadis en fantasmagoria, nepriskribebbla, sovaĝa praa regiono.

Dum tri tagnoktoj mi travivis la plej memorindan danĝerplenan, tamen agrablan aventuron. Por ankoraŭ pliigi la danĝeron, ekpluvis, pluvetis, pluegis... kaj nia boato saltegis, flugkuris sur la pintoj de ondaroj... kaj niaj boatistoj (la patro kaj la filo) lertamane gvidis la boateton meze de ŝtonaroj, rapidfluegoj kaj akvofaloj...

Tiuj du viroj, malgrandaj, sekaj, kun haŭto sulkigita kaj tanita, malmulte parolas, ridas, manĝas kaj trinkas. Ilia laboro estas tre danĝera kaj ilia respondeco tre granda. Mi povas sentime skribi: jen sintezo, modelo, sed jen ankaŭ la tipo mem de ĉina raso, ĉina popolo, obstina, inteligenta, laborema, krude simpla, konsci plena kaj honestega...

Iliaj pacienco kaj atentemo estas senlimaj, same kiel ridinde malgranda la prezo de ilia laboro.

Sur la bordo de la torento jam aperas antaŭ niaj okuloj unuopaj dometoj kaj poste vilaĝetoj, unuj post la aliaj. La akvo estas mirinde pura kaj riĉa je fiŝoj. Da ili ni vidas kelkfoje milojn. Sur la bordo mi rimarkas ankaŭ ofte lavistinojn, kiuj salute svingas la manojn, kaj ankaŭ zorgoplenajn fiŝkaptistojn.

Foje la torento estas kvazaŭ barita per ŝtona murego kaj tiam ĝi fariĝas furioza: akvofluo devas nepre transiri tiun baron.

Tute surprizita, ĉar ni estas en decembro, mi ofte rimarkas virojn en la akvo ĝis la ŝultroj.

Ili povas esti tridekope, foje pli. Ili tiel portas la ŝipon super la kapoj per etenditaj brakoj, kontraŭflue, meze de tumultaj akvoj. Tiu sistemo anstataŭas neekzistantajn kluzojn. Sed kian heroan penadon tio postulas!

Samtempe nia kondukisto streĉas sian atenton kaj gvidas nian "nuksoŝelon" super la pintaro de dekobligita, furioza torento kaj evitendaj perfidaj rokaroj. Foje okazas, ke la rapidfluo sinsekvas duope, triope, kaj mi tremegas pro timo kaj frosto. Por la turismamatoroj, tio estas "sporto" kaj kia sporto!

Tial mi nepre volas omaĝi tiujn verajn sorĉistojn, la riverajn ĉinajn ŝipistojn.

Tiu memorindaĵo elvokas al mi, ke antaŭ apenaŭ duonjarcento miaj samregionanoj vivis similan vivon sur la francaj riveroj Garono, Dordonjo, Baizo ktp... Ofte dum mia junaĝo oni aŭdis similajn rakontojn de ties riverŝipistoj. Sed aŭdi kaj travivi estas malsimilaj aferoj.

Antaŭ la 16a la boato alvenas en vilaĝon Pin-ĉo, la finon de mia ŝipirado. Mi pagas unu kantonan dolaron (kelkajn francajn frankojn), sed por mi tiu transirado havis ne takseblan valoron. Ne unu vorton ni interŝanĝis kun tiuj du bravuloj, sed tamen dankon, dankegon al vi, senfamaj herooj! Dankon, dankegon al la esperantistoj de Hankoŭ, kiuj ebligis al mi tiun unikan travivaĵon...

Pri Pin-ĉo mi konservis tre malbonan memoron. Tiam ĝi estas rifuĝejo de monludistoj kaj vojrabistoj, vere sovaĝa, natura kaj homa timigejo. La stratoj malebenaj estas mallarĝaj kaj malpuraj kaj en ĉiu domo oni monludas kaj fumas opion. Ĉi tie mi vidas nur malinklinajn vizaĝojn. Eĉ ne plej etan lumon de simpatio al mi. Ĝi estas la hida malbeleco de la homa egoismo.

Noktiĝis... Finfine, hazarde, mi sukcesis trovi kampanan lernejon, kie la maljuna lernejestro min gastigis afable kaj eĉ

proponis al mi liron por tranokti, kaj tio, dank' al permesa papero, kiun donis al mi la generalo de Ĉan-Ĝia.

### **Sabaton, la de decembro 1930.**

Mi estas tre afable akceptita en katolika itala misiejo. Ĝi aspektas malriĉa, la pastroj vivas modeste. La lernejo bone situas, aerumita, prizorgata. La infanoj montras la saman sciavidon kiel en Sovetio kaj Japanio. Sama simpleco ĉe la generalo-guberniestro, 40-jarulo sobre vestita. Lia vizaĝo vidigas simpatian rektanimecon. Tamen la nokton post mia alveno liaj soldatoj arestis kaj ekzekutis 200-300 personojn suspekto komunistajn, rakontas mia interpretisto.

**Noto:** Malgraŭ la afabla akcepto ĉie ricevita, mi devas konfesi, ke tiuj misiejoj estas ŝtato en la ŝtato. Tamen mi aldonas, ke ilia instru-kaj kultur-laboro estas neneadebla kaj ili estas tre ŝatataj de la popolamasoj. "Ni, misiistoj, venis pro alvokiteco, ne pro persona profitemo".

Hieraŭ estis tre varme: 25 gradoj C. Sed hodiaŭ blovas norda ventego kaj la temperaturo malaltiĝis ĝis 10 gradoj. De Ĉang-ŝa al Kantono mi vidis neniun izolitan farmobienon, sed nur vilaĝojn kiel en Sovetio. Ĉi tie estas eĉ urbetoj plejofte ĉirkaŭitaj de dikaj kaj altaj muregoj kun levoponto.

**En Kantorion mi eniras la 24an de decembro** post traŭro de florumita antaŭurbo kaj vicoj da domoj kun ĉiu sia ĝardeneto antaŭ la pordo. Momente Kantono estas nur grandega vilaĝo, aŭ pli ĝuste kuniĝo de vilaĝoj. Neniu tramo, nur aŭtobusoj. Tute novaj kaj rektliniaj arterioj atestas, ke la urbo estas en plena moderniĝo.

La konsulo en Kantono akceptas min kun mieno distanca kaj suspektema. Mia vestaro nocas al la franca prestiĝo. Krome, franco trairinta sen damaĝo danĝerajn komunistajn regionojn, kaj plie akompanata de du ĉinoj, estas vere inda je suspekto. Kiam mi diras mian intencon iri al Hindaĉinio terveture, li krias pri frenezaĵo. Ĉifoje la entrepreno ja estas vere hazarda. La limo inter Ĉinio kaj Tonkino konsistas el preskaŭ netransireblaj montoj trarabataj de dizertintoj. Pli sekure estos enŝipiĝi.

"Ĉiukaze, diras al mi la konsulo, por ni, laŭleĝe, vi estas vagulo kaj kompreneble suspektinda! ... Vi povos iri en Tonkinon nur per la vojo, kiun mi devigos al vi laŭiri. La landlimo inter Ĉinio kaj Tonkino estas nuntempe barita de "tonkinaj partizanoj", kies ĉefo estas sen ia dubo iu Ho-Ki-Min... Mi volas kredi, ke vi estas revulo, eĉ utopiulo, sed mi estas realulo, eble la perfekta tipo de teknokrato, sed mi juĝas objektivite la nunan situacion de Hindoĉinio, kaj mi agas logike kaj konsekvence." Noto (1930) : Tamen mi kredas, ke li estas honestulo kaj li bone kaj klare antaŭvidas la estontan disvolviĝon de la interrilatoj inter Francio kaj Hindoĉinio. Ankaŭ mi cetere.

### **Kial kaj kiel mi instruis Esperanton en Kantono...**

En Kantono mi estis akceptita de du eminentaj civitanoj kaj esperantistoj S-roj Von-Ken kaj Aŭ-Sin-Pak. Ili ambaŭ oficas en publika instruado kaj ĉefaj ĵurnaloj de Kantono. S-ro Sin-Pak proponis al mi instrui Esperanton en urbaj atlernejoj.

Mi konsentis, ĉar kontraŭe de Japanio, ĉi tie en Kantono la esperanta movado estas relative malvigla. Des pli ke mi tuj juĝis S-ron Sin-Pak, kiu, spite kaj eble pro tio, ke li estas altrangulo, estas simpla, honesta kaj sincera homo. Kiel ĉiu novulo li tutkore dezirus levi la kulturnivelon de la tuta popolo. Feliĉe troviĝas tiel en la vasta mondo aroj da modestuloj, kiuj senbrue agadas por la homaj frateco kaj feliĉo.

Neniam, de la komenco de mia vivo, mi tiom multe laboradis per cerbo, kiom por ellabori mian kurson laŭ la rekta metodo de pastro Ĉe el Eŭropo. Ĉion mi devis aranĝi, ĉar mi havis eĉ ne gramatikon kaj multaj el miaj gelernantoj eĉ ne sciis, ke ekzistas alia skribsistemo, ol tiu, kiun oni praktikas en Ĉinio. Mi devis do dekomence instrui la latinan alfabeton.

Sincere mi devas konfesi, ke la plej multaj el miaj gelernantoj tre interesiĝis kaj bone lernis. Baldaŭ mi komencis konscii la diferencon inter fizika kaj kapa laboroj kaj mi komprenis, ke naiva kritiko de manlaboristo kontraŭ "intelektula" laboro estas granda eraro kaj nova stultaĵo, pro niaj antaŭjuĝoj...

Mi baldaŭ spertos ankaŭ, ke esperanto naskas ĵaluzon kaj kontraŭstaremon fare de diversaj ne malpli antaŭjuĝemaj rondoj.

Fakte, je la fino de mia kursa instruado, junuloj manifestaciis kontraŭ mi. Kaj sur iu strato mi rimarkis kontraŭ mi eĉ ksenofobion. (Tiu ksenofobio estas zorge "kulturata" de iaj ĉinoj kontraŭ blankhaŭtuloj ĝenerale).

**Hodiaŭ, dimanĉon la 8an de februaro 1931**, la vetero estas malvarma; tial mi preferas iri promeni en la centron. Mi konstatas urboplanisman deziron laŭ modernaj normoj: longaj kaj larĝaj avenuoj arboborderitaj. La metodo estas inversa al la soveta. Unue oni konstruas la straton kun trotuaroj, glata pavimo kaj tramreloj. Por suprenigi la materialon la manlaborularo estas ĉefe virina. Malgraŭ la granda lerteco de tiuj virinoj estas multe da akcidentoj kaj miascie ne ekzistas sociasekuro. Fine mi trafas la eŭropan "koncesi-limon". Ĉi tie ne estas stratoj. Ĉiuj vilaoj, palacoj, estas konstruitaj ĉirkaŭ grandega parko kun sportejoj. Fosaĵoj kaj pikdratoj disigas tiujn du mondojn.

### **La 25an de marto 1931.**

Hieraŭ forlasis min miaj du kamaradoj el Hango. Mi feliĉas, ĉar mia restado naskis novajn "alvokiĝojn". Post dusemajnaj pluvegoj la temperaturo multe altiĝis. Varmas kiel dum someriĝo en Francio. La kampara aspekto rapide ŝanĝiĝis. La arboj floras. En la kotaj rizejoj virinaj taĉmentoj en akvo ĝisgenue komencis la rizprikladon sub suno senkompata.

**Aprilo:** Nova vizito al Sinjoro Konsulo. Lia opinio ne ŝanĝiĝis.

### **Bilanco de mia restado en Kantono.**

Tiu etapo en Kantono estis por mi unu el la plej penigaj pro tiu plurmonata strebado por realigi mian manuskripton de rekta instrumentado de Esperanto. Kio restos estontece el mia modesta laboro?

**Hodiaŭ, 14an de julio 1931:** mi ne estis invitita de la franca konsulo por festi kiel kutime la nacian feston. Tute egale: post tri tagoj mi foriros al Hindoĉinio...

**La 17an de julio 1931:** foriro de Kantono al Hindoĉinio.

Jam de la sesa kaj duono matene mia dormoĉambro plenas je miaj plej bonaj amikoj esperantistaj. Ili min akompanas ĝis la stacidomo, de kie mi forveturos, laŭirante la fervojon. Antaŭ nia disiĝo ni interfotas nin kaj adiaŭmanĝas kune. Mi foriras je la dekdua.

**La 25an de julio**, mi profitas de ripozo ĉe usonaj pastroj de Jankon Na por revizii mian pakaĵon kaj mian biciklon. Du tagojn poste mi traveturas la landliman estuaron. La vetero fariĝis peza, minaca. Baldaŭ blovas tempesta vento. Mi suferas teruran marmalsanon. Feliĉe la ŝtormo kvietiĝas kaj la vojaĝo finiĝas kiel agrabla promeno en gondolo meze de koridoroj de verdaĵo kaj plaĝoj. Miaj kunpasaĝeroj afable mokas mian palan mienon. Kelkaj eĉ provas ekkonversacii... Post lasta enŝipiĝo en nuksoŝelon de ĉina pasigisto, jen mi en FORT BAYARD. Ĉe la unua domo, kiun mi renkontas, mi vidas kun emocio "OFICEJO PRI NAVIGADO" skribitan en la franca. De tri jaroj ili estas la unuaj vortoj, kiuj mi legas en tiu lingvo. Iom poste, nova agrablaĵo: bierglaso, kiun proponas al mi edzino de ŝtatoficisto. La lastan mi trinkis du jarojn pli frue en Krimeo.

Kiel ĉiam mi vizitas la Ĝeneralan Guberniestron loke rigardatan kiel komplezemulon. Tamen novan fojon mi konstatas la saman klasmalestimon, la saman zorgon protekti la francan prestiĝon. Mokridete li do telefonas al konatino sia: "Ha, lo, antaŭ mi 25-jara ulo bicikle vojaĝanta ĉirkaŭ la mondo. Tio estas, ke jen lin portas lia biciklo, jen li portas sian biciklon. Bonvolu, mi petas, dutritage lin gastigi. Sed petu nenium monon. Pagos mi." En tia malŝatema diferencigo kuŝas la tuta mizero monda.

Leĝa institucio: privirina trafiko.

Suboficiroj vizitigas al mi najbaran urbon Cezan. La postan tagon ĉe unu el ili mi vidas junan kaj belan ĉininon, kiun la knabo estis rimarkinta. Tiuokaze mi ekscias, ke ekzistas nevertigita konsento inter la aŭtoritatoj kaj la prostituaj entreprenoj. Tio koncernas ĉefe la eŭropajn militistojn. Ili povas ankaŭ kontrakte edziĝi, kie laŭ ĉina kutimo ili **aĉetas** virinon por difinita tempo kaj sub certaj kondiĉoj. Kiam ili revenas al Francio, ili forlasas virinon kaj infanojn. Ĉar la militistaj instancoj postulas tre malfacilajn

kondiĉojn por la foriro de la tuta familio, ĉefe koncerne la suboficirojn. Tiuj infanoj konsistigos la unuajn vjetnamajn batalionojn en la milito kontraŭ Francio. Ankaŭ iliaj patrinoj ludos gravan rolon dank' al sia trilingvismo, franca, anama kaj ĉina.

**La 2an de aŭgusto**, mi forlasas Fort-Bayard al la misio de Pak Hoj, kie mi estas kore akceptita. Mi ekscias, ke la ĉinaj instancoj multigas la administraciajn malfacilaĵojn. Evidentas, ke ili intencas min elpuŝi.

Revene de mia vizito al la Konsulo: la bravaj pastroj estas konsternitaj; oni petis, ke ili tuj min elpelu. Senhezite la Konsulo proponos al mi etan dormoĉambron en parkmeza ĝardendomo, mobilizante por tio ĉiujn siajn servistojn.

Mi konservas pri Sinjoro Konsulo kaj Sinjorino senmortan rememoron. Malgraŭ sia rango ili montris ĝentilecon, toleremon, simplecon dum la vespermanĝo surtabligita de la dommastrino mem. Ni parolis pri mia vojaĝo kaj esploris la mondan situacion. Niaj konkludoj ne estis optimismaj.

Nun mi veturas en Tonkino. La regiono estas unu el la plej fekundaj el la mondo. Tamen la loĝantaro estas mizera, ankoraŭ pli ol la ĉina. Malgraŭ sia nehavo la ĉino fine min malestimis. Ĉi tie mi legas nur korpreaman timon en la rigardoj. Eĉ la junularo estas frue eluzita de laboro kaj manko. La virinoj, ankaŭ la junaj, maĉas betlon. La maĉaĵo konsistas el betlofolio, peco el ia nukso kaj iom da kalko. Tiu maĉado laŭdire efikas desinfekte kaj sensoifige kaj misformas buŝon makulitan de betloruĝa salivo. Alia eco de tiu popolo: kiel la ĉino, ĝi estas multe pli pruda ol la japano.

**La 9an de aŭgusto**, sub pluvego, mi alvenas en Hanoj per ponto DOUMER, laŭdire la plej longa en la mondo. Kelkajn tagojn poste, invitite de franca vicsubleŭtenanto, mi devas respondi nekutimajn demandojn de unu el la gastoj. Li estas oficisto de la militista sekurservo. Li konfesas al mi, ke **ĉiuj malliberejoj, civilaj kaj militistaj**, superplenas. Iomposte mi ekscias, ke mi estas tre suspektinda al la militistoj. Eta enketado min konvinkas, ke la tuta malbono venas el la konfidencaj raportoj de Sinjoro Konsulo en Kantono.

**La 24an de aŭgusto 1931** mi forlasas VINH, akompanate de du junaj skoltoj. Ni disiĝas ĉe pramo, kie mi konatiĝas kun S-ro Nguyen Tan Lin. Tiu renkonto havos feliĉajn neesperitajn sekvojn en Sajgono. De tiu pramo mi penetras en mizeregan regionon. Ŝtonoza grundo, senakva klimato. Sur la vojo senkompata mi renkontas vicojn da portistinoj provizantaj la vilaĝojn per maizo, kelkaj fruktoj, ligno, preskaŭ ne rizo. Ju pli suden mi iras, des pli da tiaj vivaj skeletoj mi renkontas. sammomente greno putras en grandega silo. Jen kial mi estis kaj estas rifuzanto pri civilizacio nekapabla certigi la pluvivon de siaj kolonioj. Jen kial mi subtenas ĉiujn, kiuj luktas kontraŭ mizero korpa kaj anima. Pro tio mi persistas opinii, ke simpla, internacia lingvo estas unu el la iloj de la homa emancipiĝo. Tiurilate Esperanto montris sian kapablon, kaj se mia rakonto iomete kontribuis al tiu emancipiĝo, mia surtera vivo ne estis vana...

Militista taĉmento gastigas min por unu nokto. Mi ekscias, ke la malsatego kaŭzas timigan mortadon. Okazis ribelo. Sekvis drasta punhaltigo. El la 600 kaptitoj, 60 estis mortpafitaj. La plej certa rezulto de tiu metodo estas konservi malamon kaj naski venĝemon: Dien Bien Fu estis ties satigo.

### **La impetega invado al nordorienta Azio, kiam?**

Mi estis invitita de gesinjoroj X. Li estas kuracisto kaj, kiel D-ro Ŝvejcer en Afriko, aplikis ĉi tie humanan metodon de amasa, senpaga kuracado. Ambaŭ estas parizanoj kaj kvankam tre kleraj kaj eminentaj, ili havas simplajn emojn. Nia interparolado, kiu ĝis nun temis pri banalaĵoj, subite graviĝis, kiam ili demandis al mi: "Kion vi rakontu pri Ĉinio kaj Sovetio? Kiaj estas viaj impresoj?". Sincere mi rakontis ĉion, kion mi vidis en ambaŭ landoj.

- Malesperiga antaŭ 10 jaroj, admirinda nuntempe, timiga tre baldaŭ... Bedaŭrinde - aŭ feliĉe? Inter Ĉinio kaj Sovetio, spite nunan favoran politikan akordon, ekzistas tro da historiaj kaŭzoj de konflikto, precipe teritoriaj.

Militkonflikto inter tiuj landoj estiĝos nur en oportuna tempo. Precipe ĝi okazos, kiam Ĉinio sentos sin sufiĉe armita kaj fortigita. La celo? Unuavice, la grandegaj teritorioj duone dezertaj (en 1931)

de la nordorienta Siberio, kiu logas ankaŭ Japanion kaj Usonon cetere.

Krom se ambaŭ kondutos prudente kaj singarde (kio estus miraklo!), vole-nevole, pace aŭ malpace, estos necese, ke la torento da homamasoj svarmantaj en Ĉinio iam forpuŝu la nunajn landlimojn kaj ili transe disŝutiĝos en tiujn regionojn. Des pli, ke oni ilin malkovris riĉegaj je naturaj mineraloj, kiujn jam ekspluatas sovetianoj. Same kiel antaŭ unu jarcento Usono travivis la "impeton al oro", same, pli-malpli frue, okazos ĉina sinĵetado nordorienten de Azio.

**Kia estas la etoso en Hindoĉinio?** (Tion mi skribis en aŭgusto 1931 en la urbo Pak-Hoj en Hindoĉinio kaj spite la duan mondmiliton, tiu rimarko, ve, estas des pli vera!)

Prestiĝo = famo, brilo.

La unua zorgo de la tiamaj francaj registaroj estas, ke la "franca famobriilo" superu ĉion... "Cetere, Eŭropano, per bastono, kapablas sole spiti facile kaj obeigi 50 indiĝenojn", diris al mi la franca ŝipestro, kiu enŝipigis min al Hajfongo... Ĉi tie Franco havas, antaŭ ĉio kaj ĉiuj, ĉiajn rajtojn. La indiĝenoj rajtas nur lasi sin "protekti". La ekzemplon oni donis al mi, ĝuste kiam la ŝipo ĉekajiĝis: per skurĝego, kiam tonkinaj laboruloj prezentis sin sur la ŝipan ferdekon, ilin oni akceptis kvazaŭ oni akceptus lupojn. Nur sola "civilizisto", t.e. serĝento el "indiĝena" polico kontraŭ proksimume cent laboristoj policis per nura skurĝo. Jen do mia unua bildo pri la franca Hindoĉinio, honorparole.

- Ĉar neniu sin prezentis por garantii vian honoron kaj honestecon, diris al mi la policisto kaj la ŝipestro, por ni leĝe vi estas nefidindulo kaj ni ne povas vin lasi elŝipiĝi. (Francan teritorion oni do rifuzas al franca civitano !)

Post kelkaj horoj oni tamen permesis al mi elŝipiĝi, kondiĉe ke mi prezentu min senprokraste al oficisto, respondeculo de la polico. Tiu ĉi min akceptis per jenaj vortoj (kiujn mi tuj poste notis per stenografio): "Foriru kiel eble plej rapide el Tonkipo, kie nun ni suferas teruran ekonomian depresion... Ĉiuj komercaj firmoj fermiĝas kaj francajn laboristojn oni retrosendas en Francion, aŭ oni

soldatigas, aŭ ili fariĝas senlaboruloj kaj malkontentuloj... (Kiam la ŝipo dronas, tiam kaj tial la ratoj foriras...) La aliaj, kiel mi, li aldonis, havas aliajn zorgojn, ol interesiĝi pri "vagulo" kiel vi."

Fakte, la tieaj respondeculoj de Hindociĉinio, kiuj jam sciis, kion mi baldaŭ mem konstatos en la kamparo, t.e. malsategon de popoloj, ribeladojn kaj "komunismojn", eksentis, ke la tiama etoso de Tonkino estas sufiĉe cerbumiga por ili sen ke ili interesiĝus pri "vagado de stultulaĉo". Ili sin sentis forpuŝataj de la eventoj, kiujn ili sukcesis nek antaŭvidi nek digi... kaj mi rimarkis ĉe ĉiuj "sinjoroj" la saman panikan timegon, kiun mi jam rimarkis antaŭ tute nelonge ĉe la rusaj elmigrintoj forpeltitaj el Sovetio... Sed ĉiuj estis viktimoj de la sama "cerba" formado, de la samaj antaŭjuĝoj, de sama egoismo kaj por bone diri, de sama farizeeco, kies senco estas: "eco de tiuj, kiuj elmontras virton, sed kiuj fakte estas blindigitaj per orgojlo, hipokriteco kaj prestiĝo", tiu prestiĝo, kiu al malsataj malriĉuloj sin montras pere de belaj vilaoj, belaj kromedzinoj, brutaj policistoj kaj "fremdul-legianoj ktp...

Sed por ni, kiuj travivis poste la hitleran "epopeon", tiuj metodoj simple estis **faŝistaj** metodoj... Sed ĉu niaj nunaj potenculoj prikalkulis la lecionojn de la Historio?

----

Ofte en la vilaĝoj mi renkontas sanitarerojn kreitajn de francoj. Bedaŭrinde, en 1931, ĉiuj estas forlasitaj. Mi trovos unu en iama templo, iniciate malfermitan de juna anama sanitaristo kaj dek libervolaj helpantoj. "Ĉiuvespere - li diris - mi disdonas sobran manĝon al ĉ. 2000 malsategantoj. La plej urĝajn malsanulojn mi sendas al indiĝena hospitalo en VINH." Je la 12a li invitas min partopreni en lia manĝo ĉiutage sendata de lia patrino: duonacida bovlo da rizo kun saŭco el salita kaj fermentita fiŝaĵo, kaj viandpecetoj ankaŭ salitaj. La malsategantoj ricevas nur bovlon da rizo kun teo. La rizon liveras la Ĝenerala Rezidejo, kvankam nesufiĉe. Male, ĉie mi renkontas tabakejojn kaj trinkejojn. El tio rezultos, ke ĉiu renkontita franco diras al mi: "Por sin obeigi, nur unu rimedo, la skurĝo." Kompreneble, prostituo estas alia natura sekvo de tia situacio. En hotelo servisto prezentas al mi du tarifojn: unu por la menuo, kaj alian kun fotoj de virinoj, kies prezo varias laŭ la

raso. Kion fari kontraŭ tio? La homamaj iniciatoj de kelkaj el miaj samlandanoj plej klarvidaj estas forbalaitaj de ĝenerala senkonscienco.

Okazo ebligas, ke mi vizitas ĵus konstruitan tombomonumenton de la lasta anama imperiestro. El ferbetono, ĝia interno estas lukse dekoraciita per donacoj de koloniaj eminentuloj, kiel subskriboj atestas. Sed vane oni serĉas postsopiran ateston de liaj samregnanoj.

Tiun saman tagon priesperanta konferenco vekas entuziasmon kaj intereson de enlandaj eminentuloj.

### **Septembro 1931.**

Estas la pluvsezono. Mia antaŭenirado fariĝas peniga. Regas malagrabra humideco, ĉien penetranta. En kelkaj horoj ĝi povas tegi objekton per ŝimo persista kaj malbonodora.

### **Marde, la 22an de septembro 1931.**

Vilaĝo Sa-Hu-Jin. Hieraŭ min gastigis Tuluzano, t.e. preskaŭ samregionano. Li estas doganisto, eĉ doganestro. Jen elĉerpoj el interparolado dum tagmanĝo kun aliaj amiko:

- Ĉi tie mi bone statas, bone pagata, sen tro da laboro... Domaĝe, ke mi baldaŭ emeritiĝos. Niaj staploj kaj grenejoj estas plenplenaj de rizo, maizo, salo kaj... opio, kaj mia sola timo... la Komunistoj. Lastan jaron venis kelkaj miloj da ili, senarmilaj sed kun ruĝaj flagoj. Komence ili petis de ni manĝaĵon, sed kompreneble ni ne povis tuj konsenti, ĉar mi devis peti permeson de niaj ĉefoj... Ili do foriris, sed poste, la unuan de majo, ili revenis, samnombre. Mi ne diskutis kun ili, ĉar mi estis ricevinta ordonojn kaj... pafilojn. Sekve do, kun dek el miaj plej bravaj kunhelpantoj, armite per mitraliloj, per ununura pafado ni mortkuŝigis pli ol kvindek el ili... Kompreneble la aliaj forkuris, eĉ rapide... kaj ni tuj poste, kolektante la murditojn, konstatis ke preskaŭ ĉiuj estis manligitaj: ili estis ostaĝoj, "kunlaborantoj" (kun ni, francoj), kiujn la manifestantoj uzis kiel ŝirmilon.

(...) Kiam mi alvenis en vilaĝon Hang-Son, antaŭ policejo mi vidis kaptiton. Li estis ligita kiel kolbaso kaj sub tagmeza sunego, apogita kontraŭ blanka muro, kie la muŝaro svarmis kaj pikadis lin. "Hodiaŭ oni devas pridemandi lin, diris al mi la ĝendarmo, antaŭ ol sendi lin al Pulo-Kondoro..." (Pri Pulo-Kondoro ĉiuj ĉi tie en Hindoĉinio, eĉ francoj, parolas mallaŭte kaj buŝorele, kial? Tial ke tiu insuleto estas terura malliberejo, el kiu neniu revenas viva kaj en kiu oni terure traktas la punitojn. (Bukenvald, antaŭ ol oni parolos pri ĝi. La Hitleranoj nenion inventis...)

Ĉe vojkrucoj, sur ĉiuj muroj, estas afiŝita la foto de unu aŭ pluraj suspektuloj (same kiel en la usonaj "western") kun propono de mirinda monsumo, al kiu denuncos ilin... Saman metodon ni ekvidis dum la Hitlera okupado de Francio...

### **Mardon, la 30an de septembro 1931.**

Vespere, ĉirkaŭ la 8a, forveturo aŭtobusa de PHANLAN al DALAT. Lunbrilas superbele. Sekve, la vojiro estas vere agrabla vojaĝo, spicita de tri notindaj incidentoj. La unua estas pneŭa krevi. Je la 23a ni trovas kamionon haltigitan de du arbegoj falintaj laŭlarĝe de la vojo. Du montaranoj pene klopodas ilin senbranciĝi per siaj plataj tranĉilegoj. Tiel necesos almenaŭ la tuta nokto. Tiam mi memoras, ke mi estas ĉarpentisto, do arbohakisto. Oni donas al mi la helphakilon de la aŭtobuso kaj... kvaronhoron poste, kun helpo de la miregigita ĉeestantaro, la vojo estas libera. Kelkajn kilometrojn pli fore, dika roko baras la vojon. Ni sukcesas transpasi koste de vera akrobataĵo fare de la ŝoforo. Finfine, je la 4a matene ni alvenas en DALAT ĉiam akompanataj de la lunbrilo. Sed neniu hotelo por dormi. Mi do starigas mian tendon sub lerneja ŝirmkorto, kie mi estas vorata de kuloj kaj ne malmulte frostita, ĉar eĉ je la tropiko la montaraj noktoj estas malvarmaj.

### **La 4an de oktobro 1931.**

Post dudeko da kilometroj inter rizejoj mi retrovas arbokovritan montaron. Denove aperas la praarbaro, kiu min akompanos ĝis Sajgono, alterne kun zonoj kaŭĉukarbe plantitaj. Je la vespero mi haltas en vilaĝeta gastejo ĉe landlimo inter Hindoĉinio kaj Anamo, meze de la arbaro. kelkaj indiĝenoj estas drinkantaj aĉan brandon.

Post kelkaj boteloj okazas kio antaŭvidebla. Unu el ili falas, mortige ebria. Lia edzino vane klopodas lin savi. Tiam ŝi gestpetegas mian helpon. Kion fari? Mi funde esploras mian memoron. Tiam mi pistas lignokarbon, kiun mi diluas en grandan glason da boligita akvo. Mi trinkas gluton da tiu "kafo" por montri ĝian nedanĝerecon, antaŭ ol prezenti ĝin al la malsanulo. La efiko estas tuja kaj drasta. Li abunde vomas kaj ekdormas profunde. Tiam tiuj simpluloj dankeme kurbiĝas antaŭ mi unu post la alia. La malsanulo mem ĉirkaŭ noktomezo vekigis tute resaviĝinta, kaj venis genue min danki, kun la manoj kunigitaj antaŭ lia kapo.

Tiuokazaĵo montras kio povus esti la vera prestiĝo de blankulo. Bedaŭrinde, alkoholejoj kaj tabakejoj estas pli multnombraj ol dispensarioj kaj lernejoj.

La leganto ne kredu, ke oni improvizas tian vojaĝon. Mi rapide komprenis, ke necesas ĝeneralaj nocioj pri praktika higieno, eĉ pri medicino. Mi havis elementan medicinaĵojon kaj memorlibreton: "Mia kuracado per akvo" de KNEIPP, el kiu ĉiutage mi ĉerpis saĝajn kaj praktikajn konsilojn pri korpa kaj mensa higieno. Ĝi resumiĝas per "vivu nature". Pura akvo kaj aero, suno, estas la tri plej bonaj kuraciloj, hodiaŭ tiom neglektataj. La kvara estas la homo mem, kiu devus racie uzi tiujn tri bazelementojn.

**La 16an de oktobro 1931.** Mi alvenis en Sajgono. Post du monatoj da malsaneco en urba hospitalo, dank' al mirakla helpo de mia samurbano komandanto Batz, mi havis adiaŭan ceremonion, kiun la sportuloj organizis speciale por mi. Post futbala matĉo, oni invitis min ĉirkaŭrajdi per biciklo la tutan stadionon. Tiam mi ricevis de la Sajgonanoj tiel fervoran ovacion, ke ĝi superis tiujn ĝis nun spertitajn. Ĉi kompanse konsolis min pri la multaj "oficialaj ofendoj" kaj humiligoj min trafintaj. Tio pensigis al mi, ke se la francaj oficialuloj estus fidintaj la simplan popolon, verŝajne neniam ili de tie estus forpelitaj.

### **Unuaj impresoj pri Angkor-temploj en Kamboĝio.**

... Ili estas kolosaj, grandiozaj, belegaj, teknike rimarkindaj. Supre de la ĉefaj monumentoj oni vidas ŝtonegojn de pluraj tunoj, kiujn oni metis pli ol 20 metrojn alten, mi supozas...

En la areo de la malkovroj oni ĉiutage malkovras plimalpli grandajn sanktejojn kaj mi rimarkas, ke la vojoj, kiuj radias de la arbaro, estas plej ofte faritaj el longaj, unuopaj ŝtonegoj, kiuj similas tiujn, kiujn oni malkovras en Francio sur la malnovaj romiaj vojoj... Per kia ilaro la tiamaj t.n. "sovaĝuloj" scipovis kaj sukcesis krei tiom da mirindaĵoj? Kiam oni komparas la nunan malriĉan civiliznivelon de la nuntempaj popoloj, vere nenion oni komprenas unuavide... Kiom mi deziregus, ke milionoj da gejunuloj el la tuta tero povu kiel mi viziti tiajn imponaĵojn! Por ke ĉiuj povu mediti pri la vaneco de sencela kaj malserioza vivo...

La malaperintaj civilizacioj montras al ni la vojon de estonteco: plibonigi konstante la vivnivelon de ĉiuj homoj sur nia tero. Kaj tiun celon oni povas atingi, nur plibonigante la spiritan kaj kulturan nivelon de ĉiuj infanoj sur nia terglobo kaj ankaŭ la civitismon...

**Mia spirita kaj fizika sanstato en 1932** (skribita sur ŝipo "Thedans" en Malaka markolo, la 2an de februaro 1932)

... Mi sentas sekvojn de mia malsano en Sajgono. Mi ofte febras kaj pli facile ol antaŭe laciĝas. Krome, mi timas baldaŭan mondmiliton. Plie, nek por Aŭstralio nek por Ameriko mi povis havigi al mi la necesajn vizojn. Pli grave, mi preskaŭ ne plu havas monon por longe daŭrigi. Post mia vizito al Javo, kion mi povos, devos fari ?

## Javo

Se (en 1932) Sumatro estas ankoraŭ plejparte tegita de virgaj arbaroj, en Javo, male, same kiel en Japanio, la tuta grundo, ĝis la plej eta ero, estas ekspluatata de tre densa kaj laborema popolo. Ŝajnas, ke la Nederlandanoj tre sperte kaj efike kunlaboras kun la lokaj "indiĝenoj", inter kiuj estas multaj ĉinoj:

En ĉiuj lokoj, kaj en montaro, kaj en valoj, irigacio estas racie ellaborita. La rizejoj estas belaj, verdaj, densaj kaj laŭvide, dank' al pluvoriĉa klimato, tre fruktodonaj. La insulo estas grandega ĝardeno, arte prizorgata. Kaj mi povas eĉ aserti, ke ĝi estas perfekta modelo, precipe por Francio en tiu epoko.

Tri ĉefaj zonoj karakterizas la klimatojn:

1. Marnivele, ĉiama varmego.
2. En altaj ebenaĵoj aŭ montaj regionoj, ideala, milda temperaturo, kvazaŭ franca klimato.
3. Ĉe altaj montpintoj regas ventegoj, frostoj kaj pluvegoj preskaŭ ĉiam. Tial akvo ĉie fluas, purega akvo, racie kolektata dank' al ne malpli racia irigacia reto.

En la sama tago, eĉ nur bicikle, mi povas trairi la tri klimatajn zonojn.

En iuj lokoj mi ofte rimarkas virinojn duonnudajn super zono. Ili do elmontras siajn mamojn, kiuj cetere estas ne ĉiuj belaj, precipe tiuj de nejunaj personoj, kiuj laboras en rizejoj aŭ kiuj fiŝkaptas. Ĉi tie la nudeco estas natura afero kaj kontraŭe de eŭropaj virinoj, ili tute ne ofendiĝas, kiam mi rigardas ilin. Ili estas tute senhontaj kaj nekoketaj... Ĉiuj, eĉ geknaboj, fumas cigaredojn el speciala arba folio...

Pro la denseco de la loĝantaro, la vilaĝoj estas multaj. Ili situas eĉ apud la pinto de montoj. La vilaĝanoj estas tre gastamaj, akceptas min favore, kaj mi facile povas aĉeti manĝaĵojn.

### **Merapi-monto, montaro kaj emocia kanto...**

Magelano, la 23an de marto 1932. Hodiaŭ mi vizitis la Merapi-monton, kiu estas ĉiam aktiva vulkano. Lastan jaron ĝi ankoraŭ erupciis kaj viktimitis 18 000 personojn. De ĉi tie hodiaŭ, la vetero estas hela, ni perfekte vidas la tutan eksteraĵon de la monstro, kies pinto kulminas je 2500 metroj kaj el kiu efektive ni rimarkas fumon.

Ni veturas per aŭto kaj trairas kvietajn vilaĝojn kaŝigantajn en bambua verdaĵo, meze de rizejoj, kiuj ŝtupe ĉirkaŭas ilin. De tempo al tempo mi tamen vidas meze de tiu verdaĵo dube nigrajn spurojn de cindroj, kiuj paradokse iom post iom igas fekunda tiun bruligitan grundon.

Survoje ni renkontas karavanoj el etaj ĉevaloj, kiuj transportas selŝarĝe ĉiajn varojn. Tion mi neniam vidis en Ĉinio... Kompare kun la loĝantoj de la marbordo la homoj en tiuj montoj estas tipoj belegaj, pli grandaj, pli fortikaj, kun rimarkinda muskolaro, ne ksenofobiemaj kaj tial tre gastamaj.

Subite ni devas piediri, ĉar ni eniras en ĉiutempan zonan de erupcio. La pejzaĝo estas ĉie bruligita. Arboŝtipoj, duone karbigitaj, starigas al ĉielo siajn kriplan branĉaron kaj torditajn radikarojn, kiuj elvokas monstrajn nigrajn serpentojn.

Nun ni alvenas en lafan riveregon, kiu solidiĝis. Apud tiu infera rivero, mallonga skribaĵo atestas, ke 200 personoj, kiuj vivis tie, pereis fulme pro la kataklismo kaj surloke estis "enlakitaj".

Tero kaj rokaro malaperis; lafo, lafajo ĉion tegas, formante akvanojn, kies malglataĵoj tranĉas kiel vitro.

Miaj esperantistaj gvidantoj diris: "La elradianta varmeco estis tiom granda, ke de nia hejmo (ĉirkaŭ 15 kilometrojn for de ĉi tie) ni sentis ĝin. Precipe tiu temperaturo kaŭzis la plej grandajn detruojn. Pro tio, en perimetro de 2000/3000-metra radiuso ĉiuj vivantaĵoj estis karbigitaj. (Saman konstato dek jarojn **poste** oni faris pri la **eksplodo** en Hiroŝimo).

Marŝante singarde en torentejo, ni revenis piede. Super niaj kapoj, alta roka krutaĵo kaŝis nin. Subite, kortuŝa, purega kanto leviĝis super niaj kapoj. Nostalgia. kanto de simpla kampara knabino, kiu trilis en la silento de tiu montpinto. Fakte ni ne komprenis la vortojn, sed tiel ĉarma kaj neatendita estis tiu kanto, ke ni surprize kaj diskrete levis niajn kapojn por apenaŭ ekvidi junan praloĝantinon duonnudan, kiu tute simple kolektas herbon per granda tranĉilo.

Estis tie ni, tri eŭropanoj. Kaj ni rigardis unu la alian silente kaj kvazaŭ religie aŭskultis tiujn notojn falantajn de la ĉielo, kiuj atestas vivigojn, liberecon kaj precipe tiom da nedifinita naiveco. Malofte, eĉ de opera kantistino ni aŭdis tiel kristalan voĉon, kies sonoj estas tiel helaj, tiel puraj... Unu el ni senpripense malkovriĝis kaj nia kantulino lin ekvidis. La sorĉo estis rompita. kvazaŭ cervineto

surprizita de pafo, pro timo ŝi forkuris, treme premante kontraŭ siaj mametoj la herban faskon, dum ŝia serpeto ekbrilis.

Kelkajn minutojn poste, ni alvenis en mezepokan vilaĝeton, kie nian atenton altiris "sovaĝa muzikistaro". En duona lumo de placeto kunvenis homamaso antaŭ du muzikistoj kaj tri dancistoj. Verŝajne ni ĉeestis aŭtentikan spektaklon de trobadoroj, kiel tre certe okazis en Francio pasintan jarcenton?

## **FORMOZO (ĉine: Tajvano)**

La loĝantaro konsistas el praloĝantoj, aŭ indiĝenoj (de alia raso ol ĉinoj). Ĉi tiuj fakte sukcesis ĉi tie kion ili celas ĉie en Pacifiko, t.e. okupi la tutan insulon. Fine, la japanoj estas (en 1932) ja lastaj okupantoj. De post la venko de Maŭ en Ĉinio, Ĉan-kaj-cek fariĝis la diktatoro de Formozo. Li tiel kreis konstantan tutmondan eksplodejon.

Ĝuste kiam nia ŝipo alvenas antaŭ la Formoza marbordo, subite eksplodas la minacanta ŝtormo: la vento blovadas fortege kaj tute ne eblas restadi sur la ferdeko. Nia ŝipo, kiom ajn dikega ĝi estas, estas skuata kvazaŭ pajlero. Ĝi elakviĝas, stariĝas duonvertikale, ruliĝas kaj tangas terure. La maro bolas, furiozas. kolosaj ondegoj, veraj akvomontoj, falegas sur la ferdekojn. La tuta marareo estas nur akvokirloj, monstraj plisegoj, kun infera bruoj. La temperaturo ege malleviĝis. Dum tiu krepusko oni povus kredi pri proksima mondfino. Ĉiuj, inkluzive de mi, ŝlosas sin en sia kajuto kaj kuŝejo... por provi dormi la tutan nokton.

Konsekvenco de tiu ŝtormego: la rapida poŝta ŝipo, kiun ni devis renkonti por transbordigi poŝtaĵon, foriris antaŭ nia alveno por eviti troviĝi proksime de la marbordo dum tiu diluvo.

Frumatene, la ŝtormego iom kvietiĝas kaj nia ŝipestro profitas de tiu kvietiĝo por proksimiĝi singarde al la tero. Iom post iom, kun la sunleviĝo, la unuaj sunradioj balaas la nebulojn kaj kvietigas la venton. Baldaŭ, baniĝanta en la brilo de la suno, la marbordo aperas al niaj mirigitaj okuloj en sia majesta beleco. Ĝi montras netraireblan muregon el nudigitaj kaj verŝajne nefruktodonaj montaroj.

Absolute dezerta estas tiu horizonto, sed jen subite aperas antaŭ niaj okuloj terurega pinta roko, ĉirkaŭita de rokaroj samnivelaj kiel la maro.

Post memorinda formalaĵo mi rajtis elŝipiĝi kaj promeni surtere, sed oni rigore malpermesis al mi foti la havenon de Kiruno. Mi do povis nur noti kelkajn impresojn. Tuj kaj okulfrape la malsimileco de la civilizoj montriĝas ĉi tie. Jen moderna, pureca, komforta urbo: la japana. Jen mallarĝaj, fetoraj, sensunaj strataĉoj, en kies labirintoj svarmas malriĉa, bruega, neglektema homaro: tio estas la ĉina. En ĉinaj kvartaloj mi ankoraŭ vidis la tiel oportunajn porteblajn seĝojn, oportunajn pro la mallarĝeco de la stratoj... En orienta flanko aperas mizeregaj vilaĝoj, ĉirkaŭitaj de malgrandaj rizejoj, flanke de la kruta, arida monto sub suno ardanta... Ĉu atesto de Ĉina obstinego?

Iom apud markvartalo mi denove rimarkis la neeviteblan kanalon, kies koton oni zorge kolektas por fekundigi la sterilan grundon de tiu montplena regiono. Kaj laŭlonge de japanaj kvartaloj mi rimarkis... japanajn prostituitinojn. Sed en ĉinaj kvartaloj, vi demandas min? Pri tiuj moroj la ĉinoj estas pli diskretaj ol la japanoj. Oni vidas neniun ĉinan "belulinon" sur la stratoj, tamen mi scias, ve, ke prostituo des pli ekzistas, ju pli malriĉa estas la popola tavolo.

Mi revenis al la ŝipo je la 17a kaj mire mi konstatis, ke mi estas la unua el ĉiuj pasaĝeroj. Mi estis apenaŭ sur la ferdeko, kiam ekturmentis min japanaj kaj ĉinaj bazarulinoj, kiuj nepre volas vendi al mi "memoraĵojn". Je la 19a la lastaj japanaj pasaĝeroj revenis... duonebriaj, kaj invitis min daŭrigi sur la ŝipo la lastan liberan festonokton. Mi ial rifuzis. Sub rimarkinda lunlumo, en kvieta nokto, malrapide kaj majeste nia ŝipo reforiris nun laste al Japanio... Antaŭ ol kuŝiĝi, vole-nevole (ĉar tia estas la japana gastamo) mi devis konsenti trinki bieron kun miaj novaj amikoj. Kaj domaĝe por mi, ĉar mi malsanis parton de la nokto!

\* \*

\*

## Fakte, Esperanto efektiviĝis la promesitan miraklon!

Mi foriris de Japanio el Curuga, per ŝipo, kompreneble, la 28an de aprilo 1932. Akompanis min mia amikino kaj aliaj amikoj esperantistoj. Kiam fine mi ne plu vidis la marbordon kaj sur la kajo Fraŭlinon Ouada kaj aliajn, kiuj flirtigas verdajn flagetojn, miaj okuloj eklarmis... Adiaŭ, amikino Inako, en vi mi salutas la fratecan Japanion kaj ĉiujn japanajn landanojn... la neforgeseblan anaron de tiu admirinda kaj aminda popolo, kiu min akceptis, gastigis, helpadis en ĉiuj kaj ĉiaj okazoj (kiel efektive mi, la negrava malriĉa proleto eĉ ne povis imagi, eĉ ne deziris...). Jen la vera leciono de mia bicikla vagado: **Esperanto pruvis al mi, ke la tuthomara fratiĝado ne estas utopio, ĝi estas ebla**, kia ajn estas la religio, la raso, eĉ klaso aŭ nacieco de ĉiuj homoj. Pacon do al bonvolaj homoj, pere de "neŭtrala lingva fundamento", se ili nur estas kore sinceraj...

## Ĉu nostalgio?

Kazan, Irkutsk, Novosibirsk... Kiom da kortuŝaj aŭ malgajigaj aŭ komikaj memoraĵoj pasas denove antaŭ miaj okuloj! Tamen, iom post iom nova sento, kiun delonge mi forbatis, sin trudas al mi... Nostalgio, nepra bezono revidi la patrujon. Kiu neniam ellandiĝis, tiu eble neniam povos kompreni tiun senton, la emociion, kiu korpremas la vojaĝanton, kiam li sentas, ke ĉiuj tak-tak-tak de vagona rado similas la baton de nia korhorloĝo, ke ĉiu sekundo proksimigas nun la momenton, kiam ni povos revidi karulojn, kaj eĉ, por mi... iom manĝi. Mi ja ne plu havis monon por aĉeti manĝaĵon post akiro de vagonara bileto, kiam mi atingis la germanan landolimon.

Tamen kaj fine, jen la patruja landlimo: Francio, la rehejmiĝo. Nun nepriskribebla emocio min stringas...

Kaj spite ĉion (pro blinda burokratiismo) la francaj oficistoj postulas de mi, kion ne postulis eĉ sovetiaj: ĉio. de mi, de mia pasporto ĝis la plej malgrandaj detaloj de miaj pakaĵoj, estas funde esplorata de policistoj kaj doganistoj. Fakte, Francio, mia patrujo reakceptas min, kiel ĉie en franca regno, t.e. kvazaŭ krimulon, almenaŭ kvazaŭ grandan suspektulon. Ho, demokratio! Kaj de unu tagnokto mi estas nenion manĝinta nek trinkinta...

## Parizo

Tiu nova kontakto kun Parizo, kun Francio, post kvar jaroj da foresto, estas por mi neforgesebla kaj eĉ nepriskribebla... Forgesitaj miaj afliktoj, mia fiakcepto ĉe la landlimo! Parizo reaperas al mi tia, kia ĝi fakte estas en tiu belega printempa suna tago: "LUM-URBEGO".

Piede ĉar mi havas eĉ ne unu frankeron mi iras ĉe miajn kromgepatrojn, Gesinjorojn Filhol, kiuj min akceptas kiel atendite: gepatre, korinkline, tute nature, kun larĝe malfermitaj brakoj, kiel ĉiam. Ha, bravuloj! Je la komenco de tiu return-vojaĝo, feliĉe troviĝis ankaŭ S-rino Majzlis, ankaŭ alia patrino: sovetia, kaj ĉi tie, nova, infanjara panjo... Jen do kio povas esti nostalgio. Kiel dolĉa por ni, viretoj, povas esti virina delikateco, virina patrineco...

Ges-roj Filhol min gastigis du tagojn kaj pruntedonis al mi la necesan monon por aĉeti novan biciklon, tiel ke, reveninte en mian naskiĝurbon, mi povu tuj rekomenci labori senprokraste kaj tiel repagi rapide mian ŝuldon.

Cetere, estis al mi dolĉe reveni hejmen, traitante lastan fojon mian belan patrujon. La vetero estis milda kaj bela kaj pro tio kaj ankaŭ pro neceso mi tranoktis rekte surkampe... Malgraŭ la beleco kaj mildeco de la franca klimato, mi senŝovinisme spertis, ke ankaŭ en aliaj mondopartoj oni povas trovi ĉarmon.

Tiel mi trafis la pavimon de la nacia vojo n-ro 10a, kiu trairas Liburnon. Ci tie mi fine haltis ĉe Suŝe-kajo por admiri la belegan vidpunkton de la kunfluejo de riveroj Dordonjo kaj Islo, kiun superas la vinbereja monteto de l' mondfama Fronsak.

Tamen lastan nokton mi devis tranokti en mia ne malpli dolĉa landa arbaro. Lastan fojon, mi dormis sub belegaj steloj, meze de komforta pinpingla lito, lulate de cikadaj kantoj kaj de noktobirdaj triloj, apud kristala fonteto, kiu matene utilis al mi kiel banujo. Interna ĝojo tiam anstataŭis mian antaŭan nostalgion. Ĉiuj arboj, ĉiuj kampoj nun min rekonis kaj mute sed okulfrape min reakceptis tutkore. Post tri horoj mi estos hejme, mi revidos mian panjon, kiu sopire atendas min.

Efektive, kvankam en mia vilaĝo Lavardak, ĉip konas la aliajn, mia reveno frumatena okazis nevidite. Ĉiuj jam estis en laborejo, inkluzive de mia patro. Mia panjo simple diris al mi dialekte: "Fine, aĉulo, vi tamen revenis". Sed por mi tiu popola eldiro fakte kaŝas la tutan trezoron de profunda patrina amo, kiu nek povas nek scias sin esprimi, en kruda kampa dialekto.

Vespere, kiam mia patro revenis de la laboro, kompreneble familia festo estis aranĝita por mi.

Nepra problemo urĝis por mi: **labori**, relabori kiel eble plej frue por reakiri vivnecesan monon. La morgaŭon mi do redungiĝis kiel ĉarpentisto... Ve... post nur unu tago da laborado, la duan tagon, frumatene, min trafis grava laborakcidento: frakaso de mia dekstra piedo... Tiu akcidento ruinigis mian tutan postan vivon. Precipe, ĝi malfruigis eĉ longe la kompiladon de miaj notoj kaj sekve la verkadon de tiu ĉi rakonto.

## FINA KONKLUDO

Mi memorigas, ke mia vojaĝa celo estis duobla: Unue, studi memvide la ĉefajn kaŭzojn de **militoj**. Due, pruvi al mi kaj al aliuloj, kion povus fari por paco la neŭtrala, tutmonda lingvo Esperanto kiel internacia, lingva ilo kaj rimedo.

Mi substrekas, ke de naskiĝo mi estas proleta ido, t.e., laŭ difino, laborulo kaj... "kanon-karno". En mi, mi rekonas ĉiujn proletojn de la terglobo kaj mi pensis ilin helpi, precipe por ke la estontaj generacioj ne faru denove la samajn erarojn aŭ kulpojn, kiujn faris miaj antaŭuloj kaj samtempoj.

Mi substrekas ankaŭ, ke militoj estas antaŭ ĉio homkoraj miskvalitoj, tial ke militemulojn oni trovas en ĉiuj medioj, eĉ, bedaŭrinde, ĉe proletaj rondoj.

Kiel ĝeneralajn konkludojn mi skribos nur jenon: Kontraŭe de tio, kion oni instruis al mi sur lernejoj sidiloj ("se ci volas pacon, preparu militon"), necesus de nun kaj iom post iom apliki la devizon: "Se ci volas pacon, pacon ci preparu!" Tio estas, antaŭ ĉio:

1. Forĵeti ĉiajn naciecajn propagandojn, precipe la Ŝovinismeman kaj revenĝan. Ĉie en la tuta terglobo, en ĉiuj naciaj popollernejoj, per radio, kino, gazetaro ktp., oni zorgu pri tiu nova propagando.
2. Konsideri ĉiujn homojn el ĉia ajn mondoparto, el ĉia ajn haŭtkoloro, el ĉia ajn religio, kiel **egalrajtajn**, leĝe kaj fakte.
3. Ankaŭ pripensigi ĉiujn, ke la plej malgranda, eĉ la unuavide plej negrava okazaĵo en la tuta terglobo ne plu estas al ni fremda, kaj tial ni devas kaj ne povas lasi nin **indiferentaj**. Ekzemple: Geknaboj, kiam vi forĵetas malfreŝan panon, ĉu vi konscias, ke ie, aliloke en la mondo, milionoj da infanoj kiel vi, malsate mortaĉas?

Enkapigu, ke nia vivnivelo ĉiam kaj ankoraŭ suferas de la militdetruoj de la pasintaj tempoj: precipe de la tri lastaj mondmilitoj (Hindoĉina-Usona estas la tria), ne forgesu...

La elspezojn. kiujn oni dediĉas por detruo, mortigi, oni ne povas havi, ekzemple, por helpi la diversajn mizerulojn de la propra lando:

maljunulojn, malsanulojn ktp, kaj tio kian ajn tendencon havas via registaro. La sovetia kaj ĉinia regnoj estas nuntempe la plej okulfrapaj ekzemploj de la modernaj tempoj...

Male, la nedetruitaj landoj, kiel Usono, ekzemple, estas la plej prosperaj. Ĉu vi komprenas tion, amika leganto?

### **Pri rimedoj de mia mondvojaĝo.**

Mi kredas, ke mi sufiĉe trafe kaj longe demonstris pri la internacieco de Esperanto, kiu ebligis al mi konatiĝi kun gevoj el ĉiuj nacioj, klasoj, religioj ktp. En ĉiuj mi retrovis homon, fraton, diofilon, kaj Esperanto ebligis al mi fratiĝi kun ĉiuj, **ĝuste kion ĝi promesis al mi.**

Kaj biciklo ? Ĉu mi ne rajtas konsideri ĝin, kiel eksterordinaran inventon, kaj omaĝi al ĝiaj inventistoj? Mirinda ilo, ne poluanta, kiun uzas ĉiutage milionoj da homoj!

Fine, lastan lecionon de mia monda migrado mi eltiras el tiu germana proverbo: **Lernu ion kaj vi ion scios**, kaj tiel tiu scio iam ajn servos al vi. Mirinde, por ne diri: **mirakle**, ke la sorto ebligis al mi lerni unue stenografion kaj due Esperanton kaj... biciklan emon kaj povon! Ili estis la tri necesaj iloj aŭ rimedoj por efektiviĝi mian faton... Ĉar fakte, en la 20a jaro, **io pelis min antaŭen.**

Hodiaŭ, post duonjarcento, mi sincere konkludas: se mi devus rekomenci mian vivon (en samaj kondiĉoj), **mi tute same farus.**

Laŭ tria eldono : Baude' F 47470 Beauville

## ORIENTA PARTO DE LA VOJAĜO

